
Esperanto en servo de la mondo paco



paco

ORGANO DE LA MEM-SEKCIO DE GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO



1983

Sesio de la Politika Interkonsiliĝa Komisiono de la membroŝtatoj de la Varsovia Traktato · Prago, la 4-an kaj 5-an de januaro 1983:

El la Politika Deklaracio

Fine de la 20-a jarcento la homaro staras antaŭ akutaj universalaj problemoj de socialekonomia, demografia kaj ekologia naturo. Ĉe la nuna stato de la produktivaj fortoj, de scienco kaj tekniko en la mondo ekzistas la necesaj materiaj kaj intelektaj antaŭkondiĉoj por praktike solvi tiujn grandegajn problemojn. Tamen reakciaj fortoj malhelpas la internacian kunlaboron, servantan al tiuj celoj. Ili intencas konservi la postrestintecon de tutaj kontinentoj, malpacigi kaj konfronti la ŝtatojn.

Entute do la situacio daŭre plikomplikiĝas kaj la internaciaj malakordoj kreskas. La danĝero de milito, precipe de nuklearmila milito, pligrandiĝas . . .

La ŝtatoj, partoprenantaj la sesion, estas konvinkitaj, ke malgraŭ la komplikeco de la tutmonda situacio eblas venki la danĝeran fazon en la internaciaj rilatoj. La nuna iro de la okazaĵoj devas kaj povas esti haltigata kaj turnata en direkton konforman al la esperoj de la popoloj.

Por tio la socialismaj ŝtatoj, kies pacamo estas karakterizaĵo de sia socia ordo, investas sian tutan internacian influon, sian politikan kaj ekonomian potencon. Grava faktoro, efikanta por la sanigo de la internacia situacio, estas la movado de la nealiancitaj ŝtatoj. Ankaŭ aliaj ŝtatoj turnas sin kontraŭ la malbonigo de la internacia klimato . . .

La ŝtatoj, partoprenantaj la sesion, insiste substrekas, ke ĉiuj pripensoj, estigi kaj gajni nuklearmilan militon, kontraŭas al ĉiu prudento.

Post nuklearmila milito, se ĝi estiĝus, venkintoj ne povus ekzisti. Ĝi neeviteble alportus la pereon de tutaj popoloj, grandegajn detruojn kaj katastrofajn sekvojn por la civilizacio kaj entute por la vivo sur la tero.

Armea politiko, baziĝanta sur tiaj kalkuloj, neeviteble sekvigas ankaŭ aliajn eksterordinare danĝerajn konsekvencojn.

Unue la produktado kaj starigo de ĉiam pli novaj nuklearmilaj sistemoj kaj aliaj amasneniigaj armiloj plue subfosos la armestrategian stabilecon, fortigos la internacian streĉitecon kaj komplikigos la interŝtatajn rilatojn.

Due la plua fortigo de la vetarmado kontraŭas al la celo, kion sekvas la membroŝtatoj de la Varsovia Traktato, agante kontraŭ militista rivaleco, nome garantii la armestrategian ekvilibron sur pli kaj pli malalta nivelo. La realigo de la supre nomitaj armadaj programoj kondukos al altigo de la nivelo de armea konfrontado. La paco fariĝos ankoraŭ pli nestabila kaj pli rompebla.

Trie la nukleaj armiloj kaj la aliaj amasneniigiloj kun nova rondo de la vetarmado fariĝos ankoraŭ pli komplikaj. Pro tio fariĝos ankoraŭ pli malfacile, ellabori internaciajn konvenciojn pri ilia limigo kaj reduktado.

Pro tio la ŝtatoj, partoprenantaj la sesion, opinias, ke necesas senprokrasta agado tiel longe kiel ankoraŭ ekzistas ebleco ĉesigi la vetarmadon kaj transiri al malarmado . . .

En la nuna komplikita internacia situacio ĉefe temas pri tio, venki la mortopunkton ĉe la reala limigo kaj reduktado de la armilaroj kaj armeoj. Ĉikonekse la partoprenantoj de la sesio pledas por tio, decide rapidigi la kurantajn intertraktojn pri la tuta problemaro de ĉesigo de la vetarmado, rekomenci la interrompitajn intertraktojn kaj obstine kaj pacience celi interkonsentojn, kiuj garantias reduktadon kaj forigon de la armiloj, precipe de la nukleaj armiloj. Ili subtenas kaj salutas la proponojn de Sovetunio sur la kampoj de ĉesigo de la vetarmado kaj de la malarmado . . .

decide pledas por ellaborado de programo de laŭpaŝa nuklea malarmado kaj ĉikadre por interkonsentoj pri ĉesigo de la evoluigo kaj produktado de novaj nuklearmilaj sistomoj, de la produktado de nuklefendebla materialo por la produktado de diversaj specoj de tiuj ĉi nuklearmilaj sistemoj kaj de nuklearmilaj portiloj. Ĉio tio kreus antaŭkondiĉojn por atingi la forigon de la nukleaj armiloj.

Ili konsideras necesa, rapidigi la atingon de interkonsentoj pri vico da konkretaj problemoj kaj apelacias al ĉiuj ŝtatoj, doni al la intertraktoj, i.a. en la Ĝeneva Komisiono pri Malarmado, novajn impulsojn, por:

- ellabori dum plej mallonga tempo konvencion pri la plenampleksa kaj ĝenerala malpermeso de nuklearmilaj testoj;
- rapidigi la ellaboron de internacia konvencio pri malpermeso kaj neniigo de kemiaj armiloj;
- transiri al la ellaboro de konvencio pri malpermeso de neŭtronaj armiloj;
- senprokraste komenci intertraktojn pri malpermeso de la starigo de ĉiuspecaj armiloj en la kosmo;
- rapide finpretigi la interkonsenton pri internacia konvencio pri malpermeso de radiologiaj armiloj;

– rapide solvi la problemon pri la altigo de la sekurecgarantioj por tiuj ŝtatoj, kiuj ne disponas pri nukleaj armiloj . . .

Malgraŭ la multfaceteco de la nuntempaj internaciaj problemoj la perspektivo de Eŭropo kaj de la mondo altgrade dependas de tio, ĉu sukcesos forigi la malfidon inter la du plej grandaj armeaj-politikaj aliancoj, Varsovia Traktato kaj NATO, disponantaj pri grandega potenco, ĉefe sur la kampo de nukleaj armiloj, kaj malaltigi la nivelon de konfrontado. Armita konflikto inter ili havus fatalajn sekvojn por ĉiuj popoloj.

La membroŝtatoj de Varsovia Traktato jam delonge pledas por likvido de ambaŭ aliancoj kaj likvido de ties armeaj organizaĵoj kiel unuan paŝon. Tiu propono daŭre validas kaj ili estas pretaj komenci intertraktojn kun la membroŝtatoj de NATO, por fari interkonsenton, unue pri la problemaro de la ambaŭflanka reduktado de armeaj aktivecoj.

La nuna streĉita situacio tamen ne permesas prokraston. Necesas rapidaj realaj agoj por jam nun malgrandigi la malfidon inter la membroŝtatoj de Varsovia Traktato kaj NATO kaj malpliigi la timojn pri ebla agreso.

La membroŝtatoj de Varsovia Traktato ne celas armean superecon super la membroŝtatojn de NATO. Ili ne intencas ataki ilin aŭ iun ajn alian ŝtaton en aŭ ekster Eŭropo. La membroŝtatoj de NATO same deklaras ne havi agresajn intencojn. Se tio fakte estas tiel, ne povas ekzisti argumentoj, kiuj malhelpus la membroŝtatojn de ambaŭ aliancoj transpreni ambaŭflanke adekvatajn internacijurajn sindevigojn. Tio konsidere al la nuntempa situacio havus aparte agrablan influon sur la tutan pluan internacian evoluon.

Elirante de tiuj konsideroj nome de la membroŝtatoj de Varsovia Traktato ties plej altaj reprezentantoj turnas sin al la membroŝtatoj de NATO kun la propono, fari kontrakton pri ambaŭflanka rezigno je apliko de armea potenco kaj pri konservo de pacaj interrilatoj.

Ĉefa punkto de la kontrakto povus esti la ambaŭflanka sindevigo de la membroŝtatoj de ambaŭ aliancoj apliki unu kontraŭ la alia kiel unua nek nukleajn nek tradiciajn armilojn kaj do entute ne apliki armean potencon kiel unua. Tiu sindevigo ampleksus la teritoriojn de ĉiuj membroŝtatoj de la kontrakto kaj ilian armean kaj civilan personaron, ŝipojn, aviadilojn, spacveturilojn kaj aliajn objektojn, apartenantaj al ili, kie ajn ili troviĝas.

Ŝajnas konvene, en la kontrakto plani analogan sindevigon por la membroŝtatoj de ambaŭ aliancoj, ne apliki armean potencon kontraŭ „triaj" ŝtatoj, ĉu ŝtatoj, havantaj duflankajn aliancajn rilatojn al ili, ĉu nealiancitaj aŭ neŭtralaj ŝtatoj.

Esenca parto de la konvencio povus esti la sindevigo de la membroŝtatoj de ambaŭ aliancoj, ne minaci la sekurecon de la internaciaj maraj, aeraj kaj kosmaj trafikvojoj, kondukantaj superregionoj, apartenantaj al nenies nacia jurisdikcio.

Dezirindus kompletigi la sindevigon pri neapliko de armea potenco per la sindevigo intertrakti bonvole pri efektivaj agoj por la finigo de la vetarmado, por la limigo kaj reduktado de la armilaroj kaj por malarmado aŭ per aliaj konvenaj paŝoj kontribui al la sukceso de la intertraktoj por atingi praktikajn rezultojn.

En la saman direkton celus sindevigo komune pridiskuti praktikajn agojn por eviti la danĝeron de surprizatako kaj akceli la interŝanĝon de armeaj delegacioj, la viziton de militŝipoj kaj aviadistaj taĉmentoj.

Gravas ligi en la konvencio la sindevigon pri neapliko de armea potenco ankaŭ kun reguloj pri la fortigo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj kiel internacia instrumento de kolektiva sekureco. Ĉirilate estus konvene esprimi en la kontrakto la pretecon pri kunlaboro por altigi la efektivecon de UN ĉe la plenumado de la taskoj, formulitaj en la UN-ĉarto, pri paca solvo de internaciaj disputoj kaj konfliktsituacioj, pri ĉesigo de agresagoj kaj pri forigo de la danĝeroj por mondpaco kaj sekureco.

La kontrakto inter la membroŝtatoj de Varsovia Traktato kaj NATO pri ambaŭflanka neapliko de armea potenco kaj konservo de pacaj interrilatoj kompreneble ne limigus la necedeblan rajton de la partoprenantoj je individua kaj kolektiva memdefendo laŭ artikolo 51 de la UN-ĉarto. Samtempe ĝi liberigus la membrojn de ambaŭ aliancoj de la timo, ke la sindevigoj, validaj en la respektiva alianco, povus esti uzataj por agresaj celoj kontraŭ ŝtatoj, apartenantaj al la respektiva alia alianco kaj ke sekve tiuj sindevigoj povus endanĝerigi ilian sekurecon.

Kvankam estas proponate fari kontrakton pri la ambaŭflanka neapliko de armea potenco kaj la konservo de pacaj interrilatoj inter la ŝtatoj de ambaŭ armeaj-politikaj aliancoj, ankaŭ aliaj interesiĝantaj eŭropaj ŝtatoj havus la rajton, partopreni ĝian ellaboradon kaj subskribon.

Dekomence la konvencio estus malferma ankaŭ por aliĝo de aliaj ŝtatoj de la mondo kiel samrajtaj membroj, se ili deziras tion.

La partoprenantoj de la sesio de la Politika Interkonsiliĝa Komisiono estas konvinkitaj, ke la faro de tia kontrakto kontribuus al la venko super la divido de Eŭropo en sin kontraŭstarantajn armeajn grupiĝojn kaj respondus al la deziroj de la popoloj vivi en paco kaj sekureco. Ili apelacias al la membroŝtatoj de NATO, plene atenti tiujn novajn iniciatojn kaj konstruive respondi ilin.

La membroŝtatoj de Varsovia Traktato en ĉi tiu Politika Deklaracio prezentis siajn ideojn pri la vojoj kaj rimedoj por firmigo de la paco, por konservado kaj profundigado de la internacia malstreĉiĝo sub la nuntempaj kondiĉoj. Ili deklaras sian pretecon al dialogo kaj kunlaboro kun ĉiuj, kiuj sopiras al tiu nobla celo.

El „Horizont", N-ro 3/1983
Trad.: D. Dungert

Deklaro al la Praga Asembleo

de la 6a plenkunsido de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, okazinta la 2an kaj 3an de junio 1983 en Rathenow.

La membroj de la Centra Estraro de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, kunvenintaj en Rathenow al sia sesa estrarkunsido, sincere salutas la Asembleon kaj deziras al ĝi fruktodonan laboron kaj plenan sukceson. La nuna tempo necesigas la pli energian porpacan batalon en plej larĝa fronto.

Ni decide rifuzas la tielnomatan „postarmadon" kaj postulas konstruktivajn paŝojn al efektiva redukto de la militiloj, precipe de nukleaj. Ĉiujn spekulaciojn pri la limigebleco aŭ eĉ gajnebleco de nuklea milito ni rifuzas kiel krimaj kaj cinikaj. Pro tio ni plene subtenas la deklaracion de Prago far la ŝtatoj de la Varsovia Alianco kaj ĉiujn sincerajn planojn pri limigo kaj redukto de la nuklea potencialo. Ni certigas vin, ke la esperantistaro de GDR entreprenas ĉiujn paŝojn por digne kaj efike kontribui al interpopola amikeco, malstreĉiĝo, por paco kaj kontraŭ nuklea milito.

„Mi opinias ĉiujn homojn abomenindaj“

Intervjuo kun Samuel Cohen – patro de la neŭtrona bombo

En Los Angeles loĝas viro kies krea laboro kulminis en la invento kaj kreado de la neŭtrona bombo. Li nomiĝas Samuel Cohen. Sub la titolo „La monstro“ la nederlanda televida programo „Himalaya“ de la hilversuma sendstacio VPRO dissendis la 15-an de marto 1981 intervjuon kun li, kiun ni ĉi tie prezentas:

Reportero: Kiam vi inventis la bombon?
Samuel Cohen: Tio okazis en somero de 1958. Komitato de la ministerio de defendado postulis de mi esplori la eblecojn de la produktado de nukleaj armiloj por apliko en batalkampo. Poste mi veturis al unu el la laboratorioj, kie mi faris certan malkovron. El ĝi rezultis la neŭtrona bombo. Tio, do, estis ĝia estiĝo.
Rep.: Pri kiu malkovro temis?
S. C.: Ĝi bazas je tiel nomata nuklea fuzio. La energio estiĝas ĉe tio el simile samaj fontoj kiel la sunenergio. Kaj tio estas pura nuklea armilo, kiel ni diras, tio signifas ke dum ĝia eksplodo estiĝas nur malmulte da radioaktiveco. Do, tio estas kvazaŭ granda rentgena aparato. Jen mia artisma imago de urba silueto. (Li desegnas kelkajn domojn.) Kaj alte en la aero, proksimume mil metrojn super la urbo, mi eksplodigos mian neŭtran bombon.
Rep.: Ĉu vi ŝatas fari armilojn?
S. C.: Sincere dirite, jes. Tio estas instigo por mi. Tre alloga okupo.
Rep.: Kiun vi plej multe amas en la mondo?
S. C.: La estaĵon, kiu esperable plej baldaŭ alkuros saluti min – mian hundon. Sed ne diru tion al mia edzino kaj al miaj infanoj.
Per la eksplodo liberiĝos ĉiuj neŭtronoj. Ili dissemiĝas en ĉiujn direktojn. Kaj ili priradias tiun ĉi regionon (Cohen montras super la desegnitaj domoj sufiĉe grandan priradiatan regionon).
Rep.: Kion pensas via edzino pri la bombo?
S .C.: Mia edzino tute ne okupiĝas pri la bombo. Ŝi okupiĝas pri sia teniso kaj pri la dommastrumado kaj tute ne pri tiuj malgajaj aferoj. En kutima militsituacio, ekzemple en batalo pri iu urbo, ni priradios la malamikan armeon. Sed la aerpremo, kiu estiĝas alte supre en la aero, ne atingos la tersurfacon. Sekve la detruiga efiko de varmego kaj aerpremo estas tenata en malproksima distanco de la tersurfaco. Tial oni priskribas la neŭtronan bombon kiel bombon, kiu mortigas homojn sed domaĝas la havajon. Se oni demandas min, ĉu estas morale, mortigi homojn, sed domaĝi havaĵon, mi ĉiam respondas: La homoj estas malamikaj soldatoj, kaj domaĝi civilan propraĵon, tio estas grava. Ĉu vi deziras Cola-on?
La civitanoj havas du eblecojn, aŭ foriri antaŭ ol la batalo komenciĝos, kio plej ofte okazas, se restas sufiĉe da tempo, aŭ serĉi ŝirmon sub la tero, en ŝirmkeloj. Tiuj estas tre simplaj kaj ankaŭ ne multekostaj. Super la tero furiozas la batalo, kaj vi sidas sekure sub la tero. Se NATO decidus ekuzi en Eŭropo neŭtronajn armilojn, la konstruado de ŝirmkeloj estus afero simpla kaj malmultekosta por la civitanoj. La kostoj estas ĉirkaŭ cent dolaroj por persono. Jen ĉio. Tio povas esti tiom malmultekosta, ĉar oni devas ŝirmi sin nur kontraŭ radiado. Ŝirmado kontraŭ aerpremo ne estas necesa. Por tio estus necesaj amasoj da ŝtalo kaj betono.
Rep.: Mi komprenas tion. Sed estas kurioze, ke vi ĉiam parolas nur pri Eŭropo. Pri milito en Eŭropo. Kaj mi loĝas en Eŭropo. Do, via rakontado ne ŝajnas al mi tiom bona.
S. C.: Tio estas logika. Mi nur povas respondi, ke vi havas la malbonŝancon esti najbaro de la sovetia bloko. Vi estas minacata. Ni estas disigitaj de ili per la oceano (la televidilo estas ekfunkciigata, kaj Ronald Reagan aperas sur la ekrano).
S. C.: Tiu estas mia prezidento.
Rep.: Ĉu-li povas daŭrigi la produktadon?
S. C.: Jes, li havas la decidan vorton.
Rep.: Ĉu vi pensas, ke li faros tion?
S. C.: Jes, mi pensas ke jes.
Rep.: Kio okazas kun la soldatoj super kiuj eksplodos la bombo?
S. C.: Ili estos vundigataj kaŭze de tiom intensiva priradiado per neŭtronoj. La plej multaj soldatoj, kiuj troviĝas en la priradiata regiono estos dum kelkaj minutoj paralizitaj. La radiado atakas la centran nervan sistemon. Ili estos ne plu kapablaj agi. Ĉe pli granda distanco la radiado atakas la stomako-intesto-kanalon. La simptomoj estas naŭzo, vomado, lakso ktp. Tiuj, laŭ tiu maniero lezitaj ankaŭ estas nekapablaj agi.
Rep.: Ĉu ili poste mortos?
S. C.: Jes, la plej multaj soldatoj de tiuj ambaŭ kategorioj mortos post certa tempo. Ju pli proksime ili estis, des pli rapide ili mortas. Tiuj kiuj estas plej proksime de la centro, ricevas ŝokon kaj mortas tre rapide.
Rep.: Ĉu tio ne estas terura morto?
S. C.: Morto estas ĉiam terura se ĝi proksimiĝas. Se oni komparas la fiziologiajn sekvojn de la neŭtrona bombo kun tiuj de la tradiciaj armiloj, vi verŝajne venos al la konkludo, ke se vi devus elekti inter ambaŭ armiloj, vi decidiĝus por la neŭtrona bombo.
Enŝovita komentario: Se en alto de mil metroj super malamika tanka bataliono oni eksplodigas neŭtronan bombon, okazos la sekva: la tankanaro en ĉirkaŭaĵo de tricent metroj de la eksplodcentro estos paralezita de ŝoko kiel sekvo de radiado, dum du minutoj kaj mortos en la daŭro de du tagoj. En ĉirkaŭaĵo de sescent metroj la paralizado daŭras kvin ĝis kvardek kvin minutojn. La morto okazos nur post unu semajno. En la ĉirkaŭaĵo de mil metroj la tankanaro povas daŭrigi la batalon, sed mortos en la daŭro de kelkaj semajnoj.
S. C.: La moderna milito estas mekanizita. Oni nur premas butonojn. Jam ne ekzistas herooj. La venonta milito ne estos ripeto de la unua kaj dua mondmilitoj kun iliaj tranĉeoj kaj sturmatakoj. En tiuj du militoj oni povis trankvile diri al si: Mi estas morte vundita, do mi verŝajne mortos, sed mi kunprenos kun mi tiom da malamikoj kiel eble. En la tria mondmilito tio jam preskaŭ ne okazos.
Rep.: Kiamaniere reagas viaj infanoj je via laboro?
S. C.: Kun enorma indiferenteco (al sia filino): Kiel vi pensas pri tio, ke via paĉjo inventis la bombon?
Filino: Tio tute ne interesas min.
S. C.: Mi pensas, ke vi atendis ĉion krom tia plena indiferenteco. Kiamaniere reagas viaj kunlernantoj en la lernejo? Ĉu ili parolas pri tio?
Filino: Jes, ili opinias, ke tio estas

stranga afero. Ili ne scias kion pensi pri tio. Sed ili vidas mian patron alie ol mi. Mi vidas lin tute apartigita de tiu monstro-bombo.

Rep.: Ĉu vi komprenas kial aliaj studentoj trovas la bombon abomeninda?

Filino: Ĉar ĝi mortigas homojn. Ĉio, kio mortigas homojn estas kompreneble iamaniere abomeninda.

S. C. Mi volas mian filinon demandi ion: Imagu, ke vi estus vivinta en 1939, kiam la nazioj okupis grandajn partojn de Eŭropo. Ĉu vi tiam ankaŭ estus kontraŭ la mortigado, ankaŭ se per tio vi povus ilin deteni de vi?

Filino: Kompreneble ne. Sed mi ne trovas la bombon tial abomeninda ĉar ĝi ŝirmas nian landon, sed ĉar ĝi mortigas homojn. Same abomeninda kiel pafilo. Mortigi estas mortigi. Sed por la defendado ĝi povas esti tre utila.

S. C.: Tiam la homoj estas abomenindaj ĉar ili reciproke mortigas sin.

Filino: Tie mi centprocente konsentas kun vi. Ne ĉiuj homoj. Vi tro ĝeneraligas.

S. C.: Mi opinias ĉiujn homojn abomenindaj. Eĉ kiu ne fakte mortigas, volonte mortigus.

Filino: De kie vi scias tion?

S. C.: Tion mi scias. Mi legas. Kaj la homoj rakontas.

Filino: Do, vi opinias ĉiujn homojn abomenindaj? Tiam vi mem estas ankaŭ tia!

S. C.: Kompreneble.

Rep.: Via filo servas en la mararmeo. Kion vi dirus, se li fariĝus viktimo de la bombo?

S. C.: Ho ne, ne, ne, . . . ne la mararmeo. Sur la maro oni ne bezonas la bombon. Se mia filo iam ajn venos en militan zonon, la neŭtrona bombo ne apartenos al la danĝeroj kiuj minacos lin. Eble torpedoj aŭ stiritaj raketoj.

Rep.: Ĉu vi preferus, ke li estu minacota de torpedo aŭ de la neŭtrona bombo?

S. C.: Fakte mi preferus torpedon. Mi ja ĵus parolis pri la efikmaniero de la neŭtrona bombo. Torpedoj funkcias alie. Ili neniigas materialon, sed ne vivon. Torpedo sinkigas la ŝipon, tiam mia filo sur floso aŭ savboato povas savi sin kaj resti viva. Mi do, pli ŝatus, ke lia ŝipo estu atakota per torpedoj, ĉar la bombo mortigas la homojn kaj konservas la ŝipon.

Rep.: Ĉu vi konekse kun tio dum la lastaj dudek jaroj neniam pensis: Ho, Dio, kion mi inventis?

S. C.: Ne, neniam. Estas sendube la plej preciza armilo, kiun oni iam ajn inventis. Tio sonas fanfarone. Sed hazarde tio estas la vero. Io tia ĝis nun ankoraŭ ne ekzistis.

Rep.: Ĉu vi pensas, ke ekestos milito?

S. C.: Jes. Estas terure diri tion, sed mi pensas ke jes. Mi pensas, ke la batalemo estas eco de la homo. Ĉiam estis militoj, ĉefe en Eŭropo. Tio ĉiam estis tre militavida kontinento. En ĉiu milito unu aŭ ambaŭ flankoj uzis ĉiujn disponeblajn armilojn. Mi timas, ke denove estos milito, eĉ se neniu povas diri kiam, kaj ke poste oni ankaŭ uzos atomarmilojn. Nuntempe mi laboras pri defenda plano, en kiu oni bezonas nukleajn armilojn – do ankaŭ neŭtronajn bombojn – por kontraŭbatali tre grandajn armeojn, se ili volas okupi landojn kun defenda sinteno. Tiu plano antaŭvidas ankaŭ nuklearmilan barieron, kiun mi volus priskribi, pro simpleco, kiel nacian defendlinion laŭlonge de la landlimoj. Tie oni uzos iun aŭ alian formon de nuklea energio, por eviti, ke la malamiko enpenetru.

Rep.: Ĉu tiu ĉi linio troviĝas en Eŭropo?

S. C.: Mi ĉefe pensas pri Eŭropo. Tia sistemo estus kompreneble tre taŭga por la limo inter orienta kaj okcidenta Germanio, por la fera kurteno. Sed la germanoj defendas sin tre ege kontraŭ tiaj aferoj.

Rep.: Ĉu vi opinias vin sciencisto?

S. C.: Jam ne. Ne tute. Vi certe aŭdis pri la psikoanalizo kaj la subkonscio. Do, la unua libera asociado, kiu estiĝis ĉe mi – ankaŭ tio sonas strange al vi kaj viaj aŭskultantoj – estas, ke mi rigardas min kiel humaniston. Ĉu tio ne estas strange?

Rep.: Jes, sufiĉe.

S. C.: Sed mi estis sincera kiam mi elfosis tion el mia subkonscio.

Rep.: Kiel oni sentas sin, se oni okupas sin per produktado de detruaj ajoj?

S. C.: Pardonu, kiel? La neŭtrona bombo ne estas detrua armilo. Mi ne povas respondi tion al vi. Vi ne formulis bone vian demandon!

Rep.: Sed ĝi mortigas homojn!

S. C.: Malamikajn soldatojn. Tio estas neevitebla en milito. Tiel estis ĉiam. (Li iras al sia aŭto.) Pardonu, sed mi devas veturi al la laboro . . .

El „Elternhaus und Schule" n-ro 7/82.
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Alvoko al la parlamentoj

Denove aperis en Moskvo grava esperantlingva suplemento al la revuo Moscow News. Kiel n-ro 11–12 (marto 1983) aperis la alvoko de la soveta registaro „Al la parlamentoj, registaroj, politikaj partioj kaj popoloj de la mondo". La tridekpaĝa kajero krome entenas materialojn publikigitajn okaze de la 60-a datreveno de la fondiĝo de Soveta Unio. La broŝuro estas senpage ricevebla ĉe Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). USSR - 103009, Moskvo, prospekt Kalinina 14.

Paco estas pli forta

de Erich Weinert (1952)

Ni festis venkon super mondmilit'
kaj kredis, ke faŝismo estus morta,
la mond' libera de terur', ekscit',
ke daŭre regus ĉie nun spirit'
de homakordo kaj de paco forta.

Eraris ni, ĉar paco ne jam estis,
milit' ne pasis for de nia ter'.
Ĉar ord' iama estis barier',
ĉar subpremuloj vivis en liber',
militminaco al popoloj restis.

Se en la mond' plu estas koteri',
validas tie nur privilegi',
se iu povas vivi de l'profito
de alihomaj diligent' kaj ŝvito,
milito estos – malgraŭ preĝ' de vi!

El okcident' minacas nova fato;
ekscitas brulon la militdemon'
kaj provas peli fraton kontraŭ frato,
sed miskalkulas ĝi: kvazaŭ admon'
en oriento kreskas bastion'.

La paco, sian celon ne kaŝante,
fariĝas granda forto pli kaj pli:
popolon post popol' alligas ĝi,
ĉar apud ĝi, sentime ekpaŝante,
amik', socialisma homsoci'.

La malamik' esperas pri duelo,
sed forta estas nia paca front'.
Ni venkos lin per bona vivnivelo,
per loĝpalacoj altaj, ĝis ĉielo,
kaj riĉaj kampoj eĉ ĝis horizont'.

Se tamen provos iu ajn bandit'
atenci iam kontraŭ pacproceso,
li sentos jam unua ĉe agreso:
Ni estas ja pacamaj de spirit',
sed povas eĉ batali kun sukceso!

Kaj ĉiu ajn popol' al ni asistas,
en kies flago ruĝa stel' ekzistas.
Nin ja subtenas la duona mond':
De Prag' ĝis Vjetnamio ĝi konsistas
en forta, bonarmita paca rond'.

Kion ni ĵuris dum penigaj tagoj
en fideleco kaj solidarec',
batali ĉiam kontraŭ tiaj plagoj –
Pri tio pensu! Estu viaj agoj
do kontraŭ ĉiu ajn milita spec'!

Ek! Donu mortan puŝon al milit'!
Nun liberiĝu de l'regado de profit!
Pacamaj estos tiam ĉiuj ŝtatoj
kaj ĉiuj homoj iĝos ja gefratoj.
Jes, paco estu fine la merit'!

Tradukis el la germana:
Manfred Arnold

Katolikaj episkopoj de Usono kondamnas la altarmadon de Vaŝingtono:

„Ni estas kontraŭ strategia planado, kiu celas gvidebligon de nuklea milito!“

I. Kion la moralinstruo de la eklezio nuntempe postulas?

Ni troviĝas en ekstrema krizo, ĉar la nuklea milito minacas la ekziston de nia planedo. Tiu minaco estas pli pereiga ol ĉio, kion la mondo travivis iam ajn ĝis nun. Estas nek tolereble nek necese, ke ni estu kondamnitaj vivi sub tiaj cirkonstancoj. En antaŭaj tempoj la moralinstruo de la eklezio unue celis eviti militon kaj – se ĝi tamen okazis – limigi siajn sekvojn. Nuntempe la ebloj, politike kaj morale limigi nuklean militon, estas tiom malgrandegaj, ke la morala – kiel ankaŭ la medicina – tasko nur povas esti: eviti la militon. Kiel popolo ni devas rifuzi, konsideri la penson pri nuklea milito legitima. Tia rifuzo postulas ne nur novajn ideojn kaj novajn viziojn, sed ankaŭ tion, kion la evangelio nomas „konvertado de la koro".

La neado de la nuklea milito estas neceso kaj samtempe malfacila tasko . . .

Mallonge dirite, la danĝero de la nuntempa situacio estas evidenta. Sed malpli klare oni vidas aŭ rigardas la dilemon, kiamaniere malhelpi la aplikon de nukleaj armiloj, kiel taksi la fortimigon kaj kiel ekzakte difini la moralan respondecon en la atomepoko. Pro la komplekseco de la nuklea problemaro ni devas prezenti niajn argumentojn detale kaj nuancite. Sed fine nia „ne!" devas esti definitiva kaj decida.

II. Limigo de nuklea konflikto estas neverŝajna

Ekzistas nenia dubo, ke tiuj, kiuj reprezentas la eklezian tradicion de senperforteco, malakceptas nukleajn armilojn sub ĉiaj kondiĉoj. Sed ankaŭ tiuj, kiuj jesas certan legitimecon de apliko de milita potenco, konsideras la nunajn strategiojn pri nuklea milito morale malpermesataj. Pravigita apliko de milita potenco devas kaj ekzakte distingi rilate la celojn kaj ankaŭ atenti la proporciecon de la rimedoj . . . La ĉirilata literaturo kaj la eldiroj de registaraj reprezentantoj, spertaj pri la usona nuklea strategio, konvinkis nin, ke limigo de nuklea konflikto estas ege neverŝajna.

Pri la komplika demando de „limigita" nuklea milito . . . ŝajnas al ni, ke neniu oficiala eksperto povis refuti la sekvan resumon de studo de Papa Akademio de Sciencoj: „Eĉ nuklearmila atako nur kontraŭ armeaj celoj detruus tutan ŝtaton." Pro tio ni dediĉos apartan atenton al jenaj tri problemoj:

1. Milito kontraŭ la civila loĝantaro: Sub neniaj cirkonstancoj oni rajtas apliki nukleajn armilojn aŭ aliajn amasneniigilojn por detrui loĝantarajn centrojn aŭ aliajn ĉefe civilajn celojn. La papoj plurfoje kondamnis tiucelan aplikon . . . Same maltrankviliga estas alia problemo, kiu klare reliefigas la naturon de moderna milito: atako kontraŭ armeaj celoj aŭ industriaj celoj milite signifaj „nerekte", t.e. neintence rezultigus grandegajn perdojn inter la civila loĝantaro. La problemo ankoraŭ pliseveriĝas, se unu aŭ la alia flanko intence metas militajn celojn en dense loĝatajn regionojn . . . Ni konscias la disputon pri tiuj problemoj. Malgraŭ tio pro motivoj de praktika moralo ni sentas nin devigataj anonci nian rezistadon kontraŭ strategio, inkluzivanta atakojn kontraŭ celoj proksimaj al dense loĝataj regionoj. Ĉikaze la morala principo estas tute klara: La neniigo de homaj vivoj starus en nenia proporcio al la militaj celoj. Ni opinias la prezenton de tiu principo de la praktika moralo tre grava, ĉar oni lastatempe en politikaj proponoj provas pravigi atakojn kontraŭ milite gravaj industriaj celoj en loĝataj regionoj.

Krome ni kondamnas venĝobatojn, kiuj postulus la vivon de multaj homoj, kiuj neniel responsas pri la senpripensaj agoj de siaj registaroj. Tiu kondamno validas precipe ankaŭ por la apliko de venĝoarmiloj kontraŭ urbojn de la malamiko post atakado de niaj propraj urboj. Re-



El la usona ŝtato Vermont de entute 195 urboj 177 voĉdonis por haltigo de nuklearmila armado.

Foto Zentralbild

donado sub tiaj cirkonstancoj havus nenian racian aŭ moralan motivon kaj povus esti rigardata nur kiel venĝo . . .

III. Nenia pravigo por nuklea „unua bato"

2. Ekestigo de nuklea milito: Ni ne povas imagi situacion, kiu morale pravigus la intencan ekestigon de – kiel ajn limigita – nuklea milito. Ne-nukleajn atakojn far alia ŝtato oni devas respondi per aliaj ol nukleaj armiloj.

Pri tio ekzistas serioza debato. Oni diskutas en politikaj kategorioj, sed la debato havas gravajn moralajn dimensiojn. Kelkiuj opinias, ke ĉe la komenco de milito oni povus uzi nukleajn armilojn – eble en limigita nombro – nur kontraŭ militaj celoj. Fakte estas jam delonge la strategio de usonanoj kaj NATO, eble apliki nukleajn armilojn, se la NATO – armeoj en Eŭropo devus timi malvenki en milito, ĝis tiam limigita je tradiciaj armiloj . . .

Ĉu temas pri milito en Eŭropo, en partoj de Azio aŭ en Proksima Oriento aŭ pri senpera batinterŝanĝo kun interkontinentaj armiloj inter Usono kaj Sovetunio: La malfacilecoj pri limigo de la uzado de nukleaj armiloj estus enormaj . . .

Neniu povus esti certa, ke ne okazus eskalacio, eĉ se oni politike provus „limigi" tian batinterŝanĝon . . .

La danĝero radikas ne nur en la tekniko de niaj armilaj sistemoj, sed ankaŭ en la malforteco kaj pekeco de la homa socio. Ni opinias, ke la morala respondeco pri nuklea milito per neniaj raciaj politikaj celoj estas senkulpigebla.

3. Limigita nuklea milito: Oni povus konsenti pri niaj du unuaj konkludoj kaj tamen ne estus certa, ĉu nukleaj armiloj estus uzataj por venĝoagoj, por tio, kion oni nomas „limigita batinterŝanĝo". La teknika intelektularo kaj la verkoj de moralistoj esprimas pri tio diverĝajn opiniojn. Sed temas ne pri *teoria,* sed pri *efektiva* ebleco de „limigita nuklea batinterŝanĝo".

Ni komprenas, ke la strategia debato ĉipunkte ankoraŭ ne povas esti finita kun lasta decidiĝo kaj ke ĉiuj partoprenantoj devas kontentiĝi je hipotezoj pri verŝajnaj reagoj okaze de nuklea batinterŝanĝo. Ni ne provas prijuĝi la teknikan debaton. Ni informiĝis pri ĝi kaj volas starigi vicon da demandoj por esplori la aktualan signifon de la vorto „limigita" en ĉi tiu diskuto:

– Ĉu la politikistoj estus sufiĉe informitaj por scii, kio okazos ĉe nuklea batinterŝanĝo?
– Ĉu ili sub tia streĉiteco, tia tempopremo kaj nur fragmentaj informoj kapablus decidi eksterordinare precize por teni la batinterŝanĝon limigita, se tio teknike eblus?
– Ĉu la komandantoj meze de detruoj kaj konfuzo en la kazo de nuklea batinterŝanĝo povus sekvadi koncepton de „diferencita celado"? Ĉu tio entute eblas en moderna milito, kondukita per aviadiloj kaj raketoj super grandaj distancoj?
– Sciante pri akcidentoj, okazantaj eĉ en tempoj de paco, ni demandas nin: Kiun sekurecon ni havas, ke eblas eviti komputilajn erarojn dum nuklea batinterŝanĝo?
– Ĉu la nombro de viktimoj, eĉ en milito, kiun la strategoj nomas „limigita", ne estus miliona?
– Kiel „limigitaj" estus la longdaŭraj postefikoj de la radiado, de la malsatado, de socia dissplitiĝo kaj ekonomia dislokiĝo?

Tiu fasko da demandoj skeptikigas nin pri la efektiva signifo de la vorto „limigita".

el „Neues Deutschland", 10. 1. 83 · Trad.: D. Dungert

Manfred von Ardenne

Unua bato kaj rebato

De post kiam Ronald Reagan ekokupis la oficon de usona ŝtatprezidento, ĉiam pli kaj pli ofte fantomas tra la monda gazetaro la terura vorto de „nuklea unua bato".

Kiel aferon de ega graveco oni tial devas rigardi la apelon de Leonid Breĵnev al la 2-a Eksterordinara Kunveno pri Malarmado de UN, faritan la 15-an de junio 1982 kun la solena deklaro, ke Sovetunio ne ekuzos kiel unua nukleajn armilojn. Ĉiuj aliaj ŝtatoj posedantaj nukleajn armilojn sentu ankaŭ la instigon transdoni al la mondpubliko senprokraste la saman sindevigon.

La aktuala kaŭzo, ke mi malgraŭ la deklaro de Breĵnev volas ĉi tie diri kelkajn vortojn pri tiu ĉi temo, estas certaj senvalorigaj esprimoj (kiel „Agitado!" aŭ „neserioza opinio") uzitaj en iuj okcidentaj amaskomunikiloj.

Kiel iama direktoro de la sovetia Instituto de industria fendado de izotopoj, mi konatiĝis en la jaroj 1945 ĝis 1955 en la teknikaj sovetoj kaj dum multaj personaj interparoladoj kun la politikistoj kaj sciencistoj fake kompetentaj pri nuklea tekniko kaj ekkonis iliajn opiniojn. El tiuj kaj pliaj renkontiĝoj post mia reveno en GDR-on mi de longe jam ĉerpis la firman konvinkiĝon, ke nuklea unua bato neniam ekiros flanke de Sovetunio! En tiuj interparoladoj oni plurfoje atentigis min, ke la ekigo de nuklea infero starus en kontraŭdiro kun la sovetia ideologio, ĉar en ĉiu kazo la amasoj de laboruloj, do la klasfratoj kaj iliaj familioj estus la rektaj viktimoj de tia infero.

Komence de aŭgusto 1956, do antaŭ 26 jaroj, mi pruvis en parolado dum manifestacio en Dresden, kial nuklea unua bato ne malebligos la rebaton kontraŭ la atakanton (instalo de eksplokapoj en balistikaj interkontinentaj raketoj, sekurigitaj ekpafej-bazoj ktp.). En nia instituta arkivo troviĝas 12 eltranĉaĵoj el gazetoj de FRG de la 8-a ĝis 10-a de aŭgusto 1956, en kiuj oni referas pri tiu ĉi averto. Nur iomete pli poste la tiama federacia kanceliero Adenauer uzis en parolado la saman formuladon pri la neebleco malebligi la rebaton kontraŭ la atakanton, tio signifas, ke nia dresdena taksado eniris en la politikan kalkuladon kiel realaĵo.

Kun granda emfazo oni devas konstati, ke tiu realaĵo ankaŭ hodiaŭ post kvarona jarcento plu ekzistas kun la sama akreco kaj kontribuas sensanĝe al la stabiligo de la nuklea ekvilibro. Tio validas malgraŭ la alte perfektigitaj teknikoj de kontraŭraketoj, de radaravertado, de la optikaj observoj per satelitoj ktp., kies kostoj atingas grandecon de centoj da miliardoj.

Unua bato aŭtomate elvokos „interkontinentan" nuklean rebaton kontraŭ la atakanton, sed neniam malebligos ĝin. La teknikaj kaŭzoj por tiu ĉi taksado estas jenaj:

1. Parto de ekpafej-bazoj troviĝas sur submarŝipoj, ŝipoj aŭ ĉe aliaj trupunuoj kun konstanta lokŝanĝo aŭ totala kamuflado. 2. Dum la rebato oni devas kalkuli kun varianto de samtempa eksplodigo de punktreto kun H-bomboj super la teritorio de la kontraŭulo, kiel mi priskribis tion en miaj enkondukaj vortoj al la germanlingva eldono de la libro de Linus Pauling „Vivo aŭ morto en atomepoko". Laŭ la fizika „principo de samtempeco" la alflugo de multaj raketoj konfuzus la sistemojn de perradara lokalizado kaj de la kontraŭraketoj, kaj la adicio de la varmradiado sur la tersurfaco multobligus la detruigan efekton.

La krima ordono al nuklea unua bato tial signifus sinmortigon.

Nuklea militkonflikto ne estas limigebla. Ĉiuj malaj asertoj estas utopio! Tiuj, kiuj agitas parolante pri „limigo", scias precize, ke ili ne diras la veron!

Ni esprimu hodiaŭ kaj ĝuste hodiaŭ tiujn detalojn tute senkaŝe, ĉefe pro la jena evento. En la lasta tempo ni spertis, ke la fortoj por la defendo de mondpaco ege kreskis ankaŭ en Usono kaj en okcidenta Eŭropo. Per ĉiuj eblecoj de la spirito tiuj strebadoj estu subtenataj. Sur tiu ĉi linio troviĝas la klarigoj pri la vera efiko de la nuntempaj strategiaj nukleaj armiloj, sed ankaŭ la memorigo pri la fizikaj faktoj, kiujn mi prezentis la 23-an de aprilo 1956 antaŭ la Nacia Konsilantaro en Berlin, por atentigi pri la ebleco utiligi la grandegajn tutmondajn stokojn de nukleaj eksplodaĵoj por pacaj celoj, tio signifas por produktado de energio en atomenergiaj centraloj.

Nur la armadaj konzernoj profitas el la daŭrigo de la ĉiam pli multekosta imperiisma pluarmado; la aliaj sekvoj de la sensencaj elspezoj por la plurarmado estas senlaboreco, krizoj kaj sentebla malaltigo de la vivnivelo. Konsidere al tia mondvasta kreskado de la minaco kontraŭ la vivo kaj ekzistado, al tiom da sensenceco kaj morale-etika degenerado estas antaŭvidebla plua lavangsimile kreskanta kontraŭreago de la popoloj.

El „Weltbühne", n-ro 29/1982
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Grava eldonaĵo porpaca

En Sovetunio aperis tre grava esperantlingva broŝuro pri aktualaj pacproblemoj „Defendi la pacon, preventi nuklean militon. Proponoj de Soveta Unio en la Dua Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado". Tiun pure presitan 75-paĝan broŝureton eldonis APN laŭ mendo de Unio de Sovetaj Societoj pri Amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj (SSOD). La broŝuro entenas salutmesaĝon de L. Breĵnev kaj la gravan paroladon de A. Gromyko antaŭ la ĝenerala asembleo pri malarmado kaj gazetar-konferencan materialon.

Tre bonvena materialo, kiu tre helpos al la esperantistaj pacagantoj. Havebla ĉe Novosti, USSR-107082, Moskva, Bolŝaja Poĉtovaja 7, Izdatelstvo APN.

Mendu la broŝuron kaj skribu en Esperanto al la indikita adreso, kie oni komprenas la internacian lingvon.

La 31-an de majo 1982 la „New York Times" malkovris sekretan studaĵon kun la titolo „Gvidlinioj de la defendado por la budĝetaj jaroj 1984–1988". „Los Angeles Times" prezentis la 15-an de aŭgusto 1982 pluajn detalojn. Tiu gvidlinia dokumento ampleksanta 125 paĝojn dume estas transdonita al la Nacia Konsilantaro pri Sekureco de Usono kaj nun sankciigota definitive de prezidento Reagan, por anstataŭi la „Direktivon 59" de la iama prezidento Carter.
En redakcia artikolo la „New York Times" skribis, ke la studaĵo enhavas

„la bazajn opiniojn de Weinberger kaj de lia (tiama; redakcio) anstataŭanto, Sovetunio. Laŭ indikoj de „Los Angeles Times" de aŭgusto 1982 oni planas por tio daŭron ĝis ses monatoj.

La aventura, senrespondeca kaj cinika sinteno de la Reagan-administracio rilate al atoma milito estis plurfoje eldirita publike fare de ĝiaj gvidaj reprezentantoj kaj kunlaborantoj. E. Rostow, ĉefo de la Oficejo por Armadkontrolo kaj Malarmado de la usona registaro respondis la demandon ĉu iu lando povus travivi atoman militon, jene:

„Japanio post la nuklea atako ja ne nur transvivis, sed eĉ vere ekfloris."
(Citita laŭ „Die Zeit", Hamburg, 30. 4. 1982)

malkaŝe kaj masive la eblecon gvidadi kaj gajni nuklean militon.
Por krei armilteknikan fundamenton servantan al la realigo de tia koncepto, la Reagan-administracio praktikas la plej ampleksan akceladon de la strategia armado de Usono de post la dua mondmilito.
La enkonduko de tielnomataj senarmigaj kaj ekbataj armiloj (MX-raketoj, Trident II, Pershing 2, bombaviadiloj B 1, kosmaj armiloj, kemiaj kaj neŭtronaj armiloj, kroz-misiloj) formas la kernon de tiu ĉi akcelado. Eksterordinaran signifon oni atribuas al la mezdistancaj raketoj Pershing 2, de kiuj, laŭ la brusela

„Pentagon-studaĵo 1984–1988" – instrukcio por totala mondmilito

Frank C. Carlucci, same kiel de la ĉefoj de la komuna stabo, de kompetentaj batalkomandantoj, politikaj ekspertoj pri planado en civila sfero kaj de teknikaj ekspertoj."
("New York Times", 31. 5. 1982)

La studaĵo formu la bazon por fiksi la armadbudĝeton ĝis 1988.
La Pentagon-studaĵo direktas sian ĉefan atakon kontraŭ USSR-on kaj kun ĝi aliancitajn ŝtatojn. La FRG-gazeto „Die Welt" komentis tiun celon de la dokumento jene:

„La nova ‚instrukcio pri defendado' ... enhavas esence planojn por reala milita situacio kaj esperota venko super Sovetunio en ĉiuj sferoj: de ribeloj, kiujn oni povas instigi aŭ el kiuj oni povas profiti, preter strategio de pli forta premo sur la sovetian ekonomion, konvencia militado (kun eblaj kontraŭofensivoj al Kubo, Vjetnamio, Libio aŭ Norda Koreio), subtenado de amikiĝintaj registaroj, kontinua enpenetrado en la kosmon, ĝis ekspansia atoma milito."
(„Die Welt", 1. 6. 1982)

Ĉefa orientiĝo: Preparo de tutmonda nuklea milito

Laŭ la Pentagon-studaĵo la giganta superarmado de Usono koncentriĝu al preparoj por „longdaŭra atoma milito" kun Post kiam prezidento Reagan mem diris, en oktobro 1981, ke li povas imagi al si nuklean militon limigitan je Eŭropo (komparu „Frankfurter Rundschau", 21. 10. 1981), la nova Pentagon-studaĵo superas ege le koncepton de „limigita atoma milito".
La nova studaĵo aplikas nun

„ankaŭ al nuklea sfero la ideon de Weinberger pri tutmonda militado en la konvencia sfero prezentitan de li en lia lasta jarraporto al la kongreso."
(„Die Welt", 1. 6. 1982)

En la Pentagon-studaĵo oni skribas, ke atommilita strategio

„baziĝu sur tiel nomata senkapigo, tio estas batoj kontraŭ la politikan kaj armean gvidantarojn kaj ankaŭ kontraŭ la komunikilojn de Sovetunio."
Celo estu, „senefikigi la tutan sovetian armean kaj politikan potencstrukturon (kaj tiun de la sovetiaj aliancanoj). Krom tio oni postulas nepran detruadon de la nukleaj kaj konvenciaj trupoj kaj ankaŭ de industriaj konstruaĵoj decidigaj por armado".
La usonaj nukleaj trupoj devus „superregi kaj esti kapablaj ... devigi Sovetunion ke ĝi strebu al kiel eble plej rapida finigo de malamikecaj operacioj je kondiĉoj, favoraj por Usono".
(„New York Times", 31. 5. 1982)

Per tiaj konceptoj oni celas propagandi NATO-decido de la 12-a de decembro 1979, estu lokigotaj 108 ekde fino de 1983 en FRG. Sed ĉar la produktadkvanto por Pershing 2 sumiĝas je preskaŭ 920 pecoj ŝajnas esti antaŭplanita posta ankoraŭ pli vasta lokigado en okcidenta Eŭropo kaj en aliaj regionoj de la mondo kiel la Proksima Oriento kaj la Malproksima Oriento.
Dum masiva atoma atako kontraŭ centraj gvidaj establaĵoj en la okcidenta Sovetunio tiuj ĉi altprecizaj armiloj kun atingopovo ĝis 2 500 km kaj kun po tri nukleaj eksplodkapoj estu kapablaj – ĉe flugodaŭro de kvar ĝis ses minutoj – certigi al la agresanto jenan tempan antaŭecon, kiun la strategiaj raketoj lokigitaj en Usono kaj sur la oceanoj (flugdaŭro proksimume 30 minutojn) kaj la kroz-misiloj (flugdaŭro ĝis kelkaj horoj) ne povas atingi, sekve de kio ili trafus nur malplenajn silojn, flughavenojn ktp.
Tiu ĉi ŝanĝo en la armiĝo de la usonaj strategiaj trupoj, t.e. ilia ekipado per ekbataj armiloj, kompletiĝas per programoj pri „transvivkapablaj komunikadaj sistemoj", per kiuj estu gvidotaj la trupoj dum „pli longdaŭra" atoma milito.
Aldone oni konsideras pri balistika kontraŭraketa sistemo kaj en la Reagan-administracio oni malkaŝe parolas pri la ĉesigo de la interkonsento kun Sovetunio pri limigo de raketdefenda armado el la jaro 1972.
La Pentagon-studaĵo postulas krom tio la

„Kreadon de prototipoj de armilsistemoj lokigotaj en la kosmo, inkluzive de tiaj, kiuj kapablus detrui sovetiajn satelitojn."
(„International Herald Tribune", 5./6. 6. 1982)

Ĝuste tio estas speciala aspekto de ofensivaj nukleaj militpreparoj de Usono, al kiu usonaj militistoj atribuas eksterordinaran signifon.

Konvencia armado kaj preparo al la „kaŝita milito"

Krom en la strategia sfero la Pentagon-studaĵo postulas fakte ankaŭ en ĉiuj aliaj armeaj sferoj drastan akceladon de la superarmado. La konvenciaj trupoj de Usono kune kun la aliaj NATO-ŝtatoj
„estu kapablaj minaci sovetiajn interesojn, inter ili ankaŭ la teritorion de Sovetunio mem."
(„New York Times", 31. 5. 1982)

Speciala fokuso de la konvencia militplanado estas Eŭropo. La usonaj aer- kaj martransportaj kapacitoj estu tiom pliperfektigotaj, ke ili
„estus kapablaj transporti al Eŭropo ses armedivizioјn, duonan divizion de marinfanterio kaj aereskadron kaj ankaŭ 60 taktikajn eskadrojn de ĉasaviadiloj dum nur 10 tagoj" (samloke).

Tio signifus duobligon de la nuntempaj usonaj trupoj kaj triobligon de la usonaj aertrupoj en okcidenta Eŭropo. Grava antaŭkondiĉo por tia plifortigo en kazo de agresado jam estas kreata: la 15-an de aprilo 1982 Usono kaj la Federacia Respubliko Germanio subskribis tielnomatan interkonsenton pri subtenado, kiu antaŭvidas la anticipan lokigadon de la tuta peza armilaro de ses usonaj divizioj en FRG, tiel ke en „ekstrema kazo" oni bezonus nur altransporti el Usono ankoraŭ la apartenantajn al ili trupojn. FRG devoligas sin soldatigi ankoraŭ 93 000 rezervistojn por „subteni" tian operacion. Krom tio la Pentagon-studaĵo vidas klaran ĉefpunkton en la evidenta plifortigo de la „trupoj por specialaj batalaplikoj" en regionoj,
„kie la apliko de konvenciaj trupoj estus tro frua, netaŭga aŭ nerealigebla – ĉefe en orienta Eŭropo" (samloke).

„Specialaj batalaplikoj", tiel komentas „New York Times", estas
„eŭfemismo por gerilanoj, sabotistoj, komandtrupoj kaj similaj nekonvenciaj trupunuoj".

Temas do pri ega rangaltiĝo atribuata al la tielnomata kaŝita militgvidado en internlando de la kontraŭulo – ĉefe por terorigi la civilan loĝantaron – kiel rimedo de la usona militgvidado.
Laŭ la Pentagon-studaĵo la ekbatalpreteco kaj la stokoj de armiloj kaj municio por la konvenciaj usonaj armetrupoj estu entute plialtigotaj. Por tiu celo oni postulas modernigon kaj plivastigadon de la usona armilara industrio.

Ekonomia milito kaj „mortarmado"

La milita konfronta kurso kontraŭ la socialismaj landoj, postulata en la Pentagon-studaĵo, estu flankota de aliaj sferoj:
„Antaŭvidante kiel koncepton por pacaj tempoj kompletigon de la milita strategio, la gvidlinio akcentas, ke Usono kaj ĝiaj aliancanoj deklaru al Sovetunio la ekonomian kaj teknikan militon."
(„New York Times", 31. 5. 1982)

Samtempe oni spekulas altrudi al Sovetunio ekonomie ruinigan vetarmadon:
„Usono evoluigu tiajn armilojn, al kiuj Sovetunio nur malfacile povos ion kontraŭstarigi..., kiuj malfermas novajn sferojn de pli forta milita konkurenco kaj malvalorigas la ĝisnunajn sovetiajn investaĵojn."
(samloke)

Tiuj ĉi imagoj estas entute parto el la celoj de la Reagan-administracio,
„neniigi la ekonomian forton de Sovetunio"
(samloke).

La Pentagon-studaĵo insistas pri la kreado de armiloj,
„kiuj kaŭzas relative altajn kostojn"
(samloke).

Ĉi tie renaskiĝas la koncepto pri la „mortarmado" de la socialismo, kiu jam en la 50aj kaj 60aj jaroj fiaskis – malgraŭ la tiama granda ekonomia kaj teknologia postrestado de la socialismaj ŝtatoj kompare kun gvidantaj NATO-ŝtatoj. Hodiaŭ tia celo estas des pli sensanca.

Kontraŭ armadkontrolo kaj malarmado

Samtempe estas evidente, ke per tio la ŝancoj por armadkontrolo, armadlimigo kaj malarmado ankoraŭ pli malboniĝas, ĉar por la nuntempa planado de Pentagon estas tute neakceptebla la principo de militara egaleco inter Oriento kaj Okcidento, kiu samtempe estu bazo de ĉiuj ajn traktadoj inter Oriento kaj Okcidento pri demandoj de armadlimigo. La realigado de la principoj resumitaj en la Pentagon-studaĵo postulas ja senkaŝe kiel fundamentan antaŭkondiĉon – kiel conditio sine qua non – ampleksan militaran superecon, por teni kiel eble plej malalta la memriskon de Usono ĉe militaventuroj kaj grandstilaj agresoj.

Tial „Frankfurter Allgemeine" rimarkigas (1. 6. 1982) rilate al la Pentagon-studaĵo jenan:
„Celo de la planado estas, esti pli forta ol Sovetunio en la sfero de atomaj kaj konvenciaj armiloj..."

Ankoraŭ pli klare esprimis sin pri la demando de sampareco aŭ supereco C. S. Gray, skribinte,
„ke vera alpareco en la sfero de armea potenco... kondukus al lamigo de la okcidenta politiko"
(C. S. Gray, La ideo de strategia supereco..., p. 1251).
Ĉe sampareco Usono ne estus „kapabla..., superregi en la proceso de nuklea akcelado..."
(samloke, p. 1252).

Evidente, ke la premo de la internusona opozicio kaj la plifortiĝanta kritiko el aliaj NATO-ŝtatoj, rezultigis buŝajn klarigojn de la Reagan-administracio pri preteco al malarmado, sed ilia seriozeco estas kontestata eĉ mem en Usono.
La faktan, finfine rifuzeman sintenon de la Reagan-administracio al armadlimigo kaj malarmado klare esprimis la usona ŝtata subsekretario M. Palmer, kiam li la 16an de junio 1982 en Bruselo deklaris:
La NATO-ŝtatoj ne rajtus „permesi, ke la armadkontrolo denove fariĝu fokuso de la rilatoj inter Oriento kaj Okcidento".
(Wireless-Bulletin from Washington, 16. 6. 1982)

Konekse kun tio C. S. Gray diris, ke
„armadkontrolo – en plej bona kazo – povus montriĝi kiel sensignifa por la nuklea planado de Usono, dum ĝi – en plej malbona kazo – povus kaŭzi seriozan obstaklon por la aplikplanado..."
Tial Usono „ne serĉu interkonsenton kun USSR pri vera ekvilibro ĉe strategiaj aŭ eŭrostrategiaj nukleaj potencoj, kiu malebligus la ĉi tie pritraktatan de facto – superecon..."
(C. S. Gray, La ideo de strategia supereco..., p. 1251/1252)

Karakteriza ankaŭ estas, kion la ĉefa komisiito de Usono P. Nitze, klarigis jam antaŭ certa tempo okaze de la intertraktadoj en Ĝenevo pri nuklea armado en Eŭropo:
„seriozaj intertraktadoj pri armadkontrolo povos okazi nur tiam, post kiam ni kompletigis niajn fortojn". Je la demando kiam tio estos, li respondis: „Post 10 jaroj."
(Los Angeles Times, 28. 9. 1981)

Laŭ la Pentagon-studaĵo ĝis tiam la skizitaj en ĝi frenezaj armadplanoj estu plejparte realigitaj kaj per tio finfine kreita la bazo por nova „pax americana".

La nukleaj planoj de Reagan povas neniigi la homaron

La Pentagon-studaĵo ankoraŭ ne estas subskribita de la usona prezidento kaj tial oficiale ne valida. Sed konsidere al la kurso de militista kontraŭkomunismo kaj kontraŭsovetismo, kiun sekvas la Reagan-administracio en ĉiuj sferoj de sia politiko – plua plifortigo de vetarmado, ideologia kontraŭrevolucio kaj psikologia milito, komercaj sankcioj, ekscito kaj disvastigado de regionaj konfliktoj, finigo de kontraktrilatoj kaj rifuzo je konstruaj dialogoj – oni devas kalkuli kun tio, ke la subskribo okazos en antaŭvidebla tempo.
La politiko de la Reagan-administracio, kiu strebas atingi la regantan rolon en la mondo, eĉ je la prezo de atoma milito, fariĝis tial mondvasta danĝero, kiu ne havis similecon ĝis nun en la historio de la homaro. Pli akre ol kiam ajn antaŭe – eĉ post la neforgesebla totala militgvidado de la germana faŝismo – montriĝas, ke nuntempe la defendado de la mondpaco estas la plej grava tasko ĉe la formado de internaciaj rilatoj. Ankoraŭ pli: La demando pri paco aŭ milito estas hodiaŭ la demando pri vivo aŭ morto por la tuta homaro.
Konsidere al tiuj monstraj minacoj, Sovetunio kaj la aliaj socialismaj ŝtatoj, la mondvasta pacmovado, multnombraj demokratoj kaj ekleziaj grupoj pliobligas la batalon por la konservado de la mondpaco kaj la sekureco de la popoloj. En tiu ĉi danĝera situacio, per sia rezigno je unua ekuzo de nukleaj armiloj, USSR denove antaŭ la tuta mondo deklaris sian pretecon entrepreni ĉion eblan siaflanke por forigi la danĝeron de atoma milito, por la finigo de vetarmado, por malstreĉiĝo, malarmado kaj paca kunlaboro de la popoloj.

El „Dokumentarische Information", Panorama DDR, 2-XI-88/2. 6.
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Usona superarmado por la nuklea „unua bato"

Armilsistemoj, starigotaj ĝis 1990:
- Starigo de novaj nukleaj armilsistemoj de meza atingodistanco en okcidenta Eŭropo: Per la starigo de minimume 108 mezdistancaj raketoj „Pershing 2" (atingodistanco 2 500 km, varia nuklea batalkapo ĝis 50 kt kun preciza direkta mekanismo, ebla plurparta eksploda kapo) kaj de minimume 464 sistemoj de raketoj sur surteraj veturiloj (atingodistanco 2 500 km, neregula flugvojo, nuklea batalkapo de 200 kt), planata ekde 1983, oni volas krei la eblecon por nukleaj „unuaj batoj" de sur la okcidenteŭropa teritorio.
- Raketo-submarŝipoj „Trident":
  La jam ekzistantajn „Ohio" sekvu ĝis 1990 12 submarŝipoj de tiu ĉi tipo, armotaj unue per po 24 raketoj „Trident 1" (C 4) (atingodistanco 7 400 km, 8 nukleaj eksplodaj kapoj de po 100 kt) kaj poste per la „Trident 2" (D 5).
- Interkontinentaj balistikaj raketoj „MX":
  Oni preparas la starigon de komence 100 „MX"-raketoj (atingodistanco 11 000 km, 10 precizaj eksplodaj kapoj ĝis po 600 kt), destinataj por la nuklea „unua bato".
- Balistika raketo „Trident 2" (D 5):
  Temas pri sistemo por la starigo sur strategiaj submarŝipoj de la „Ohio"-serio, komparebla en sia aplikebleco kun la „MX"-raketo (atingodistanco 11 000 km, 14 precizaj eksplodaj kapoj de po 150 kt).
- Armado de la strategia bombaviadilaro per „Cruise Missile":
  Aldone al la jam pli frue planita armado de 172 bombaviadiloj „B 52 G" per „Cruise Missile" oni planas armi la strategiajn bombaviadilojn „B 52 H" (nuntempe 96) per „ALCM-B"-raketoj.
- Nova strategia bombaviadilo „B 1":
  Ĝis 1986 oni planas starigi la unuan blokon (15 aviadiloj) de „B 1B" kun po 30 raketoj. „B 1B" estas la pluevoluigo de la projekto de interkontinenta supersona bombaviadilo „B 1" (atingodistanco 9 800 km, utiliga ŝarĝo 34 000 kg).
- Strategia superbombaviadilo „Stealth":
  Produktado de interkontinenta supersona bombaviadilo, kiu per la nuntempaj sistemoj de aerdefendado estas nek trovebla nek kontraŭbatalebla kaj kiu permesu surprizajn nuklearmilajn atakojn de plej alta precizeco. En la 90-aj jaroj oni intencas anstataŭi la „B 52"-bombaviadilojn per 150 tiaj sistemoj.

El „Horizont", n-ro 3/1983
Trad.: D. Dungert

Pacmarŝo en Italio, de Parugia al Assisi (1981).

Foto Zentralbild



Aperis la Politika Deklaro

Ĉeĥa Esperanto-Asocio aperigis en esperanta traduko de Vladimir Samodaj (laŭ la rusa originalo) la Politikan Deklaron de la ŝtatoj-anoj de Varsovia Kontrakto, kiu estis akceptita la 5an de januaro 1983. La broŝuro estas senpage havebla ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Ĉs - 110 01 Praha 1, Jilská 10.

Minacata biosfero

Por ekzakte determini, kiomgrade militoj damaĝas la biosferon, oni devas entrepreni specialajn sciencajn esplorojn. Sed jam nun oni disponas pri materialoj, kiuj ilustras la sekvojn de militagoj sur la vegetaĵaron, la faŭnon kaj la biotopojn entute.
La areo de ekobiologiaj sistemoj kaj la biologiaj provizoj estas limigitaj. Konatas, ke la vegetaĵaro fine ja estas la bazo por nutraĵoj kaj oksigeno kaj konsistigas la vivspacon por ĉiuj vivaĵoj. La arbaroj konsistigas 86 % de la biomaso de la tuta vegetaĵaro de la tero.
Dum la Granda Patrolanda Milito en Sovetunio 20 milionoj da hektaroj de arbaro estis plene senarbigitaj aŭ damaĝitaj. En Blankrusio la arbaro antaŭ 100 jaroj konsistigis 50 % de la tuta teritorio, sed pro la militsekvoj la arbara areo malgrandiĝis ĝis 1926 je 25,7 % kaj ĝis 1945 eĉ je 21,5 % de la origina amplekso.
Dum la milito en Vjetnamio Usono plenintence neniigis la ekologian sistemon. De 1961 ĝis 1973 ili plene neniigis per apliko de herbicidoj 568 000 hektarojn de arbaro kaj forte damaĝis 5,6 milionojn da hektaroj. 364 000 hektaroj da grenkampoj estis dezertigitaj. La amasa neniigo de arbaroj kaŭze de la militefikoj signifas la detruon de unu el la plej gravaj komponaĵoj kaj reguliloj de la biosfero kaj ju pli da amasneniigiloj estas produktataj, des pli granda estos la amplekso de la detruoj en la kazo de ilia apliko.
Militaj operacioj ege damaĝas la vegetaĵaron. Jam en la antikveco oni neniigis agrarkulturojn kaj detruis irigaciajn sistemojn por forpreni la ekzistobazon de la kontraŭulo. La asiriaj militistoj dehakis ĉiujn daktilpalmojn, kiuj servis kiel nutraĵbazoj. La germanaj faŝistoj aplikis en la okupitaj sovetaj teritorioj, el kiuj antaŭ la milito venis 39 % de la tuta greno kaj 84 % de la tuta sukerproduktado de Sovetunio, la metodon de bruligita tero.
Atommilito neniigus la tutan vivon sur areo de multaj milionoj da kvadrataj kilometroj. Konatas, ke kultivitaj plantoj estas aparte neimunaj kontraŭ radioaktiva radiado. Okaze de nukleaj eksplodoj ne difektitaj plantoj akceptus radionuklidojn kaj pro tio ne plu estus uzeblaj kiel nutraĵoj. La vegetaĵaro spertus kaosajn mutaciojn.
Eĉ ne konsiderante la rektan neniigon de la vegetaĵaro, militaj operacioj plimalbonigas la produktivecon de la tero. Por la konstruado de militaj instalaĵoj oni dum du mondmilitoj fosturnis kelkajn kubajn kilometrojn da tero. Tranĉeoj, remparoj kaj bombkrateroj dum multaj jardekoj cikatrigas la pejzaĝon, akcelas la erozion de la grundo kaj estas forigeblaj nur per plej grandaj penoj. Malnovaj defendremparoj, konstruitaj antaŭ jarcentoj, videblas ĝis hodiaŭ.
Militaj operacioj detruas aŭ ŝanĝas la akvo-etaton de la regionoj, en kiuj okazis la operacioj. En la Granda Patrolanda Milito en Ukrainio la akvo-areo por fiŝbredado reduktiĝis je 60 %.
Kiel sekvo de la detruado de irigaciaj sistemoj en la milito kaj en tranĉeoj, bombkrateroj kaj keloj de detruitaj domoj kolektiĝis akvo, kio kaŭzis fortan kreskon de la kulopopulacioj. Pro tio plioftiĝis malario-malsaniĝoj. En suda Vjetnamio la milito postlasis 10 milio-



de Nikolaj Smirnov (Moskvo) [1]

nojn da bombkrateroj, el kiuj la plej multaj entenas akvon.
Al la multspecaj ŝanĝiĝoj de la biosfero en milito apartenas ankaŭ la minigo de ter- kaj akvoareoj kaj la amasiĝo de neeksploditaj pafaĵoj kaj bomboj. Ankoraŭ longan tempon post la milito tiaj zonoj estas danĝeraj por kamplaboristoj kaj arbaristoj. En Vjetnamio la kultivado de centoj da kvadrataj kilometroj da kampoj ne eblas pro ne eksploditaj bomboj kaj minoj.
Ĉe Sevastopolo ankoraŭ hodiaŭ, pli ol 35 jarojn post la fino de la milito, miloj da minoj kaj pafaĵoj estas elterigataj. Laŭ informoj de la gazeto „Slava Sevastopolja" oni neniigis de 1970 ĝis 1973 15 000 kaj en 1975 2 406 ege eksplodemajn pafaĵojn. De 1971 ĝis 1977 eksplodanta municio vundis 51 homojn, el kiuj 17 lernantoj kaj 3 plenkreskuloj mortis.
Militaj konfliktoj malhelpas internaciajn agadojn por kontraŭbatali la malutilajn bestojn en la agrokulturo. Tiel en 1977/78 en orienta Afriko okazis ĝis tiam tiagrade nekonata invado de lokustoj, ĉar dum la somalia-etiopia konflikto en la Ogaden-regiono efika batalo kontraŭ la tie generantaj lokustoj ne eblis. Militaj operacioj en diversaj afrikaj landoj malhelpis la batalon kontraŭ la glosino (ceceo). Grandaj danĝeroj ligiĝas kun la produktado, elprovado kaj deponado de nukleaj armiloj. Okaze de atoma konflikto sur grandega teritorio mortus ne nur homoj, sed ankaŭ mamuloj kaj birdoj, t.e. bestoj, kiuj havas unuarangan signifon por la homo. Aldoniĝas la sekvoj de la geneza difektigo, kaŭzita de la disvastiĝanta radioaktiva „fall-out". Laŭ informoj de SIPRI (Stokholma Internacia Pacesplora Instituto) dum pacaj tempoj ĝenerale ĉiun trian monaton okazas unu akcidento en konekso kun nukleaj armiloj. Malgraŭ specialaj antaŭzorgaj rimedoj en Hanford (Usono) de 1958 ĝis 1973 16-foje okazis perdo de nuklea materialo. Se radionuklidoj amasiĝas en plantoj, okazas difektoj en la metabolo de tiuj bestoj, kiuj nutras sin per ĉi tiuj plantoj, ekestas danĝeraj tumoroj kaj aperas korpaj misformoj pro difektoj en la embrio-evoluo. Granda milita konflikto havus mondvastajn sekvojn por la ĉefaj komponaĵoj kaj reguligaj mekanismoj de la biosfero. Elirante de la trafitaj zonoj la difektigoj kaj malpurigoj de la biosfero per migrado de bestoj, Aero- kaj akvofluado iom post iom disvastiĝus. Interkontinentaj transigoj per tiuj fluoj okazas en malpli ol tri monatoj.
La militelspezoj estas multcentfoje pli grandaj ol la sumoj, kiuj estus necesaj por solvi la mondvastajn medicinajn-biologiajn kaj industriajn problemojn. Militagoj kaj ties preparoj aldone malakcelas la solvon de tiuj problemoj.
Pro tio ege necesas efikaj paŝoj por malhelpi militan konflikton, kiu kaŭzus biologian katastrofon.

[1]) La aŭtoro estas doktoro pri biologiaj sciencoj kaj eksperto sur la fako de hidrobiologio kaj zoologio. Li apartenas al la Scienca Konsilio pri problemoj de la biosfero en la Akademio de Sciencoj de USSR.

El „Weltbühne", n-ro 26/1981,
trad.: D. Dungert

Iama fruktplantejo en Vjetnamio post kemia bombado en la jaro 1969 (provinco Binh Thuan). Ankoraŭ jardekoj necesas por forigi la sekvojn de la kemia milito.



Robert Muller, Vica ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

Paca kaj prospera mondo – celo de ĉia klerigo kaj edukado

1. Enkonduko

La plej atentoveka karakterizaĵo de la pasintaj jaroj estas, ke de post la lasta mondmilito la homaro eniĝis en tute novan, historian epokon, eble eĉ evoluon. Dum tiu tempo la homo draste antaŭenŝovis sin ĝis en la senfine granda kaj senfine malgranda. En la pasintaj 30 jaroj la scienco povis registri pli grandajn progresojn ol en la tuta antaŭa historio de la homaro.
La industria revolucio kaj ĝiaj plej novaj sciencaj-teknikaj atingoj havas vastajn sekvojn por la homaro. La unua efiko estis senekzempla pliboniĝo de la vivkondiĉoj sur nia planedo, kiun ĉiuj popoloj sentas iom post iom, kvankam ekzistas bedaŭrindaj misproporcioj kaj prokrastoj.
La atendebla vivodaŭro pligrandiĝis kaj troviĝas ĉe pli ol 70 jaroj en multaj bonstataj socioj. Eĉ en Hindujo la vivatendo plialtiĝis dum dudek jaroj de 40 al 50 jaroj. Grandaj epidemioj, kiuj trafis la homaron ankoraŭ antaŭ ne tro longa tempo, estas ekstermitaj, kaj retroiraj tendencoj estas registreblaj pri multaj malsanoj. Grandegaj fortostreĉoj estis faritaj por forigi la restantajn ĉefajn kaŭzojn de frua morto. Tiel la mortokvanto malpliiĝis en la mondo de 17 el 1 000 en la jaroj 1950 ĝis 1955 al 13 el 1 000 en la jaroj 1965 ĝis 1977. La mondo kapablas aldone nutri ĉiusemajne pli ol unu milionon da homoj. En la pasintaj 20 jaroj la nombro da homoj scipovantaj legi kaj skribi kreskis je pli ol 600 milionoj.
Por la bezono de la loĝantaro oni disponigas pli kaj pli multe da varoj. Ekzemple en Usono por unu loĝanto kun averaĝa atendebla vivodaŭro oni bezonas 212 milionojn da litroj da akvo, 140 000 litrojn da benzino, 5,5 tunojn da viando kaj 9 tunojn da lakto kaj butero. Male, en la malpli riĉaj partoj de la mondo oni konsumas nur onon de ĉio ĉi. Sed ankaŭ tie kreskas la kvanto da varoj, kiujn oni disponigas por ĉiu unuopa. La scienca-teknika revolucio, kiu komenciĝis antaŭ 200 jaroj, etendiĝis al la plej multaj kontinentoj kaj ampleksos nian tutan planedon en ne tro fora estonteco.

2. Grandega kresko de loĝantaro kaj industrio

Per tio samtempe komenciĝis tute nova periodo en la mondhistorio, nome la tempo de enorme akceliĝanta kreskado de la loĝantaro. Malpli altaj mortokvantoj kaj pli longa kaj pli bona vivo por la unuopulo estas la kaŭzoj por la akceliĝanta kreskado de la homaro.
La nombro de loĝantoj sur nia planedo kreskis de 2,5 miliardoj en la jaro 1951, kiam la unuaj statistikoj de UN estis publikigitaj, al 4,5 miliardoj en la jaro 1980. En jaro 2000 ni estos pli multe ol 6 miliardoj da homoj, kaj infano, kiu naskiĝas hodiaŭ, povus vivi en la aĝo de 60 jaroj en mondo kun 8 miliardoj da homoj.
La statistikoj publikigitaj de UN kaj ties specialaj organizaĵoj montras duobliĝon aŭ triobliĝon de la plej multaj donitaĵoj validaj por la tuta mondo dum la pasintaj 20 jaroj. La monda industriproduktado triobliĝis kaj la eksporta volumeno kvarobliĝis en la mondo. La agrikultura produktado plialtiĝis 1,7-oble. La fenomena kreskado de la produktado de certaj varoj fariĝas aparte klara ĉe benzino, kies produktado altiĝis kvinoble, ĉe plastoj, kie oni povas registri 15-oblan plialtiĝon, kaj ĉe aluminio kun kvinobla plialtiĝo. Ĉe cemento la produktado plialtiĝis kvaroble, ĉe kruda ŝtalo 2,8-oble kaj ĉe aŭtomobiloj 2,7-oble. En la jaro 1923 ekzistis nur 11 urboj kun pli ol unu miliono da loĝantoj. Hodiaŭ estas 160, kaj en la jaro 2000 estos pli ol 300, el kiuj 40 siaflanke nombros pli ol 10 milionojn da loĝantoj.
Dum la kresko de la loĝantaro estas plej granda en la malpli riĉaj landoj, sed la konsumado eksplode pligrandiĝis en la evoluintaj landoj, la industria revolucio plue etendiĝos tra la tuta mondo. Tiam pli altaj nombroj da loĝantaro ĉie kondukos al lavangeca kresko de la konsumado. Tia aspektas la nova mondo.

3. Reciprokaj dependecoj en la mondo

Plia sekvo estas la estiĝo de multspecaj kaj malvastaj reciprokaj dependecoj inter ŝtatoj, kiuj ankoraŭ antaŭ mallonge ekzistis relative izolitaj unuaj disde la aliaj. Apud la naturaj reciprokaj dependecoj, kiuj ĉiam karakterizis nian planedon (kiel la cirkuladoj de akvo, oksigeno, karbono kaj nitrogeno kaj multaj aliaj reciprokaj interligoj en la biosfero), subite la homo kreis en la mondo reciprokajn dependecojn, kiuj fariĝis pli kaj

pli ampleksaj. Miloj da aeroplanoj ĉiam estas en la aero, kaj en certaj aerodromoj oni kelkfoje atendas amase la anoncon pri allaso al aerkoridoro. Miloj da ŝipoj kaj trajnoj transportas grandegajn varkvantojn el unu lando en alian. Marhavenoj ne plu povas kontentigi la bezonojn pro la kresko de la monda komerco. La internacia turismo kaj aro da internaciaj kongresoj, renkontiĝoj, helpservoj kaj studvojaĝoj ege pliiĝas. Gigantaj transnaciaj monopoloj havas siajn manojn en la aferoj de multaj landoj. Ili komencas malhelpi la kreskadon de multaj nacioj kaj per tio siaflanke enkondukas novan ĉapitron en la historio pri la potenco de la kapitalo.

Per tiuj reciprokaj dependecoj la registaroj estis devigitaj adaptiĝi al nova kolektiva pensado kaj al kunlaboro, kiuj ambaŭ estis nepenseblaj ankoraŭ antaŭ nur malmultaj jardekoj. Ankaŭ la Unuiĝintaj Nacioj ege ŝanĝiĝis surbaze de tio. Hodiaŭ la mondorganizaĵo, subtenata de 32 specialaj organizaĵoj kaj programoj internaciaj, okupiĝas praktike pri ĉiu mondvasta problemo.

4. Neceso de novaj tendencoj en la edukado

Sub tiuj fundamente ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj, kiuj forte influas nian vivon, ekzistas la urĝa neceso de edukado tuŝanta ĉiujn internaciajn problemojn. Tio estas grava por la estonteco de la homaro. Kiel niaj infanoj povas frekventi lernejojn kaj lerni tiom da detaloj pri la historio, geografio kaj administrado de sia lando kaj tiom malmulte pri la mondo, ĝiaj problemoj, la reciprokaj dependecoj ekzistantaj en ĝi, ĝia estonteco kaj ĝiaj internaciaj institucioj? La homoj miras pri la subita ekesto de mondvastaj krizoj. Ili demandas sin, kial la vivmedio povis malpliboniĝi tiagrade, ke per tio la vivo sur nia planedo estas minacata. Ili demandas sin, kial ekzistas energikrizo, kiun iliaj registaroj ne antaŭvidis (sed kiun antaŭvidis Unuiĝintaj Nacioj, kiam ili kunvokis la unuan mondkonferencon pri novaj energifontoj jam en la jaro 1961). Ili demandas sin, kial malbonaj rikoltoj en ege malproksimaj landoj salte altigas la prezon de siaj nutraĵoj, kaj kial post tiom da jaroj kun plusproduktado en la agrikulturo subite ekzistas malabundo de nutraĵoj (ankaŭ pri tiu danĝero la organizaĵo de UN pri nutrado kaj agrikulturo avertis la landojn).

Infano, kiu naskiĝas hodiaŭ, estos kiel plenkreskulo konfrontita preskaŭ ĉiutage al problemoj, kiuj estas karakterizitaj per mondvasta reciproka dependeco, ĉu estu paco, nutraĵoj, vivkvalito, inflacio aŭ malabundo de krudmaterialoj. Li estos formanto kaj fruktuzanto aŭ viktimo de tiu totala sistemo de dependecoj en la mondo kaj prave povas demandi: „Kial oni ne avertis min? Kial oni ne instruis min pli bone? Kial miaj instruistoj rakontis al mi nenion pri tiuj problemoj kaj ne donis al mi konsilojn por mia konduto kiel parto de interdependa homaro?"

Pro tio estas la devo de la registaroj kaj estas en ilia intereso adekvate instrui la infanojn pri la mondo, en kiu ili vivas. Ili devas informi ilin pri la aktivadoj, la klopodoj kaj la rekomendoj de la internaciaj institucioj. Ili devas preti transpreni la respondecon pri la sekvoj de siaj aktivadoj kaj zorgi pri la pluaj miliardoj da homoj, kiuj iam vivos sur la tero.

Multaj registaroj komencas kompreni tion. Ili fondis en la jaro 1974 universitaton de Unuiĝintaj Nacioj, kiu troviĝas en Tokio kaj havas filiojn en multaj landoj. En la jaro 1979 la plenkunveno de UN salutis la decidon de la registaro de Kosta-Riko estigi universitaton de la paco.

5. Konservi la estontecon al la homaro

Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj specialaj organizaĵoj disponas pri granda nombro da donitaĵoj kaj informoj pri ĉiu imagebla mondproblemo. La edukistoj kaj instruistoj devas sisteme eluzi tiun fonton. La tempo urĝas, ĉar la mondo ŝanĝiĝas je ĉiu tago. Estus de pli granda utilo lernigi la infanojn en la tuta mondo fermi la akvokranon kelkajn sekundojn pli frue kaj per tio kontribui al ŝparado de niaj krudmaterialoj, ol dekreti komplikajn leĝojn aŭ eligi el la tero pli kaj pli multe. La mondo frontos grandajn malfacilaĵojn kaj ne kapablos solvi siajn problemojn, se ĝiaj loĝantoj ne estas adekvate edukataj ekde frua junaĝo. Tio estas enorma tasko de historia graveco kaj celo valoranta la penon por instruistoj kaj edukistoj en la tuta mondo.

U Thant, la iama ĝenerala sekretario de UN, de profesio instruisto, parolante pri tiuj problemoj ĉiam menciis sian bazan konvinkon, ke klerigo kaj edukado okupas ŝlosilan pozicion por la estonteco kaj ke spirita kontentigo rangas antaŭ la materia vivo, moralaj kvalitoj antaŭ la spiritaj kvalitoj. En parolado pri sia religia kredo li diris 1966 en Toronto:

„La leĝo de amo kaj kunsento rilate al ĉiuj vivuloj siaflanke estas doktrino, por kiu ni ĉiuj buŝe konfesas nin nur tro volonte. Sed por ke ĝi fariĝu realo, estas necesa edukprocezo, vera spirita renaskiĝo. Se ĝi iam fariĝintos realo, la naciaj kaj internaciaj problemoj evidentiĝos pli klare kaj tial estos pli facile solveblaj. Militoj kaj konfliktoj apartenos al la pasinteco, ĉar militoj komenciĝas en la kapoj de la homoj. Sed tiam la pensoj estos stampitaj per amo kaj kunsento kaj estos tute direktitaj al la defendo de la paco."

En sia adiaŭa parolado antaŭ Unuiĝintaj Nacioj li diris en decembro 1971: „. . . Mi havas certajn prioritatojn rilate al virtoj kaj homaj valoroj. Ideala viro aŭ ideala virino distingiĝas per kvar ecoj, kvar kvalitoj – fizikaj, mensaj, moralaj kaj animaj. Kompreneble estas tre malfacile trovi homon kun ĉiuj ĉi kvalitoj, sed kio koncernas la prioritatojn, mi atribuus al la mensaj kvalitoj pli grandan valoron ol al la fizikaj kvalitoj. Kaj la moralajn kvalitojn mi rangigus eĉ super la mensaj kvalitoj. Tute ne estas mia intenco kalumnii la intelektismon, sed mi atribuus al la moralaj kvalitoj pli grandan gravecon ol al la mensaj virtoj – al moralaj kvalitoj kiel amo, kunsento, komprenemo, toleremo, al la filozofio ‚vivi kaj lasi vivi' kaj al la kapablo kompreni la starpunkton de la aliulo. Ili estas la ŝlosilo al ĉiuj grandaj religioj. Kaj super ĉio mi starigus la animajn valorojn, la animajn kvalitojn. Ĉe tio mi intence evitas la nocion ‚religio'. Mi celas la animajn virtojn en la senco de kredo je si mem, pureco de la propra animo, kio estas por mi la plej granda el ĉiuj virtoj. Sole per tia aliro, kun tiu filozofio, kun tiu koncepto ni kapablos formi la socion de ni deziratan, kiu ŝvebis antaŭ la okuloj de la fondintoj de Unuiĝintaj Nacioj."

Jes, la edukado inkluzivanta ĉiujn internaciajn problemojn devas trapenetri la materiajn, sciencajn kaj intelektajn atingojn kaj ankaŭ la moralan kaj animan sferojn. La homo kapablas plifortigi la forton de siaj manoj helpe de nekredeblaj maŝinoj, tiun de siaj okuloj per teleskopoj kaj mikroskopoj, tiun de siaj oreloj helpe de telefonoj, radio kaj kosmaj antenoj kaj tiun de sia cerbo per komputeroj kaj aŭtomatoj.

La edukado tuŝanta ĉiujn mondproblemojn devas prepari niajn infanojn al sekura, prospera, amikeca kaj feliĉa erao kun multaj interdependaj rilatoj.

El „neue perspektiven" (novaj perspektivoj), jurnalo de la monda packonsilio, trad. D-ro Karl Schulze, Berlin. (†)

GDR: Retrorigardo kaj perspektivo

Ĉe tiu ĉi jarŝanĝo la civitanoj en Germana Demokratia Respubliko retrorigardas sur jaron, kies rezultoj malgraŭ ĉiuj komplikaĵoj en la ekstera politiko kaj malgraŭ pligrandiĝantaj malfacilaĵoj en la ekstera komerco meritas atenton. Tio koncernas kaj la internpolitikan evoluon de GDR kaj ankaŭ ĝian kontribuon al la konservo de paco kaj al konstruiva kunlaboro.

La internpolitika situacio solidiĝis en 1982, ĉar oni tion, kio estis planita, ankaŭ povis realigi: La planoj antaŭvidis ne nur konservi la vivnivelon de la popolo, sed altigi ĝin. Tio sukcesis. La celoj konsistis – kiel jam en la pasinteco – en tio, certigi la laboron de ĉiuj, la senpagan kuracistan prizorgon por ĉiuj, la disponigon de profesia lernloko por ĉiu junulo. Ankaŭ tio estas atingita. Oni celis kontinuan plialtigon de la produktado en industrio kaj agrikulturo. Ankaŭ tiu tasko estas plenumita.

Oni daŭrigis la grandstilan kaj ampleksan konstruprogramon por loĝejoj, la centran parton de la socialpolitiko. En 1982 180 000 loĝejoj estas novkonstruitaj aŭ modernigitaj. Per tio estiĝis ekde 1971 ĉirkaŭ 1,2 milionoj da novaj kaj pluaj 600 000 modernigitaj loĝejoj. Rezulte de tio profunde pliponiĝis la loĝcirkonstancoj por 5,4 milionoj da civitanoj, do por ĉirkaŭ triono de la loĝantaro – precipe por laboristaj familioj, infanriĉaj familioj kaj junaj geedzoj. Per 392 loĝejoj po 1 000 loĝantoj GDR ĉikampe okupas antaŭan lokon en internacia komparo.

Sed ankaŭ sur multaj aliaj kampoj la politiko por la prospero de la popolo, iniciatita de USPG, la gvida partio en GDR, efikas avantaĝe por ĉiu. La netaj monenspezoj plialtiĝis de jaro al jaro, same la monataj realaj enspezoj.

Tiuj ĉi monataj realaj enspezoj po persono de la loĝantaro – inkluzive infanoj kaj pensiuloj – altiĝis de 486 markoj en la jaro 1970 ĝis 855 markoj en la jaro 1982. Nuntempe 74 % de la familioj havas enspezon de 1 200 markoj aŭ pli, dum en 1970 estis nur 30 %. Ĉe tiuj indikoj krome gravas, ke en GDR la prezoj por varoj de la bazaj bezonoj, por lupagoj kaj servoj estas stabilaj kaj eksterordinare malaltaj.

Ĉio entute ebligas fari bonan, ĝisfunde sanan bilancon – kio ne signifas, ke oni kontentas pri ĉio. La civitanoj scias, ke dum la venontaj jaroj necesos ankoraŭ pli streĉa laboro por certigi la atingojn kaj majstri la pli altajn taskojn de la estonto. Ili optimisme kaj sekure alfrontas tiun ĉi taskon, ĉar sub la kondiĉoj de GDR ekzistas nek daŭra depresio en la industrio, nek bankrotoj de firmoj, nek perdo de la laborloko, nek redukto de la socialaj servoj. Proklamado de danĝerstato pro malsatado, senhejmeco aŭ senlaboreco de la junularo estas neimageblaj. Tiaj fenomenoj estas signoj de alia mondo.

Trad.: D. Dungert
el Panoramo GDR, 2-XI-88/2. 6.

Tial ni kuraĝu ĉion

(Poemo de Karl Marks, proks. 1836)

Tial ni kuraĝu ĉion,
krea estu ĉiu tag',
eĉ ne diru ni nenion,
kaj ripozo estas plag'.

Ni ne paŝu sen aspiro
sub la jug' en apati',
ĉar sopiro kaj deziro,
l'ago restis ja al ni.

Tradukis: M. Arnold

Okaze de la Karl-Marx-jaro 1983 (100a morto-tago, 165-a naskiĝtago)

Jam delonge en Anglio pasis la tempoj, en kiuj oni forgesigis Karl Marx per silento. Renomaj librovendejoj en London, Oxford kaj Cambridge ofertas liajn verkojn, kiuj iam nur malfacile trovis eldoniston, la Brita Muzeo fiere listigas lin en informskribo inter la plej eminentaj vizitintoj de sia granda legejo, kaj proksime la Tamizo troviĝas malnova domo sub monumenta protektado, en kiu domicilas biblioteko, kiu portas lian nomon. Ankaŭ gvidlibroj tra London – penantaj gardi sian renomon de universaleco – atribuas lian lokon al la fondinto de la scienca komunismo. Plej ofte ili registras la Highgate-tombejon kun la monumento kaj la tombo, en kiu kuŝas ankaŭ Jenny Marx kaj Lenchen Demuth, la fidela servistino, kaj pli kaj pli ofte oni atentigas pri la loĝdomoj de la familio Marx, kun mallongaj indikoj al la vivcirkonstancoj kaj la scienca-politika laboro de tiu granda germano. Antaŭ nelonge aperis eĉ „Ilustrita Gvidlibro", kies aŭtoroj klopodas sugesti la viziton de la aliaj Marx-lokoj ankoraŭ ekzistantaj en London.

La „angla periodo" en la agado de Karl Marx estas la plej grava etapo en la elformiĝo kaj evoluo de la teorioj de la komunismo. Grandbritio, la „metiejo de la mondo", ĝiaj ekonomio kaj sociaj cirkonstancoj liveris al Marx kaj Friedrich Engels la plej ampleksan materialon por analizi la estiĝon de la kapitalismo, ties laŭleĝecojn kaj esencajn tendencojn de evoluo, por ĝeneraligi la spertojn de la batalo de la laborista klaso. En London Marx skribis la ĉefverkon de sia vivo, „La Kapitalon". Preskaŭ 40 jarojn li estis kiel konsilanto kaj gvidanto intime ligita al la revolucia alo de la angla laborista klaso, kiu havis en London sian centron. El tiuj kvar jardekoj li pasigis 34 vivojarojn en la Londona ekzilo.

1. En tiu domoceano

De post la morto de Karl Marx je la 14-a de marto 1883 London tre ŝanĝis sian aspekton. En la urbocentro, ĉirkaŭe de la Liverpoolstrato, kie 1848 en la nun ne plu ekzistanta domo n-ro 46 la „Kleriga societo por laboristoj" presis la „Komunistan Manifeston" en pluraj cent ek-

D-ro Wolfgang Döhnert

KARL MARX en London

zempleroj, la malnovaj domoj cedis al grandegaj komerc- kaj bankpalacoj el ŝtalbetono kaj vitro. Tamen restas valida, kion konstatis Wilhelm Liebknecht en la jaro 1896, kiam li refoje vizitis la urbon post longa foresto kaj sekvis la spurojn de Marx: „In tiu domoceano London troveblas stratoj kaj kvartaloj, kiujn la tempo preterpasas senspure, kiuj restas netuŝataj de la muĝantaj ondoj."

La unua restado de Marx en London okazis somere de 1845. Kune kun Engels li tiam entreprenis studvojaĝon ĉirkaŭ de la 12-a de julio ĝis 21-a de aŭgusto kaj dum ĝi ankaŭ vizitis Manchester, por trarigardi la sciencan, antaŭ ĉio ekonomian literaturon ne alireblan al li en lia tiama ekzilejo Bruselo kaj por ekkoni la kapitalisman landon tiutempe plej evoluintan. Antaŭ la forvojaĝo la du kunvenis kun revoluciaj germanaj elmigrintoj kaj ĉartistoj en la trinkejo „Al la anĝelo" (The Angel), en la Webberstrato situanta proksime al la Black-Friars-ponto. La restoracio ne plu ekzistas.

La dua restado estis en la vintro 1847, kiam Marx kaj Engels partoprenis la II-an kongreson de la Ligo de la Komunistoj, kiu okazis de la 29-a de novembro ĝis la 8-a de decembro en la ejo de la Germana Komunista unuiĝo por laborista klerigo, Drury Lane 191. En tiu forumo de la internacia laborista movado, plej reprezenta por la tiama tempo, la delegitoj diskutis la programajn kaj taktikajn principojn de laborista partio. La principoj prezentitaj de Marx kaj Engels estis ĉiuvoĉe akceptitaj. Ili konsistigis la gvidliniojn por la „Manifesto", kies skriban fiksadon ambaŭ komencis en London ankoraŭ antaŭ sia forvojaĝo. En la Drury Lane staras nur unu aŭ du domoj el tiuj tagoj. La iama kunvenejo de la unuiĝo ne estas inter ili.

2. La transloĝiĝo de Jenny

Male, la konstruaĵo 4, Anderson-strato en la kvartalo Chelsea restis komplete konservita en sia malnova ekstera formo. Tie ĉi loĝis Marx, kiam pro persekutoj li kaj centoj da aliaj revoluciuloj devis elmigri el la kontinento al Anglio. Ja du-



Karl Marx, dum majo 1861 en Londono.

Foto Zentralbild

raj malhavoj atendis ilin, tamen ili povis agadi en tiu lando en atmosfero de relativa libero. „Nun mi estas vere en malfacila situacio", Marx skribis al la poeto Ferdinand Freiligrath je la 5-a de septembro 1849, „Mia edzino estas profunde graveda, je la 15-a ŝi devus forvojaĝi el Parizo, kaj mi ne scias kiel havigi al mi la monon necesan por ŝia forvojaĝo kaj ĉi-tiea aranĝiĝo".

Nur pene Marx kapablis havigi al si la rimedojn por la transveturo. La luita domo en Chelsea kontentigis plej modestajn pretendojn. Hodiaŭ moderne plukonstruita, ĝi apartenas al la dezirataj terposedaĵoj en la urbokerno, kie la grundprezoj kaj la ĉi-rilataj aĉetsumoj atingas sesciferajn nombrojn kaj konstante plialtiĝas plu. Por Marx mem tio ne estintus surprizo, ĉar en „La Kapitalo" li rimarkigis: „La ,plibonigo' (improvements) de la urboj akompananta la progreson de la riĉeco kaj okazanta per malkonstruado de malbone konstruitaj kvartaloj, starigo de palacoj por bankoj, grandmagazenoj ktp., etendiĝo de la stratoj por negoca trafiko kaj luksaj kaleŝoj, enkonduko de ĉevalaj tramoj ktp. evidente forpelas la malriĉulojn en pli kaj pli malbonajn kaj pli dense plenigitajn rifuĝejojn. Aliflanke ĉiu scias, ke la multekosteco de la loĝejoj troviĝas en inversa rilato al ilia kvalito kaj ke la minoj de la mizero estas ekspluatataj de la domspekulantoj kun pli multe da profito kaj malmulte da kostoj ol iam la minoj de Potosi" (en la 17-a jarcento grava centro de la ekspluato de arĝentaj minoj en Bolivio kun ĉirkaŭ 50 procentoj de la tiama tutmonda elminigo – W. D.).

3. Ekzekuciistoj en la domo

En la Anderson-strato naskiĝis la kvara infano de Marx, Heinrich Guido, kiu mortis en la aĝo de unu jaro pro pneŭmonito. La familio loĝis ĉi tie nur malmultajn monatojn. La dommastrino postulis la antaŭtempan pagon de estiĝintaj ŝuldoj, kaj kiam ili ne povis esti pagataj, ŝi deklaris la ĉesigon de la lukontrakto. La cirkonstancojn de la eliĝo el la domo priskribis Jenny Marx:

„. . . du ekzekuciistoj venis en la domon, konfiskis mian tutan malgrandan havaĵon, litojn, tolaĵon, robojn, ĉion, eĉ la lulion de mia bedaŭrinda infano, la pli bonajn ludilojn de la knabinoj, kiuj staris apude kun ardaj larmoj. Ili minacis preni ĉion post du horoj – tiam mi kuŝis sur la planktero kun miaj frostantaj infanoj, mia dolora brusto." La konfiskitajn objektojn Marx povis repreni, post kiam amikoj helpis lin el la mizero. Ankaŭ la ŝuldojn ĉe la dommastrino li povis pagi. Sed multaj havaĵeroj devis esti forvendataj por egaligi pagendajn fakturojn de la apotekisto, bakisto, buĉisto.

Dumtempan restejon la familio Marx trovis en la Germana Hotelo – 1, Leicester-strato –, transitejo por politikaj fuĝintoj ne nur el Germanio. Hodiaŭ en la domo estas „Manzi's", ŝatata fiŝrestoracio. Sed baldaŭ la familio Marx sukcesis havigi al si kvartiron en la proksime situanta Dean-strato en la dense loĝata Soho – malmultajn jarojn poste unu el la ĉefaj fokusoj de grava epidemio de ĥolero. Kiel antaŭ pli ol cent jaroj ankaŭ hodiaŭ Soho estas ankoraŭ altirpunkto por eksterlandanoj, antaŭ ĉio por „gastlaboristoj" el Italio, Hispanio, Portugalio kaj la kariba regiono. Kelkaj stratoj formas specon de „ĉina urbo" kun ĉinaj butikoj, restoracioj kaj drinkejoj.

4. La opinioj de sinjoro Marx

En Soho – la nomo estas varianto de angla ĉasvoko – jam post la edikto de Nantes (1685) hugenotaj familioj trovis rifuĝejon. Ili estis plej ofte metiistoj, kies asimilitaj posteuloj apartenis poste ankaŭ al la fondintoj de la unuaj Trade Unions (sindikatoj), kiujn en sia verko „La mizero de la filozofio" – tiu libro aperis en 1847 kaj estis lia debuto en la politika ekonomiko – Marx nomis „daŭrantaj koalicioj", kiuj „ekvivis samtempe kun la politikaj bataloj de la laboristoj" kaj „servis al la laboristoj kiel defendiloj en iliaj bataloj kun la entreprenistoj". Dum vagado tra la proksimume du dekduoj da stratetoj de Soho oni ekscias, ke en la domoj kun iliaj ludkazinoj, seksbutikoj kaj striptizaj drinkejoj vivas 3 500 honestaj civitanoj.

Ĉe la domo 28, Dean-strato, blua memortabulo de la „Greater London Council", de la magistrato, memorigas pri tio, ke ĉi tie Karl Marx vivis de 1851 ĝis 1856, per kio malgranda eraro okazis al la urbaj aŭtoritatuloj, ĉar la familio Marx enloĝiĝis jam 1850 en la domo konstruita 1734, al kiu mankis ĉiuj sanitaraj avantaĝoj de postaj jaroj. Ĝi loĝis en la unua etaĝo, ĝis kie ne kondukis iu akvokondukilo. En la Dean-strato estiĝis multaj kontribuoj por la burĝa gazeto „The New-York Daily Tribune", kies redakcio invitis Marx en somero 1851 fariĝis ĝia Londona korespondanto. Tiuj artikoloj estis lia unuanura enspezfonto. Sed krome li opiniis tre utile, ke komunistoj prenas la parolon en burĝaj-demokratiaj publicaj organoj. Senkonsidere al malsamaj starpunktoj, kiuj ekzistis inter Marx kaj la redaktoroj de la „Trib", liaj artikoloj trovis eksterordinaran aprezon. „Sinjoro Marx havas tre decidajn proprajn opiniojn, kiujn partopreni en ĉiuj punktoj ni estas tute ne inklinaj, sed kiu ne legas liajn leterojn, preterlasas unu el la plej instruivaj fontoj de informiĝo pri la grandaj problemoj de la nuntempa eŭropa politiko", la gazeto skribis en ĉefartikolo, en kiu oni laŭdas la „rimarkindan lertecon", per kiu la aŭtoro majstras sian ne facilan taskon. Sed senkonsidere al laŭdaj vortoj la malabunda honorario estis pagita, se entute, nur kun prokrasta malfruiĝo.

5. British Library (Brita Biblioteko)

De la Dean-strato ĝis la British Library, la nacia biblioteko de la reĝlando, estis nur komforta promeno. Tie ĉi Marx registrigis sin kiel konstantan uzanton en junio 1850. Kiel hodiaŭ jam tiam ne estis facile ekhavi daŭran karton. Petanto devas prezenti kontroleblajn referencojn kaj garantiulojn. La nekonata germana elmigrinto komencis siajn regulajn vizitojn per funda studado de malnovaj jarkolektoj de la revuo „The Economist" kaj de aliaj priekonomiaj skriboj. En la malnova legejo – oni anstataŭis ĝin 1857 per la konstruo de nova kupola salono – Marx laboris inter alie pri siaj verkoj „La intercivitana milito en Francio" kaj „La 18-a de Brumero de Luis Bonaparte". En la nova salono, kiu laŭ la muzea kroniko „estis inaŭgurita de la ĉeestantaj sinjoroj per ĉampana lunĉo", Marx laŭdire okupis la lokon 07 laŭ la indikoj de la „Keepers of Printed Books".

Por sia „Kapitalo" Marx trastudis pli ol 1 500 librojn. El multaj li faris al si eltiraĵojn, provizis ilin per kritikaj rimarkoj kiel konstrueroj de sia grandega idea konstruaĵo, kiun li kreis senkonsidere al materiaj zorgoj kaj afliktoj. La vivo en la malvasta triĉambra loĝejo fariĝis turmento. „Resti en la malnova truo eblis neniukondiĉe", li skribis al Engels je la 22-a de septembro 1856. „Finfine ni trovis loĝejon – tutan domon, kiun ni mem devas furnish (mebli). Estas: 9, Graftonterrace, Maitlandpark, Haverstockhill, Hampstead Road. Luprezo 36 pundojn." Kiel legeblas en tiu letero, al la familio Marx, tamen, mankis la mono por la meblado, kaj oni petis Engels pri financa subteno, kiu venis senprokraste – kiel jam ofte antaŭe kaj poste. Sed eĉ kun tiu monhelpo eblis havigi la necesan sumon nur pene, t.e. per refoja fordono de objektoj kiel garantiaĵo.

La domo Grafton Terrace – hodiaŭ ĝi estas la n-ro 46 kaj rekonstruita – havis entute ok ĉambrojn, inkluzive la ejojn en la duonkela etaĝo. Situanta ĉe deklivo, ĝi tiam prezentis el la unua etaĝo belan vidon super la tegmentoj de la urbo ĝis la katedralo de Sankta Paŭlo. Sed la regiono ĉe la urbrando lasis multon por deziri. Ankoraŭ ne ekzistis vera strato, kaj en pluvaj tagoj oni devis vadi tra humida argilo kaj ŝlimo. Jenny Marx, trafita de varioloj, plendis pri soleco. Ŝi malhavis la pulsantan vivon en la centro, la renkontiĝojn kun aliaj homoj, la interparolojn, des pli, ĉar ankaŭ ĉi tie la mizero ne finiĝis.

6. Nedungado pro manskribo

La sepa infano mortas mallonge post la naskiĝo, ĝia nomo ne estas konata. Pli kaj pli ofte Marx suferas pro hepatmalsano kaj furunkozo. En februaro 1882 la familio ŝuldas la luprezon de unu jaro, kaj la nutraĵvendisto ne plu volas vendi kredite. En senespera situacio de ekonomia mizero Marx aspiras pri skribista pozicio en proksime situanta fervoja depoto. Sed la viro, kiu scias pli multe ol kune ĉiuj ekonomikistoj de la reĝlando pri la ekonomio de Anglio, pri la evoluleĝoj de la socio, spertas malakcepton – pro malbona manskribo.
Tamen Marx ne malkuraĝiĝas. Subtenite de Friedrich Engels per materialo kaj mono, li studas ĉiujn signifajn socipolitikajn problemojn de sia tempo. Estiĝas la artikolserio pri la brita kolonia politiko kaj la hinda ribelo. Apud lia scienca kaj ĵurnalista laboro li aktivas politike. Antaŭ Londonaj laboristoj li faras prelegojn pri politika ekonomiko, partoprenas en publikaj manifestiĝoj.
1864 la familio Marx luas novan loĝejon, kiu situas proksime al Grafton Terrace – Madena Villas, Maitland Park, Haverstock Hill. En la dua mondmilito la domo estis forte damaĝita en aeratako. Ĝi devis esti malkonstruata. Hodiaŭ sur la „Maitland Park Estate" staras novkonstruaĵoj, kiujn la Londona magistrato starigis kiel komunumajn loĝblokojn. El la vivotempo de Marx rigardeblas nur malnova ŝtona pordego, tra kiu la vojo iam kondukis al orfejo.
Paul Lafargue, en Kubo naskita edzo de la Marx-filino Laŭra, priskribis la ĉambron de Marx post sia unua vizito en la jaro 1865 jene: „Ambaŭflanke de la kameno kaj kontraŭ la fenestro estis ĉe la muroj librоŝrankoj plenplenaj de libroj kaj troŝarĝitaj per gazetpakaĵoj kaj manuskriptoj ĝis la plafono. Kontraŭ la kameno kaj je unu flanko de la fenestro staris du tabloj plenaj de paperoj, libroj kaj gazetoj; en la mezo de la ejo kaj en favora lumo troviĝis la tre simpla labortablo (3 futojn longa, 2 futojn larĝa) kaj la fotelo el ligno; inter la fotelo kaj la libroŝranko, kontraŭ la fenestro, staris ledsofo, sur kiu Marx etendiĝis de tempo al tempo por ripozi. Sur la kameno kuŝis pliaj libroj, inter ili cigaroj, alumetoj, tabakujoj, surleteraj pezaĵoj, fotografaĵoj de liaj filinoj, de lia edzino, de Wilhelm Wolff kaj Friedrich Engels. Li estis forta fumanto: ,La „Kapitalo" enspezigos al mi eĉ ne tiom, kiom kostis al mi la cigaroj, kiujn mi fumis dum la skribado', li diris al mi . . ."

7. La lastaj jaroj

Plian fojon la familio Marx ŝanĝis la loĝejon. En marto 1875 ĝi ekokupis 41, Maitland Park Road, Haverstock Hill. Tiu domo – ĝi ankaŭ devis cedi al novkonstruaĵoj – situis nur malmultajn paŝojn for de la malnova. Tie ĉi Jenny Marx mortis je la 2-a de decembro 1881 pro kancera malsano.
Marx estis tro malforta por akompani Jenny sur la lasta vojo. Li transvivis ŝin nur je ĉirkaŭ 15 monatoj. Friedrich Engels, kiu loĝis ne malproksime, ekiris por viziti lin la 14-an de marto 1883 en la tagmezaj horoj. Lenchen Demuth kondukis lin en la ĉambron de Marx en la unua etaĝo, kie laŭ ŝia scio li estis dormanta. Kiam la du envenis, Marx kuŝis mortinta en sia fotelo.
La enterigon en la Highgate-tombejo partoprenis proksimume 20 malnovaj kunbatalantoj kaj amikoj, inter ili Wilhelm Liebknecht. Engels estis preparinta ĉion por la enterigo kaj faris la funebran paroladon en angla lingvo. En ĝi li aprezis la grandegajn plenumojn de Marx, al kiuj – kiel li akcentis – apartenas la malkovro de la evoluleĝo de la homa historio kaj de la movleĝo de la kapitalisma produktada maniero, de la plusvaloro. Marx „mortis estimata, amata, priplorita de milionoj da revoluciaj kunlaborantoj, kiuj loĝas de la siberiaj minejoj tra tuta Eŭropo kaj Ameriko ĝis Kalifornio . . .", li diris. „Lia nomo plu-vivos tra jarcentoj kaj tiel ankaŭ lia verko!"

El „horizont" n-ro 2/1983
trad. D-ro Karl Schulze, Berlin. (†)

Sentencoj de Karl Marx

Ĉiu paŝo de vera movo estas pli grava ol dekduo da programoj.

Ne ekzistas ŝoseo al scienco, kaj nur tiuj havas ŝancon atingi ĝiajn lumajn suprojn, kiuj ne timevitas la penon, suprengrimpi ĝiajn krutajn padojn.

La rilato de viro al virino estas la plej natura rilato de homo al homo.

La socio ne trovos sian ekvilibron, ĝis ĝi turniĝos ĉirkaŭ la suno de l'laboro.

Teorio fariĝos materia povo, kiam ĝi ekkaptos la amasojn.

La homo estas la plej alta estaĵo por la homo.

La filozofoj nur malsame interpretis la mondon, sed necesas ĝin ŝanĝi.

La lingvo estas la senpera realeco de l'penso.

La tradicio de ĉiuj malnovaj generacioj pezas kiel demono sur la cerboj de la vivantoj.

Tradukis: M. Arnold

Grava teksto de Karl Marx en diversaj tradukoj

1. Enkonduko

Fojfoje oni citas el la komuna verko de Karl Marx kaj Friedrich Engels „Die Deutsche Ideologie" (Marx/Engels Werke, Berlin 1979, vol. 3, p. 411–412), jenan tekston gravan por la interpreto de la „natura" evoluo de lingvoj, kiun ni unue donas en la germana originalo:

„Die Naturwüchsigkeit der Sprache ist übrigens in jeder modernen ausgebildeten Sprache, teils durch die Geschichte der Sprachentwicklung aus vorgefundenem Material, wie bei den romanischen und germanischen Sprachen, teils durch die Kreuzung und Mischung von Nationen, wie im Englischen, teils durch auf ökonomischer und politischer Konzentration beruhende Konzentration der Dialekte innerhalb einer Nation zur Nationalsprache aufgehoben. Daß die Individuen ihrer Zeit auch dies Produkt der Gattung vollständig unter ihre Kontrolle nehmen werden, versteht sich von selbst."

2. Tri tradukoj

Bill Keable sendis al ni du tradukojn de tiu ege grava teksto. La unua de A. Skupas el „Horizonto de Soveta Litovio", n-ro 2/1971 (p. 7, en la artikolo „Lingvistikaj konceptoj de F. Engels): „Natura lingva kreskado, cetere en ĉiu moderna evoluinta lingvo, leviĝis al nacia lingvo parte per historia evoluo de lingvo el antaŭe trovita materialo, kiel tio okazis ĉe romanaj kaj germanaj lingvoj; parte per kruciĝo kaj miksiĝo de nacioj, kiel ĉe la angla; parte per koncentriĝo de dialektoj interne de unu nacio surbaze de ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siatempe ankaŭ tiun ĉi faritaĵon de la homa gento prenos sub sia absoluta kontrolo, estas memkompreneble."

La dua estas de D. Blanke en „Paco" 4/71 (GDR-numero, „Kelkaj konsideroj pri argumentado kaj argumentoj", p. 34): „La natura kreskiteco de lingvo cetere estas nuligita en ĉiu alia plenevoluinta lingvo, parte pro la historio de la lingva evoluo el ekzistinta materialo kiel ĉe la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj kiel ĉe la angla; parte pro koncentriĝo de dialektoj en nacio, baziĝanta je ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siavice prenos ankaŭ tiun produkton de sia speco sub sia kontrolo, kompreniĝas per si mem."

La trian version, kiun ni konas estas de E. Drezen (Historio de la Mondolingvo, Leipzig 1931, p. 7): „En ĉiu nuntempa alt-evoluinta lingvo la pratempe elemente naskiĝinta parolo leviĝis al la nivelo de nacia lingvo – parte dank' al historio de la lingvoevoluo – el la jam preta materialo, kiel ni tion observas ĉe la romanaj kaj germanaj popoloj, parte dank' al intermiksiĝo de la popoloj, kiel ĉe la angla lingvo, parte dank' al koncentriĝo de dialektoj ĉe iu popolo, kio eventas sur bazo de ekonomia kaj politika koncentriĝo. Estas memkompreneble, ke la individuoj siatempe kapablos plengrade kontroli tiun ĉi produktaĵon de la homgenro."

3. Komparo

Utiligante la kontrastigon de la diversaj tradukoj, kiujn donis Keable, ni kompletigas ĝin kun la materialo el la traduko de Drezen:

1. natura lingva kreskado – natura kreskiteco de lingvo – pratempe elemente naskiĝinta parolo
2. ĉiu moderne evoluinta lingvo – ĉiu nuntempa alt-evoluinta lingvo – ĉiu alia plenevoluinta lingvo
3. per historia evoluo de lingvo – pro la historio de la lingva evoluo – dank' al historio de la lingvoevoluo
4. antaŭe trovita materialo – ekzistinta materialo – la jam preta materialo
5. ĉe romanaj kaj germanaj (lingvoj) – ĉe la romanaj kaj ĝermanaj (lingvoj) – ĉe la romanaj kaj germanaj popoloj
6. per kruciĝo kaj miksiĝo de nacioj – pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj – dank' al intermiksiĝo de la popoloj
7. koncentriĝo de dialektoj interne de unu nacio – koncentriĝo de dialektoj en nacio – koncentriĝo de dialektoj ĉe iu popolo
8. surbaze de – baziĝanta je – sur bazo de
9. leviĝis al nacia lingvo – estas nuligita – leviĝis al la nivelo de nacia lingvo
10. siatempe – siavice – siatempe
11. faritaĵon de la homa gento – produkton de sia speco – produktaĵon de la homgenro
12. sia absoluta kontrolo – sia kontrolo – kapablos plengrade kontroli
13. estas memkompreneble – kompreniĝas per si mem – estas memkompreneble.

La tradukoj do ege varias. Sufiĉe similaj estas la tradukoj 3, eble 5, 6 kaj 7. Plene identas 8 kaj 13. En 10 Blanke evidente mislegis *seinerseits* anstataŭ (devas esti) *seinerzeit* kaj fuŝtradukis *siavice.* Sed la aliaj entenas pli malpli fortajn malsimilaĵojn (vidu ekz. 9).

4. Bill Keable komentas:

„Por marksistaj-esperantistoj, la citita teksto el „La Germana Ideologio" (ĝenerale ignorata en marksismaj rondoj!) estas fundamenta. Armite per ĝi, ĉiu, en ĉiu ajn lando (eĉ en tiuj landoj kies lingvoj ankoraŭ ne posedas tradukon de la libro) povas memfide elpaŝi kontraŭ tiajn „marksistojn", kiuj ankoraŭ ignoras aŭ mokas niajn argumentojn.

Estas des pli absolute necese, ke ni ne risku kompromiti nian aferon, sed klopodu malebligi kaŭzojn por eĉ suspekti la pretenditan superan kapablon de nia planlingvo por ĉiu bezono.

En la ĉi-cititaj versioj ne temas nur pri

stilo (kiu en scienca verko estas nur due grava post signifoprecizeco) sed eĉ pri nocioj (Ekz. „germanaj" ne = „ĝermanaj" nek „leviĝas" = „estas nuligita"! Pensu pri la kompatindaj esperantistoj en kies patrolingvojn la koncerna teksto ankoraŭ ne tradukiĝis, kaj kiuj nature fidos al unu el tiuj tradukoj, ne nur por la propra eduko, sed eventuale por siatempa traduko en siajn lingvojn pere de Esperanto! Kiel tiaj tradukoj ankoraŭ pli devios de la intencoj de la verkinto! Bonŝance, ke Marx ne plu vivas por formi opinion pri la taŭgeco de nia planlingvo! Kaj kion pensus Zamenhof pri tiaj reklamoj! Ni rajtas supozi, ke la germana kamarado Detlev Blanke pli profunde kaj precize komprenas la vortojn de sia samlingvano Marks. El kiu lingvo tradukis k-do Skupas? Se senpere el la germana, jen ankoraŭ pruvo pri la netaŭgeco de „naturaj" lingvoj kiel interlingvoj, ĉar por tiu funkcio plena komprenebleco al homo kun ordinara kapablo estas nepre necesa. Kaj se k-do Skupas tradukis fidele el oficiala litovlingva aŭ ruslingva traduko – jen ankaŭ pruvo pri la sama fakto – rivelita de kontrolo per Esperanto! Nu pri tiu dubsignifa vorto „kontrolo".

La anglalingva traduko de la sama teksto uzas „control". Sed tiu angla vorto ne egalas al la Esperanto-radiko „kontrol".

La angla „control" ordinare signifas „povo direkti, komandi, regi, reguligi, korekti, startigi, haltigi, bremsi k.t.p." – personojn, ĉevalojn aŭ aŭtomobilojn k.s. Ĉiu anglalingva leganto de la anglalingva teksto nature opinias, ke ĝuste tion intencis Marks – des pli ĉar la frazo enhavas ankaŭ la adverbon „completely" kio signifas „komplete" en Esperanto.

Sed tiu signifo NE tradukiĝas per la Esperanto-vorto „kontrolo". Almenaŭ, ne laŭ Zamenhof, nek laŭ la Plena Vortaro, kiu difinas la vorton tiel ĉi: „Detala esploro, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti." En la angla lingvo tion signifas „check" aŭ „verify". Kontisto uzas ĝin, por signifi „klopodon eltrovi, ĉu adicio estas ĝuste farita de alia persono".

En kiu senco Marks intencis komprenigi la germanan vorton „Kontrolle"? Memevidente, nur germanlingvaj kamaradoj kompetentas preni sur sin la respondecon produkti definitivan tradukon, en pura Esperanto, de la intencoj de Marks. Mi sugestas ke oni faru tion kiel eble plej rapide, sed zorge kaj singarde. Tion farinte, ili konsiliĝu kun kompetenta esperantisto el alia patrolingvo por eventuala perfektigo de la stilo, sed nur se tio estas farebla sen mankigi la signifon laŭ opinio de la respondecaj tradukintoj. La fina produkto estu por ĉiu esperantisto en la mondo kiel la Fundamento – netuŝebla! Per tio, esperantistoj ĉie havos je dispono pli fidindan tradukon en Esperanto ol ekzistas en „naturaj" lingvoj! Ĝis tiam, la situacio estas justa nek al Marks, nek al Zamenhof!"

Keable absolute pravas. Necesas, ke germanaj esperantistoj konsultu marksistajn lingvistojn por poste trovi la plene adekvatan tradukon de tiu grava Marx/Engels-a citaĵo.

P. Levsen

Johannes R. Becher

Migruloj

„Migruloj sur stratoj
de ĉies deven'!
Kial vi migradas
ŝarĝitaj kun pen'?"

„Vi ĉaroj sur stratoj!
De kie? – Kien?
Kial do veturas
vi malproksimen?"

En tomboj ĉe stratoj
sen kruco kaj ŝton'
iamaj vagantoj
ripozas sen nom'!

Ĉiama migrado
ĝis vespera fin'? –
– Ni mute demandas
rigardante nin. –

Trad. Erich Würker

Louis Fürnberg

Ĉiu revo

Ĉiu revo, kiu min instigis,
ĉiu lukto, sen indulgi min,
sunradio, kiu min blindigis –
ĉio fine rekompencis sin.

Ĉiu fajro arda en la koro,
ĉiu zorgo prema, korimpres' – –
malgraŭ penoj marŝis la laboro,
Vundojn eĉ kompencis la progres'.

Nia vivo peza ŝarĝo estas.
Nur se kor' fidelas al destin'
eblas vivon jesi, volo restas
krei novan mondon per obstin'.

Ĉiu tago restas en memoro,
kiu vokis min al batalfront'.
Gardas mia kant' pro dank', honoro
la kunulajn revojn por l'estont'.

Trad. Erich Würker

Hans-Jürg Kelpin

Martin Luther – grandeco kaj limoj

(1483–1546)

Dum tiu ĉi jaro 1983 ni honoras grandajn eminentajn personojn de nia lando: Komence de la nuna jaro Karl Marks kiel scienca fondinto de la marksismo, je la fino de jaro la reformatoron Martin Luther. Ambaŭ homoj donis al nia lando kaj al la tuta mondo fortajn historiajn impulsojn.

Nia ŝtato, la Germana Demokratia Respubliko, estimas la progresemajn tradiciojn. Inter ili ankaŭ tiujn de Martin Luther. Jam en la jaro 1980 nia ŝtata registaro fondis por la jubileo okaze de la 500-a datreveno de naskiĝo de Martin Luther komitaton, kies prezidanto estas la ĝenerala sekretario de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio kaj prezidanto de la ŝtatkonsilantaro, Erich Honecker.

Ni ĉiuj konas la signifon de la granda germana reformatoro kun ties meritoj kaj limoj, kiu staras en la vico de aliaj landaj reformatoroj, kiel de Jan Hus, Zwingli, Calvin kaj aliaj.

En la pasinta tempo la jubileajn honorojn de Martin Luther oni ofte uzis por la interesoj de la burĝa kaj monopola klaso kaj tiel misuzis la verkon de la reformatoro. Nur en la nuna tempo ni provas envicigi la personon Martin Luther objektive en la historian procezon kaj konscias pri liaj grandeco kaj limo. Historie Germanio en la mezepoko troviĝis en socia krizo. La feŭdismo batalis por sia potenco, sed la frukapitalismo jam estis survoje al la venko. La kontraŭdiro inter riĉuloj kaj malriĉuloj kreskis kaj pliakrigis la situacion.

La nobelaro kaj la kampularo pli kaj pli estis subpremitaj de la komercistoj kaj uzuristoj, kaj krome la kampularo flanke de la feŭdaj sinjoroj. Komenciĝis evolui per tiu konstelacio komerca kaj manufaktura burĝaro kaj aliaflanke la ĝermoj de venonta proletaro. Malsukcesis ankaŭ la provoj de ŝtataj reformoj, kaj la krizo kreskis. En urboj kaj vilaĝoj la homoj ribelis kontraŭ la cirkonstancoj, kaj la situacio plimalboniĝis. La kampuloj alianciĝis sub la signo de „Bundschuh" kaj ankaŭ la literaturo kaj arto penis pri nova hombildo kaj mondkoncepto.

En la mezepoka tempo la papa eklezio havis fortan potencon kaj influon je la tuta vivo de la homoj. Preskaŭ nenion oni povis decidi sen la papo en Romo.

Dum tiu ĉi tempo kreskis la kritiko kontraŭ la papismo, kiu estis helpilo kaj apogilo de feŭdismo. La iama eklezio ne nur estis centro de la spirita vivo sed ankaŭ de la materiaj riĉaĵoj. Gigantaj terposedaĵoj apartenis al ĝi. Ekleziuloj estis regantoj, kaj ĉie la papo regis per ili. Tiun ĉi potencon oni ne povis rompi per politikaj agadoj. Tio nur estis ebla el la interno de la eklezio mem.

La decida impulso venis de la unue nekonata monako Martin Luther. Lia profunda kaj firma kredo donis al li la forton al nova dogma intuicio, kiu skuis la eklezion.

Luther konstatis el la studado de la biblio novan rilaton inter Dio kaj la homoj, la pravigon antaŭ Dio sole el la kredo.

Laŭ la fundamento de la biblio Luther ankaŭ postulis politikajn, sociajn kaj ekonomiajn ŝanĝojn.

Ĉar tiuj ĉi postuloj plaĉis al multaj homoj la lutera teologio sukcesis inter ili. La batalo kontraŭ la Roma eklezio komenciĝis, kaj ĝi similis preskaŭ al revoluciaj ideoj: la reformacio.

Pro ĝi Luther havas daŭran historian meriton.

Sed ne nur la kredo iniciis Luther. Li mem devenis el familio kun kamparana sfero. Martin Luther konis la malriĉan vivon dum sia infaneco.

Kiam Luther naskiĝis, la 10-an de novembro 1483 en Eisleben, la gepatroj konis malriĉon kaj mizeron. La patro devis ŝanĝi la laborejon, ĉar la antaŭa ne plu povis nutri la familion. En la Eisenacha tempo dum lernado en la latina lernejo li loĝis en la domo de sinjorino de Cotta, kaj Luther devis kune kun aliaj lernantoj kanti en knaba koruso por almozpeti.

La viva vojo pri la studenta tempo en Erfurt ĝis la monaka en Erfurt kaj Wittenberg donis al li la komprenon pri la vera vivo. Ankaŭ tio formis Martin Luther por la venontaj decidoj.

Post vojaĝo el la monakejo en Wittenberg al Romo, li ĉagreniĝis pri la riĉeco de la papa eklezio, kiu promesis al la malriĉuloj la ĉielan paradizon post pago de mono al la eklezio. Hejme la servantoj de la eklezio postulis la monon de la malriĉa popolo per indulgenco, kaj en Romo la papaj ekleziuloj malŝparis la saman monon.

La 31-an de oktobro 1517 Martin Luther protestis inter alie kontraŭ la indulgenco kaj fiksis en Wittenberg sur la pordon de la kastela preĝejo la 95 tezojn.

La tezoj kontraŭis la eklezian kontrolon kaj postulis la predikon de la evangelio kiel veran taskon de la ekleziuloj. Ĉiuj neekleziaj aferoj apartenu al la monda, politika kaj ŝtata institucioj.

La reformo de Luther ne nur ŝanĝis la eklezion sed ankaŭ la tutan socian vivon. Malgraŭ plej fortaj atakoj flanke de la eklezio li defendis kuraĝe sian ideon firme kaj persiste.

Tiu ĉi sinteno estas la propra persona grandfaro rilate al la disvastigo kaj disvolviĝo de la fruburĝa revolucio kaj li restis firma kontraŭ la multnombraj kontraŭuloj.

En la jaro 1520 Martin Luther publikigis unu el la ĉefverkoj de la reformacio „Al la kristana nobelaro de germana nacio por plibonigo de la kristana klaso". En ĝi li skribis kontraŭ la eklezia kontrolo kaj kontraŭ la praktiko de ekspluatado pere de la papa eklezio. Ekestis burĝa urba opozicio kiel popolamasa movado, kiu estis subtenita de metiistoj, submajstroj, butikistoj, studentoj, instruistoj, pastroj, predikistoj kaj monakoj. Unue ĉiuj grupoj kunlaboris laŭ la lutera ideo kaj poste ili disiris, sin apogante al Luther malgraŭ kontraŭaj celoj.

Ĉar la popolo subtenis Luther kaj ĉar li kredis esti ilo de Dio, li ricevis sufiĉe da forto firmteni la ideon, kvankam la papo minacis per proskripcio.

Luther rezistis dum la Regna Parlamento en Worms aprile 1521 kontraŭ la imperiestro Karl la kvina. Per tio li atingis moralan venkon de la reformacio, kiu estis la antaŭagado por la fruburĝa revolucio. Luther estiĝis per sia decido simbolo de karaktera forto kaj konvinka fido.

Tamen la edikto de Worms eligis Martin Luther el la socia vivo, sed la popolama-

soj kaj parto de la germanaj princoj subtenis lin. Tio ankaŭ estis la kaŭzo kial princelektisto Friedrich de Saksio eldanĝerigis Luther kaj kaŝis lin sekrete dum kelkaj monatoj en la Wartburg ĉe Eisenach.
Dum la restado en la kastelo Wartburg Luther faris la plej grandan kulturan grandfaron. Li tradukis la novan testamenton germanlingven. Per tio li kreis fundamenton por komuna germana lingvo en ĉiuj landpartoj.
Iom post iom ekestis komuna lingvo, kiu gravis por la komencaj ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj rilatoj inter la germanaj landoj, kaj tio signifis grandan prosperon de la frukapitalisma ekonomio.
Por tradukado Luther uzis la gepatran lingvon de la simpla popolo, trafajn vortojn, frazojn kaj vortsimbolojn. Li rigardis sur la buŝon de la simplaj homoj kaj pro tio li sukcesis. Li formis novajn vortojn, kiuj ekzistas ĝis hodiaŭ kiel ekzemple la germana vorto „profesio", tio estas „Beruf".
Poste li ankaŭ tradukis samspece kune kun siaj amikoj Philipp Melanchthon, Johannes Bugenhagen kaj aliaj la malnovan testamenton germanlingven. Per tio ĝi restas daŭra monumento de traduka arto ĝis hodiaŭ.
Ĉar Luther enkondukis la novkreitan germanan lingvon en la teologian literaturon li atingis agnoskon ankaŭ en la scienco. La eltrovo de la libropresarto per Johann Gutenberg disvastigis la verkojn de Luther kaj donis fundamenton por la germana lingvouzado.
Ankaŭ sekve de reformaciaj ideoj kaj postuloj de Luther komenciĝis grandnombra popolmovado, la kamparana milito sub la gvidado de Thomas Müntzer. La kamparanoj esperis subtenon de Luther kaj batalis per la ideoj de Luther kontraŭ la feŭda sistemo. Luther ne konsentis la kamparanajn batalmetodojn. Li provis atingi pacan harmonion. Luther apelaciis al la princoj plifaciligi la situacion de la kamparanoj. Paca solvo ne sukcesis kaj la kamparanoj ne havis sufiĉe da pacienco atendi miraklon.
Pro tio Luther skribis bedaŭrinde la verkon „Kontraŭ la rabistaj kaj murdaj bandoj de kamparanoj", en kiu li alvokis detrui la ribelon per ĉiuj eblecoj. Kvankam tiu ĉi verko ne havis ion signifon rilate al la malvenko de la kamparanoj en la kamparana milito la reformatoro perdis multe da simpatio. Estis tragiko de Luther starante en antagonismo inter sia rolo kiel iniciatoro de popolamasa movado kaj sia limigita celo, originanta en la burĝa moderna socio. Sed laŭ la lutera intenco la fino de la kamparana milito estis favora por la reformacio, ĉar Luther serĉis la interkonsenton inter la princoj kaj la eklezio.
Montriĝas la limo de Luther en sia penso kaj en la historia burĝa embaraso.
Tamen la ideoj de Luther disvastiĝis en



Martin Luther, laŭ lignogravuraĵo de Lucas Cranach.

Foto Zentralbild

aliajn eŭropajn landojn. En tiuj ĉi landoj la reformacio efikis kaj antaŭpelis la solvon de profundaj kontraŭecoj de la feŭda socio. Baldaŭ Eŭropo eniris la epokon de la burĝa revolucio.

La Lutera reformacio okazis en nordaj, okcidentaj kaj sudaj landoj de Eŭropo. Laŭ la modelo de Luther oni tradukis la biblion en pluajn popollingvojn.

Ankaŭ la kulturo estis riĉigita flanke de pentristoj de la reformacio kiel Lucas Cranach, Matthias Grünewald, Hans Holbein aŭ de la lignoskulptisto Tilman Riemenschneider kaj aliaj, kiuj kreis novan bildon de la homaro.

Krome post Luther ekevoluis la lerneja laboro, la muzika kreade de Heinrich Schütz, Philipp Telemann, Johann Sebastian Bach, Georg Friedrich Händel kaj aliaj.

Multnombraj impulsoj por la homaro devenas de Luther, kiuj ankaŭ nuntempe valoras: la servo al la homo, sencplena laboro, protekto de la familio, ŝparemo k.t.p.
Fine ni povas konstati: En Germana Demokratia Respubliko oni zorgas pri la Luthermemorejoj. Multaj celoj de Luther estas realigitaj ĉe ni, inter alie la laboro de la nuna lutera eklezio en nia lando. Hodiaŭ la luteraj eklezioj kaj la aliaj religiaj grupoj laboras laŭ la konstitucio memstare kaj libere.
Do, la lutera heredaĵo estas bonkonservita ĉe ni kaj ni deziras, ke ankaŭ hodiaŭ la ideoj de Martin Luther, precipe tiuj pri la paco kaj paca komuneco en la tuta mondo, kreskos kaj venkos.

Letero de Maksimo Gorkij al la blankrusia esperantistaro

La Blankrusia Komitato de Sovetunia Esperantista Unuiĝo (SEU) elektis la faman verkiston Maksim Gorkij sia honora membro. Al Gorkij estis sendita membrokarto de SEU kaj letero. Responde al tiu ĉi elekto Gorkij skribis sekvantan leteron al la Blankrusia esperantistaro:

„Estimaj kamaradoj!
La aspirado krei lingvon komunan por ĉiuj homoj estas unu el tiuj arogaj ĝis frenezeco aspiroj, kiuj ĉiam servis, nun servas kaj ĉiam servados al la afero de la mondreorganizo laŭ la volo de la homo kaj por senlima progresado de la homkapabloj.
Estas nerefuteble, ke parolante unulingve la labora homaro multe pli baldaŭ komprenus la unuecon de siaj interesoj.
Oni argumentas kontraŭ Esperanto: ĝi estas artefarita lingvo; sed la lingvoj ne estas arte farataj. Mi ne scias, kiel estis kreataj la lingvoj tiutempe kiam la homo eksentis la necesecon paroli klarkonscie; la teorioj pri la paroldeveno ne ŝajnas al mi esti kontentige klarigantaj tiun procedon. Al mi ŝajnas, ke ni la homoj rajtas diri: ĉio tio, kio estas nomata de ni „kulturo", la tuta tiu „dua naturo", kiu estas kreata per nia scienco, tekniko, arto, unuvorte ĉio, kio apartigas nin de la bestaro, – ĉio ĉi estas „artefarita". La tekulero estas objekto artefarita same kiel la tranĉilo, la botoj, la ĉaro, la boato, la vaporŝipo, la aŭtomobilo, la libro, la muziko, la pentraĵo.
Por la homo, kiomgrade li estas besto, naturkonvenas langesuĉi aŭ trinki per manplato, vivi nuda, bleki, sed tute ne laŭnaturas elpensi Prometeon, Faŭston, Don-Kihoton.
Ni loĝas en domoj, urboj, inter objektoj, faritaj per la forto de nia racio kaj imago, per nia volo, por ke la vivo estu pli facila kaj agrabla por ni. Se ĉe la homoj aperas la konscio pri neceseco paroli ĉiuj en unu lingvo-tio ankaŭ estos farita. Ĉio sur la tero estas kreata per streĉo de nia volo, de nia imago, de nia racio. Estas jam tempo ke la homo sugestiu al si mem: mi ĉion povas. Oni devas timi neniujn arogaĵojn kaj frenezaĵojn en la sfero de laboro kaj kredo. La plej granda kaj admirinda el ĉio farita de la homoj estas la scienco, la arto, la tekniko. Kaj tiu, kaj la alia kaj la tria estas tute frenezecaj.

Mian saluton! A. Peŝkov"

6/II-28, Sorrento. Italio

(Bulteno de CK SEU, Moskva, 1928, n-ro 5-6, p. 42)

Wolfgang Borchert

La pano

Subite ŝi vekiĝis. Estis duono antaŭ la tria. Ŝi pripensis, kial ŝi vekiĝis. Aha! En la kuirejo iu puŝiĝis kontraŭ seĝo. Ŝi aŭskultis en direkto al la kuirejo. Estis silente. Estis tro silente kaj kiam ŝi tuŝis permane la apudan liton, ŝi trovis ĝin malplena. Tio estis, kio kaŭzis la eksterordinaran silenton: lia spirado mankis. Ŝi ellitiĝis kaj malcerte iris tra la loĝejo al la kuirejo. En la kuirejo ili renkontiĝis. Estis duono antaŭ la tria. Ŝi ekvidis ion blankan, starantan ĉe la kuireja ŝranko. Ŝi eklumigis.
Ili staris vidalvide unu de la alia, vestitaj per ĉemizoj. Nokte je duono antaŭ la tria. En la kuirejo.
Sur la kuireja tablo staris la pantelero. Ŝi vidis, ke li estis detranĉinta iom da pano. La tranĉilo kuŝis ankoraŭ apud la telero. Kaj sur la tablotuko estis paneroj. Ĉiam, kiam ili enlitiĝis vespere, ŝi purigadas la tablotukon. Ĉiun vesperon. Kaj nun paneroj estis sur la tuko. Kaj jen la tranĉilo. Ŝi sentis, kiel malrapide malvarmo rampis supren de la ŝtonplatoj. Kaj ŝi turnis la okulojn for de la telero.
– „Mi opiniis, ke io estus ĉi tie" – li diris kaj ĉirkaŭrigardis tra la kuirejo.
– „Mi ankaŭ aŭdis ion" – ŝi respondis kaj ĉe tio ŝi trovis, ke nokte, vestita per ĉemizo, li ja aspektis sufiĉe maljuna. Tiel maljuna, kiel li vere estis, sesdektri. Dumtage li kelkfoje aspektis pli juna. – Ŝi aspektas jam maljuna – li pensis, – ĉemizvestite ŝi do aspektas sufiĉe maljuna. Sed eblas, ke la hararo kaŭzas tion. Ĉe virinoj nokte ĉiam kaŭzas tion la hararo. La haroj tiam subite kaŭzas, ke ili aspektas tiel maljunaj.
– „Estus pli bone surmeti ŝuojn. Tiel nudpiede sur la malvarmaj ŝtonplatoj. Vi ja malvarmumos." –
Ŝi ne rigardis lin, ĉar ŝi ne povis elteni, ke li mensogis, ke li mensogis post tridek naŭjara edzeco.
– „Mi opiniis, ke io estis ĉi-tie" – li diris ankoraŭfoje kaj rigardis denove sensence de unu angulo al la alia. – „Mi aŭdis ion ĉi-tie. Tial mi opiniis, ke io estis ĉi-tie." –
– „Mi ankaŭ aŭdis ion. Sed verŝajne nenio estis." –
Ŝi formetis la teleron de sur la tablo kaj viŝis la panerojn for de la tuko.
– „Ne, estis verŝajne nenio" – li eĥis malcerte.
Ŝi helpis lin. – „Venu nun. Estis verŝajne ekstere. Enlitiĝu nur. Vi ja malvarmumos. Sur la malvarmaj ŝtonplatoj." –
Li rigardis al la fenestro. – „Jes, verŝajne tio estis ekstere. Mi opiniis, ke estis ĉi-tie." –
Ŝi levis la manon al la ŝaltilo. – Mi nun devas elŝalti la lumon, alikaze mi devos rigardi al la telero, ŝi pensis. Mi ja ne darfas rigardi la teleron.
– „Venu nun" – ŝi diris kaj elŝaltis la lumon – „verŝajne tio estis ekstere, la defluilo ĉiam batas kontraŭ la muro pro la vento. Estis certe la defluilo. Se ventas ekstere, ĝi ĉiam klakadas." Ambaŭ ili palpiĝis tra la malhela koridoro al la dormoĉambro. La nudaj piedoj klakis sur la planko.
– „Ja ventas" – li opiniis. – „Vento jam regis dum la tuta nokto." – Kiam ili kuŝis en lito, ŝi diris: – „Jes, vento jam estis dum la tuta nokto. Estis verŝajne la defluilo." –
– „Jes, mi supozis, ke tio estis en la kuirejo. Estis verŝajne la defluilo." – Tion li diris, kvazaŭ en duondormo.
Sed ŝi rimarkis, kiel malvere sonis lia voĉo, kiam li mensogis.
– „Estas malvarme" – ŝi diris kaj oscedis mallaŭte – „mi rampas sub la kovraĵon. Bonan nokton." –
– „Bonan nokton" – li respondis kaj ankoraŭ – „jes, estas jam sufiĉe malvarme." –
Tiam estis silento. Post multaj minutoj ŝi aŭdis, ke li maĉis mallaŭte kaj singarde. Intence ŝi spiris profunde kaj regule, por ke li ne rimarku, ke ŝi estis ankoraŭ maldorma. Sed lia maĉado estis tiel regula, ke ŝi malrapide ekdormis pro tio. Kiam sekvan vesperon li revenis hejmen, ŝi ŝovis al li kvar tranĉaĵojn da pano. Antaŭ li estis povinta manĝi ĉiam nur tri.
– „Facile vi povas manĝi kvar" – ŝi diris kaj iris for de la lampo. – „Mi ne povas bone digesti tiun panon. Manĝu facile unu plian. Mi ne povas digesti ĝin sufiĉe bone." –
Ŝi rimarkis, kiel li kurbiĝis profunde super la teleron. Li ne levis la okulojn. Ĉimomente ŝi kompatis lin.
– „Vi ja ne povas manĝi nur du tranĉaĵojn" – li diris rigardante al sia telero.
– „Sed jes. Vespere mi digestas ĝin nur malbone. Manĝu nur. Manĝu." – Nur post kelke da tempo ŝi sidiĝis ĉe la tablo sub la lampon.

Trad. H. Buth

Renato Corsetti/Maŭro La Torre

CELOJ KAJ POLITIKOJ EN LA ESPERANTO-MOVADO

0. Enkonduko

0.1. Ni celas per ĉi-tiu kontribuaĵo sisteme pritrakti la idearojn, kiuj far esperantistoj estas kunligataj kun Esperanto kaj kun la Esperanto-movado. Krome ni celas klare distingi inter ideoj rilatantaj disvastigon de Esperanto (por-esperantaj politikoj) kaj ideoj rilatantaj utiligon de Esperanto (per-esperantaj politikoj). Fine ni aparte insistas pri eblaj kunligoj inter la movado por internacia planlingvo kaj ĝeneralaj politikaj ideologioj.

0.2. Necesas tuj klarigi nian vidpunkton pri eblaj kunligoj inter ideologioj kaj lingvoj mem, do, iusence, pri naturo de lingvoj. Ĉirilate ni konsentas kun Detlev Blanke, kiam li asertas ke: „La koncepto, ke iu lingvo povas enhavi iun specifan idearon sole apartenantan al tiu konkreta lingvo, estas malĝusta."[1])

Tio validas por ĉiuj tiel nomataj naturajhistoriaj lingvoj, kaj marksismaj lingvistoj jam plurfoje klare kritikis la ideismajn konceptojn de lingvistoj, kiuj ekiras de malaj tezoj. Ni citu nur tre klaran kritikon de albana lingvisto A. Kostalari:

„En la granda malsameco de burĝaj lingvosciencaj[a]) teorioj de nia jarcento . . . oni povas selekti du ĉefajn grupojn, kiuj situas je la du ekstremoj de nur unu sama ideisma linio. Je unu flanko troviĝas teorioj, kiuj kuŝas sur la hipotezo de Sapir-Whorf,[b]) kiuj akceptas la kunligojn inter lingvo kaj socio . . . sed atribuas al lingvo . . . la estran lokon en ĉi-tiuj kunligoj . . . Ili simple inversigas la rilaton inter socio kaj lingvo. Ĉi-tiuj teorioj . . . igas ĉiun popolon daŭra sklavo de ĝia propra lingvo . . .

La alia ekstremo formatas de ankoraŭ pli granda grupo de lingvistoj . . . (ĝi) ekstermetas de la areo de lingvistika analizo la sociekonomiajn faktorojn, nomatajn eksterlingvaj. Ĝi klopodas eltiri la regulojn de lingvoj, kaj ekirante de biologiaj ecoj de homoj surbaze de „sinteno-psikologio", kiel faras L. Bloomfield kaj liaj disĉiploj, kaj ekirante de la lingvo uzata de unu izolita individuo, kiel faras la strukturisma skolo de Londono . . .

La vivo de lingvoj kaj ilia studado konfirmis, dum pli ol unu jarcento, ke la metodologio kiu permesas kompreni, taksi kaj solvi ĉi-tiujn problemojn en taŭga maniero estas dialektika kaj historia materiismo, kiu vidas lingvon fenomeno socia ekde ĝia naskiĝo ĝis kiam ĝi realigas naciajn kaj internaciajn funkciojn, komplika semantika sistemo aparttipa, kiu utilas kiel la plej grava rimedo por rilatoj inter individuoj de la homa socio."[2])

Do, ankaŭ Esperanto, ĉar ĝi estas lingvo nuntempe funkcianta kiel la ceteraj lingvoj, ne povas enhavi en si mem ion idean. Ideoj estas en la kapoj de la homoj, kiuj parolas Esperanton, en la esperantlingva socio, ne en la gramatikaj strukturoj de la internacia lingvo. Tre klare ankaŭ M. Isaev tion diras: „Per si mem ĝi (Esperanto) portas nenian idean ŝarĝon (laŭ socia signifo de la vorto). Oni povas uzi ĝin tiel por bono, kiel por malbono."[3])

Kompreneble, la rilatoj inter parolantoj de iu lingvo kaj parolata lingvo estas tiaj, ke la lingvo respegulas la ideojn de la parolantoj (se iu homgrupo distingas nur du kolorojn, ilia lingvo havos nur du vortojn por la kolor-gamo) kaj, siavice, ĝi povas peri tiujn ideojn al aliaj homoj, aŭ dialektike efiki por plifirmigi tiujn ideojn. Ĉiukaze, en la rilato homa socio lingvo, sendube homa socio estas la estra faktoro kaj lingvo adaptiĝas al la bezonoj de la homo.

Do, ĉio, kion ni diros poste, rigardendas ĉefe kiel ideoj, kiujn esperantistoj kunligas kun Esperanto aŭ kun la Esperanto-movado, ne kiel ideoj kiuj enestas Esperanton mem pro ĝia strukturo, gramatiko, ktp.

Elekto de iu lingvo aŭ de alia por uzo en iu situacio estas alia afero kaj ĝi ja havas ideologian valoron; sed pri tio ni parolos poste.

1. Ideoj kunligeblaj kun eklerno kaj uzado de Esperanto

1.1. La kialoj, pro kiuj homoj lernas kaj uzas ĝuste Esperanton kaj ne aliajn lingvojn, ĝenerale grupigeblas en tri kategorioj:

a) – utilecaj kialoj,
b) – ideologiaj kialoj,
c) – lingvistikaj kialoj.

1.1.1. Utilecaj kialoj estas tiuj de homoj, kiuj lernas Esperanton, ĉar ĝi estas utila por atingi difinitajn praktikajn privatajn celojn. Ankaŭ ĉi-tiuj kialoj estas pludivideblaj en du apartajn klasojn: utileco pro ekzisto de parolantaro de la lingvo (pro ekzisto de ia „merkato"), kaj utileco

pro la ecoj mem de ĉi-tiu lingvo (struktura facileco, ktp.).
En la unua klaso estas ĉiuj homoj, kiuj lernas ĝin pro pure privataj celoj, temu pri kolektado de poŝtmarkoj, trovado de knabino en internaciaj kongresoj, somerumado, malmultekosta restado eksterlande, aŭ io alia. Same, kiel ni vidos poste, multaj ne-esperantistaj instancoj uzas Esperanton ĝuste pro nura ekzisto de ĝia parolantaro.
Pri ĉi-tiu flanko de la afero sufiĉas rigardi kelkajn propagandilojn eldonitajn de asocioj kaj grupoj esperantistaj, por kompreni la gravecon de la praktikaj avantaĝoj. Cetere, ni enmetas en ĉi-tiujn praktikajn avantaĝojn ankaŭ trovadon de socia medio, de amikaro, kun kiu rilati. Ankaŭ turismo, ekzemple, estas parto de la praktikaj avantaĝoj. Ties gravecon oni komprenas, se oni konsideras ke la turisma Esperanto-kalendaro por 1976[c]) listigas 124 turismajn aranĝojn (kaj ili estas nur la plej gravaj).[4])
En la dua klaso estas la homoj, kiuj insistas pri la strukturaj ecoj de la lingvo mem. Oni argumentas ke Esperanto estas pli facila, pli racia, ol ĉiuj ceteraj lingvoj. (Tio, cetere, estas parto de la ĝenerala minimuma ideologio de la Esperanto-parolantaro.)
Tiajn argumentojn ofte eldiras, ekzemple, Helmar Frank en FRG, kiu klopodas per pure raciaj argumentoj konvinki homojn lerni Esperanton (ĉar la suma nombro de horoj necesaj por lerni ĝin estas malpli alta ol la suma hornombro necesa por lerni alian same efikan lingvon).[5])
Ankaŭ Antal Münnich,[d]) por trovi alian ekzemplon, klopodas pruvi en Hungarujo ke komputilaj firmaoj devas uzi Esperanton, ĉar ĝi pro strukturaj ecoj estas racie la plej taŭga solvo en komunikado inter homo kaj komputilo.
Similaj argumentoj reeĥas ankaŭ en deklaroj de gvidantoj de gravaj esperantistaj organizaĵoj. UEA daŭre insistas pri la ŝpareblecoj de UNo, UNESKO, ktp., kiuj konkretiĝus per uzado de Esperanto. Ankoraŭ en parolado farita en Lucerno dum la Universala Kongreso de Esperanto H. Tonkin, la prezidinto de UEA, diris ke la movado ellaboru „... du diversajn strategiojn, unu ĉefe direktitan al la industriaj landoj (kiuj kontribuas la plej grandan sumon por subteni UN-on kaj Uneskon), la alian direktitan ĉefe al tiuj membro-ŝtatoj, kies lingvoj ne estas nuntempe uzataj en la laboro. La unua devas devas emfazi la kostojn; la alia devas emfazi la diskriminacion."[6])
Same 1979 la 12-a konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj en socialismaj landoj alprenis „komunan starpunkton", kiu tekstas:
„En la epoko de la scienc-teknika revolucio Esperanto, kiel komunikilo por la sciencaj kaj teknikaj konoj, povas kaj devas grave kontribui, ke la scienco pli efike iĝu produkta forto."[7])
Oni devas rimarki ke tiaj ideoj, tia insistado pri la nur-utileca teknika flanko de Esperanto estas io tre malnova en la Esperanto-movado. Jam en la unua kongreso en Bulonjo estis akceptita la fama Deklaracio pri Esperantismo, kiu klopodis limigi la kunligon de Esperanto kun aliaj idealoj, kaj, do, insistis pri la nura praktika utileco de Esperanto. Ni memoru ke inter la ĉefaj apogantoj de la deklaracio estis De Beaufront, kiun Drezen epitetas „jezuito kaj obskurantulo".[8]
Tiom por diri ke ofte troa insistado pri la nur il-eca karaktero de Esperanto kaj de ties movado kaŝas emon preteratenti la politikajn-sociajn flankojn de la movado por internacia neŭtrala lingvo.
Tio estas la danĝera kontraŭflanko al la emociisma sinteno de Zamenhof kaj de aliaj „intern-ide-anoj" kiuj emas vidi precipe nur la mond-savajn ecojn de la lingvo internacia.
1.1.2. Tuj kiam ni forlasas la kampon de utileca uzo de Esperanto kaj klopodas trovi komunajn kunligajn idealojn, kiuj validu por la tuta esperanto-parolanta komunumo, ni renkontas grandajn malfacilaĵojn. Ĉu fakte ekzistas kelkaj ideoj, ni ne parolu pri ideologio (= ide-sistemo), komunaj je ĉiuj esperantistoj?
Tre zorga analizado de la itala esperantistaro, al ni bone konata, kaj komparoj kun eksterlandaj esperantistoj, kondukis nin al la konkludo ke nur io minimuma, tre limigita, komunas por ĉiuj. Tio estas: ĉiuj esperantistoj konsentas pri tio ke planlingvo eblas, ke ĝi bonas por la homaro, ke Esperanto disvastigindas. Tio estas la 1-a ŝtupo de la bildo en 1.2. (Eĉ pri ĉi-tiu ideo parto de la homoj kiuj lernis Esperanton, kaj utiligas ĝin por privataj celoj, ne tute konsentas.)
Se ni klopodas plukonstrui sur ĉi-tiu komuna bazo, ni vidas ke tuj ekestas tre profundaj malsamecoj, ĉar ĉiu esperantisto estas influata de sia „eksteresperantuja" ideologio kaj mondpercepto.
Kiel duan stupon ni trovas, fakte, ian tre nebulan esprimon de ideoj pri interindividua frateco, homa frateco, homeca internaciismo, ktp. Ĝenerale, portantoj de tiaj ideoj rifuzas plu analizi la implicaĵojn de tiuj ideoj en la praktika internacia vivo, kaj, kiam ili faras tion, oni tuj vidas, ke malantaŭ tiuj ĝeneralaj vakuaj esprimoj kaŝiĝas tute malsamaj subkomprenitaĵoj, ĉar, ekzemple, por katoliko „homa frateco" ne implicas „justecon inter la fratoj" aŭ „egalecon inter homoj", dum tio memkompreneblas por marksisto. Por kelkaj politike reakciaj esperantistoj, kiuj tamen parolas pri „paco", tiu koncepto simple kaŝas deziron pri pluvivo de la „nuna situacio", evito de „malordo", evito de „klasbatalo", ktp.
En ĉi-tiu dua ŝtupo troviĝas preskaŭ ĉiuj grandaj „neŭtralaj" organizaĵoj. Ni vidos ekzemplojn en postaj sekcioj, kiam ni pritraktos la statutojn de UEA, de TEJO kaj de Itala Esperanto-Federacio.
Post ĉi-tiu dua ŝtupo, sur la tria, do inter tiuj kiuj pluanalizas la soci-politikajn impliĉaĵojn de ideoj pri monda frateco, ktp., ni trovas plurajn malsamajn evoludirektojn, kiuj estas inter si tute ne akordigeblaj.
Unuflanke staras Zamenhof, kiu emfazas la rolon de religio. Do, li opinias ke neŭtrala lingvo kaj neŭtrala religio estas nepraj iloj por monda kaj genta (= etna) frateco, ĉar li vidas en lingvaj kaj religiaj baroj la kaŭzojn de gentaj malpacoj. (Kompreneble Zamenhof ne estas tiel facile klasigebla, kaj Drezen mem tre multe nuancas siajn pritaksojn de la zamenhofaj ideoj, ĉar en kelkaj paroladoj, kaj precipe en la lastaj jaroj, Zamenhof pli kaj pli montras ekkomprenon de la limoj de lingvo kaj religio kiel estigantoj de internaciaj problemoj. „Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio, aŭ alia socia klaso, ol mi, mi rigardas kiel barbareco.")[9])
Apud Zamenhof, en ĉi-tiu emfazado de religiaj malsamecoj, kaj en la kunligo inter Esperanto kaj religiaj konceptoj, estas kelkaj movadoj kiel la Bahaa Esperanto-Ligo, Oomoto kaj la brazilaj spiritistoj.
Duan lokon okupas homoj, kiuj aparte emfazas la interŝtatan justecon kaj la neceson uzi Esperanton, kaj ĝuste Esperanton, por certigi justecon inter reprezentantoj de diversaj ŝtatoj. Inter tiuj ni povas lokigi ankaŭ Lapenna,[e]) kaj certe la okcidenteŭropajn federistojn.[f])
Trian lokon okupas kelkaj, malmultaj, homoj, kiuj kunligas Esperanton kaj strebadon por liberigi ĉiujn etnojn (ankaŭ interne de ŝtataj limoj) kaj permesi utiligon de ĉiuj etnaj lingvoj je loka nivelo. IKEL (la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) estas la tipa reprezentanto de ĉi-tiuj ideoj.
Kvaran lokon okupas kelkaj homoj, kiuj kunigis ideojn pri kontraŭimperiismo kun Esperanto kaj produktis ideojn pri kontraŭimperiisma luktado en lingva te-

reno (kontraŭ-lingvoimperiismo). Reprezentantoj de tiu tendenco naskiĝis ĉefe en la rondo de TEJO-KER[g]) kaj pluagas en kelkaj okcidenteŭropaj landaj asocioj.

Tute apartan lokon okupas Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Komence ĝi kunigis Esperanton kaj konceptojn pri formortado de ŝtatoj. En la novembra numero de la jaro 1920-a de la revuo „Esperantista Laboristo" tiuj konceptoj estas klare esprimitaj:

„. . . La demando estas jena: ĉu la nacioj estas la lasta gardo de la evoluo ĉe la homaj socioj? Ĉu do, kiam unu sola helpa lingvo estos parolata de ĉiuj en la mondo, oni devos tamen ankoraŭ konservi la nunan formon por la rilatoj inter la homgrupiĝoj? Kiu aŭdacus respondi jese? . . . Sed, ĉar ni estas samlingvanoj, ni volas tuj profiti tiun rimedon, por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio."[10])

Nun SAT fariĝis tre pli malfacile analizebla asocio, kie pluvivas ĉiuj utopiaj konceptoj pri nova monda ordo, kune kun anarĥiismo kaj la origina sennaciismo.

Ĉiuj diritaj „skoloj" produktis originalajn fandaĵojn de Esperanto kaj aliaj ideologioj. Por kompreni, kiom ĉi-tiuj teoriaj „fandaĵoj" diferencas inter si, sufiĉas konsideri ke spiritistoj praviĝas la uzon de Esperanto pro la mediumaj ecoj de Zamenhof, dum kontraŭ-lingvimperiismuloj pravigas la uzon de Esperanto surbaze de politika analizo de la monda situacio, kiu similas je tiu far la nealianciĝintaj landoj.

Alispeca ekzemplo estas la kazo de kristanoj kaj komunistoj, kiuj ĝis nun, laŭ nia scio, ne kunligis teorie Esperanton kaj siajn ideologiojn, ne pravigis uzadon de Esperanto per sia propra ideologio. Do, ili tenas siajn celojn disaj, kiel ni ekzempligos poste.

1.1.3. Ekzistas, fine, homoj kiuj lernas la internacian lingvon, ĉar ili interesiĝas pri lingvoj kaj lingvistikaj demandoj. Inter ili troviĝas ĉiuj sciencistoj, kiuj, per Esperanto, observas la funkciadon de planlingvoj kaj de la rilatantaj problemoj.

Tiu homgrupo tre gravas por plua evoluo de la movado por internacia planlingvo, kvankam eble oni foje supertaksas ĝian gravecon.[11]) Pri ili vidu ankaŭ nian postan subĉapitron 2.3.

1.2. Skemo

Nun ni klopodas per skemo prezenti la ideologiojn kunligitajn de la uzantoj de Esperanto, kun Esperanto mem aŭ kun la movado por ĝi.

Jam en la antaŭaj sub-ĉapitroj ni aludis je la signifo de la ideaj ŝtupoj.



2. Por-esperantaj organizaĵoj: celoj kaj idearoj

Ni vidu nun kie situas, rilate la antaŭan teorian skemon, poresperantaj organizaĵoj, t.e. tiuj organizaĵoj kiuj difinas sia ĉefa tasko disvastigon de Esperanto. Kaj ni komencu, kompreneble, de la plej ĝeneralaj: UEA kaj TEJO.

2.1. UEA/TEJO[h])

Ni analizu unue la statutojn. Laŭ la nun valida statuto de UEA, la celoj de UEA estas:

„a. Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;

b. Plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvoj"[12])

Tiujn celojn ĝi klopodas atingi, interalie, ĉar ĝi klopodas:

„. . . Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj."[13])

En la statut-projekto submetota al aprobo de la membraro en la venonta jaro estis aldonita la celo:

„b. Agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, kaj faciligi la internacian komunikadon"[14])

TEJO, la junulara sekcio de UEA, laŭ sia statuto havas la samajn celojn de UEA, je kiuj ĝi aldonas nur okupiĝon pri:

„la nuntempaj problemoj de la junularo – kun speciala konsidero al internacia lingva komunikado."[15])

Se ni limigus nin je la cititaj tekstoj, UEA estus esence organizaĵo, kiu ĉefe difinas sin disvastiganto de Esperanto. Do, ĝi ne havas propran idearon krom tiu minimuma akceptebla por la tuto de la Esperanto-parolanta komunumo: tial ĝi situas en la unua ŝtupo. Je tio aldoniĝas, en la malnova statuto, nur ideoj pri interhoma solidareco, kiuj estas en la dua ŝtupo montritaj de ni: la ŝtupo de ĝenerale nebulaj ideoj pri interhoma rilatado. En la nova statut-projekto de UEA timeme enŝoviĝas aludo je la „lingva problemo en internaciaj rilatoj", kio montras, ke UEA pretas ekrigardi ankaŭ la ne-nur-individuajn lingvajn problemojn.

Sed, memkompreneble, statutoj estas io, kaj realo estas io alia!

Se ni rigardas la sintenon de UEA-gvidantoj, ni trovas ke jam Lapenna estis alveninta al ideoj pri interŝtata egaleco, kaj ke la nuna estraro jam komprenas la socian dimension de lingvo, kaj la politikajn implicaĵojn de Esperanto. Ni citu, inter multaj citeblaj tekstoj, nur tekston de la redaktoro de la revuo de UEA:

„. . . ĉar batali por Esperanto signifas batali por lingva egaleco, por digno, kaj por tiuj implicitaj lingvaj (homaj) rajtoj el la Deklaracio, kiam ni do laboras por Esperanto, ni jam troviĝas en la mezo de la batalkampo per la homaj rajtoj."[16])

Aliflanke en la nuna estraro de UEA tute malaperis ideoj pri Esperanto, kiel magia solvilo de ĉiaj homaj problemoj. Ĉiu kiu legas la lastjarajn paroladojn de la nuna prezidanto de UEA trovas plurloke klarajn indikojn pri la kompreno, ke lingvaj problemoj estas nur part(et)o de la homaj problemoj, kaj ke Esperanto estas potenciala solvo nur de lingvaj problemoj. Asertoj pri la mistera forto de Esperanto kaj pri la solvo de mondaj problemoj, kiel sekvo de solvo de lingvaj problemoj tute forestas.

Se, aliflanke, ni rigardas la UEA-membraron, ni trovas la tutan troveblan gamon de esperantistoj. Ĝenerale, laŭ nia impreso, la membraro estas proporcie tre pli multe influata de la ideoj de an-

taŭaj estraroj. Do, ĝi ideologie troviĝas iom malpli alte ol la estraro. Ĉi-rilate indus detala analizo pri la membraro de UEA. Pro spaco-manko ni simple resendas al la studoj, ekzemple de P. Forster[17]) cetere kompletigindaj, laŭ kiuj UEA-membraro ĉefe interesiĝas pri eblecoj de personaj rilatoj en la movado mem.

2.2. Landaj Asocioj

Pro tio ke esperantistoj estas anoj de siaj socioj, iliaj ideoj influatas far la regantaj ideoj de tiuj socioj. Tio influas ankaŭ ilian sintenon, kiam ili okupiĝas pri Esperanto.
Birdokula rigardado de statutoj kaj revuoj de Landaj Asocioj montras tute klare ke okcidenteŭropaj landaj asocioj difinas sin ĉefe kiel la malnova UEA, tio estas, kiel nuraj disvastigantoj de Esperanto. Ekzemple, la statuto de Itala Esperanto-Federacio insistas pri tio, ke ĝia „. . . nura celo . . ." estas „. . . disvastigi la internacian lingvon Esperanto."[18])
Same pluraj statutoj de lokaj esperantistaj grupoj paŭsas tiujn celojn kaj foje aldonas kelkajn nebulajn esprimojn pri homa frateco.
En socialismaj landoj, apud la celo pri disvastigo de Esperanto, oni aldonas celojn kiuj estas en konsento kun la ideoj regantaj en tiuj landoj pri internaciismo, malstreĉiĝo kaj paco, kiuj, cetere, tre bone akordiĝas kun la celoj de la ĝenerala Esperanto-movado. Ekzemplo-cele ni citu la decidon de la Tutsovetia Fonda Konferenco de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj:
„Dekretante la fondon de la Asocio de sovetiaj esperantistoj, la Konferenco DECIDAS:
1. Konsideri ĉefa tasko de la Asocio kaj ĝin enirantaj esperantistaj organizaĵoj partopreni, helpe de la lingvo Esperanto, en firmigo de amikeco kaj evoluigo de kulturaj ligoj de la sovetia popolo kun popoloj de eksteraj landoj por interesoj de firma paco, sekureco kaj kunlaboro; helpi al esperantistoj pri studado aŭ profundigo de scioj de la lingvo Esperanto; eduki ĉe la sovetiaj esperantistoj la sentojn de patriotismo kaj internaciismo, nekompromisemo al reakcia ideologio, al faŝismo, koloniismo, rasa diskriminacio kaj socia maljusto. La Asocio kontribuos al evoluigo de la internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj kaj kunordigos la agadon de lokaj Esperanto-organizaĵoj en la interna kaj internacia sferoj."[19])
Sed oni devas tre klare emfazi, ke en aliaj landoj, kie la politika „klimato" estas alia, esperantistoj kutime adaptas sin al la medio. Krom la konataj ekstremaj kazoj de faŝismiĝo en faŝismaj landoj antaŭ la 2-a mondmilito, ekzistas pluraj mezvojaj kazoj ankoraŭ nun.

2.3. Pri-esperantaj aŭ pri lingvopolitikaj agadoj

Inter la homoj kiuj lernas Esperanton pro intereso pri lingvistikaj problemoj, elstaras kelkaj esperantistoj/sciencistoj, kiuj okupiĝas pri scienca studado de la fenomeno „Esperanto".
Pro sia scienc-objektiva karaktero ili difinas sin kaj siajn instituciojn kiel pri-esperantajn aŭ pri-interlingvistikajn okupiĝantojn. Kiam ili sukcesas kuntreni ankaŭ neesperantistojn, objektiveco estas eĉ pli certa.
Necesas mencii ĉi-rilate CED,[i]) universitaton Etvös Lorand en Budapeŝto, la problemgrupon en la Soveta Scienca Akademio, ktp. Ĉi-tiuj homoj, tamen, ne estas, nek ili devas esti, kreantoj de ideologioj pri aŭ por la Esperanto-movado.

3. Per-esperantaj organizaĵoj

Ĉu la per-esperantaj organizaĵoj ideologie diferencas de la por esperantaj?
Necesas distingi ideologi-markitajn fakajn organizaĵojn (kies celo estas klare kunligita kun difinita politika idearo), kaj ne-ideologiajn organizaĵojn (kiuj okupiĝas pri teknikaj, partaj demandoj).

3.1. Ideologi-markitaj fakaj organizaĵoj

Kelkaj, eĉ grandaj kaj gravaj fakaj organizaĵoj simple apudmetas du sendependajn celojn, kaj ne klopodas unuigi ilin. Inter ili ni esploru iom pli detale MEM kaj IKUE, do la asociojn de pacemuloj kaj katolikoj.
MEM kunigas ĉefe komunistajn pacemulojn,[j]) kiuj difinas la kondiĉojn por paco laŭ komunistaj analizoj. La tria artikolo de MEM-statuto klarigas ĝiajn specifajn celojn jene:
„a. *Kiel unua kaj ĉefa tasko,* instigo al ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj partopreni la defendon de la paco, kune kun registaraj kaj neregistaraj organizoj/politikaj, sindikataj, porpacaj, religiaj, kulturaj, kc. . . . sur la bazo menciita en artikolo 2, kaj notinde kun Monda Packonsilantaro kaj ties landaj, urbaj sekcioj.
b. Surbaze de tiu kunlaboro en la porpaca batalo fare de la esperantistaro, instigo en oportuna momento al la menciitaj organizoj utiligi Esperanton por siaj internaciaj rilatoj, paralele kun naciaj lingvoj, kaj senatende utiligi Esperanton en la servo de la pacbatalo."[20])
Do, klare, Esperanto kaj paco estas du aĵoj same valoraj kaj antaŭenigendaj, sed ankaŭ senrilataj.
Tiu senrilateco evidentas ankaŭ en la enhavo de revuo Paco, kie apud-estas du tute sendependaj en-havoj. Unuflanke politikaj artikoloj pri pacmovado kaj pri mondaj okazaĵoj, kaj, aliflanke, pure prilingvaj artikoloj. Analizo de la artikoloj en la numero 4-a de 1979 de Paco indikas ke apud 5 pripolitikaj artikoloj, troviĝas 3 prilingvaj artikoloj, 4 primovadaj artikoletoj, kaj 3 noveloj.
Saman bildon montras IKUE.
Ĝia 2'a statut-artikolo parolas pri la celo de la asocio jene: „IKUE celas certigi katolikan ĉeeston en la antaŭenironta Esperanto-movado; ĝi intencas promocii studadon kaj praktikadon de la internacia lingvo esperanto en religia, pedagogia, beletrika kaj scienca temoj, laŭ la katolika kredo."[21])
Analizo de la enhavo de la numero 5'a de 1979 de Espero Katolika ankaŭ montras apud-eston de artikoloj pri religiaj temoj (10), primovadaj temoj (8) kaj prilingvaj temoj (1).
Pri la kunigo de Esperanto kaj aliaj politikaj ideoj far etnistoj kaj SAT-anoj ni jam parolis kaj ne necesas pli longe nun pritrakti asociojn kiel IKEL kaj SAT. Ni nur rimarku, ke tio tamen montras, ke ekzistas ideologi-markitaj asocioj kiuj kunligas Esperanton kaj aliajn idearojn.

3.2. Ne-ideologiaj fakaj organizaĵoj

Ankaŭ la peresperantaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri pure „teknikaj" demandoj, de aŭtomobilistoj ĝis filologoj, apudmetas du celojn. Unuflanke ili celas kunigi esperantajn samfakulojn kaj tiel ebligi peresperantan samfakan kunlaboron.
Aliflanke ili celas disvastigi Esperanton inter neesperantistaj samfakuloj (kaj tiucele pretigas fakajn terminorojn, revuojn, ktp.). Ĉi-tiuj du apudmetitaj celoj klare evidentas en la celdeklaroj de pluraj fakaj asocioj. Ni citu nur kelkajn. Internacia Naturista Organizo Esperantista celas „. . . diskonigi la naturistajn ideojn en la esperantistaj medioj; disvastigi la uzadon de Esperanto en la naturistaj medioj".[22])
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) deklaras sian intencon „. . . disvastigi la uzadon de Esperanto inter fervojistoj . . . interkonatigi . . . fervojis-

tojn, scipovantajn aŭ lernantajn Esperanon".[22])
Oni povus tiel daŭrigi pri ĉiuj „teknikaj" fakaj asocioj. Do, neniu el ili antaŭenigas ideologion, kiu estu super la nivelo de la minimumo akceptebla far ĉiuj Esperanto-parolantoj. Ilia vera originaleco kaj viv-pravigo konsistas el perado de Esperanto al fakaj medioj. Finfine ili estas por-esperantaj organizaĵoj, kie „per esperant-eco" estas ilo por pli efika disvastigo de Esperanto.

4. Neesperantistaj uzantoj de Esperanto kaj de Esperanto-movado

Neesperantistaj uzantoj de Esperanto aŭ de la esperantlingva komunumo estas homoj aŭ instancoj, kiuj nur uzas ĉi-tiun lingvon, kiel ili uzas aliajn lingvojn.
Ili estas homoj kaj instancoj kun propraj celoj, ideologioj, ktp. kiuj nur utiligas la komunikeblecon de Esperanto. Do, ili kiel instancoj neniel celas disvastigi la lingvon aŭ apogi ĝin.
Kiam firmao Fiat eldonas en Esperanto faldfolion pri novaj aŭtomobiloj, ĝi nur celas vendi tiujn aŭtomobilojn. La saman faldfolion ĝi eldonas ankaŭ en la hispana, franca, ktp.
Kiam la Pekina Fremdlingva Eldonejo eldonis verkojn de Maŭ Zedong en Esperanto, ĝi nur celis propagandi maŭismon.
Kiam Radio Varsovio parolas en Esperanto pri novaj polaj atingoj en konstruado de socialismo, ĝi nur celas informi pri Polujo.
En la plej multaj kazoj tiaj utiligoj estas rigardindaj nur kiel agnoskoj de la forto de la Esperanto-parolanta komunumo. Ili neniel rigardindas kiel miksaĵoj de la ideologio de la uzanto kun la ideologioj de esperantistoj. Se mi uzas la araban por propagandi, ekzemple, Esperanton, ne pro tio mi iĝas islamano.
Kvankam ĉi-tio ŝajnas klara, ni devas ĉiam ĝin substreki, ĉar multaj esperantistoj havas la fortan emon kredi ke uzantoj estas ankaŭ (aŭ iĝas) esperantistoj.
Alia afero estas nia klopodo por ke neesperantistoj uzu Esperanton. La „fina venko", cetere, okazos kiam ĉiuj neesperantistoj uzos Esperanton, sen samtempe iĝi esperantistoj laŭ la nuna senco.

5. Diskutproponoj

Surbaze de tio, kion ni ĝis nun diris pri la Esperanto-movado, ni prezentas nun kelkajn proponojn diskutigajn kaj eĉ provokajn.

5.1. Pri nur-utilecaj argumentoj

La fina celo de la Esperanto-movado estas uzado de Esperanto en ĉiuj kampoj kaj des pli en scienca kampo. Pro tio favorado de praktika apliko de Esperanto estas memkompreneblaĵo por esperantistoj. Nur per praktika apliko la granda utileco de la internacia lingvo povas klare evidentiĝi.
Tamen, en la nuna momento, Esperanto objektive ankoraŭ *ne* estas tiom utila. Malgraŭ ĝia facileco kaj la minimuma investado necesa por lerni ĝin, la rilato inter investado kaj utileco estas evidente tro pli alta ol por la ceteraj „grandaj" linvoj. Ĉiu ajn homo, kiu lasas sin gvidi *nur* de utilecaj, ekonomiaj kriterioj, plej bone investas sian tempon por lerni la anglan aŭ la rusan aŭ la francan, ktp.
Do, se oni volas konvinki homon, kaj precipe scienciston, lerni Esperanton (kaj se oni volas ne trompi lin), oni devas uzi ankaŭ alispecan argumentadon.
En la nuna momento propagandado de Esperanto per *nur*-utilecaj argumentoj (kio bedaŭrinde okazas ankaŭ en progresemaj medioj) estas malĝusta aŭ almenaŭ nesufiĉa, precipe se ni proponas la internacian lingvon al politike engaĝitaj homoj aŭ instancoj!
Al homoj kaj instancoj, kiuj estas politike maldekstraj (en la okcidenteŭropa signifo de „maldekstro"), oni devas proponi Esperanton per argumentoj kaj utilecaj kaj ideologiaj. En ĉi-tiu kazo ideologiaj argumentoj estu koheraj kun la politikaj ideoj de la alparolatoj, kaj do oni ne rajtas uzi la nebulan „internan ideon", sur kiu baziĝas tiom da esperantistaj varbklopodoj.

5.2. Neceso kunligi Esperanton kaj ideologiajn elektojn minimume en fakaj ideologi-markitaj organizaĵoj

En 5.1. ni parolis pri la neceso uzi ideologiajn argumentojn an la disvastigo de Esperanto en progresemaj medioj. (Sub la nocio „progresemaj medioj" ni komprenas kaj orienteŭropajn socialismajn homojn kaj instancojn kaj okcidentajn maldekstrulojn kaj triamondajn kontraŭkoloniistojn.)
In 3.1. ni estis substrekintaj, ke ideologi-markitaj fak-asocioj tenas siajn du celojn disaj. Do, ili ne klopodas sisteme kunligi la politikan celon de la medio en kiu ili agas kun la celo disvastigi Esperanton.
Ĉu, tiel agante, ili atingas la dezirindajn rezultojn?

5.3. Elektado de lingvo estas politika afero

En 0.2. ni diris, ke gramatikaj strukturoj ne entenas ideojn, ke ideoj estas en la kapoj de la homoj kaj ne en la lingvoj per kiuj tiuj homoj parolas.
Necesas tamen fari du gravajn rimarkojn.
Lingvo estas ilo per kiu en la praktiko esprimiĝas ĉefe difinita kulturo, la kulturo de ĝia parolantaro. Kvankam lingvo en si mem estas neŭtrala ilo, ne eblas nei ke per la angla esprimiĝas ĉefe la nuntempa usona kulturo dum per la suahila esprimiĝas alia kulturo (de orientafrika bordo). Ĉi-rilate, do, ne estas sensignife, ĉu oni elektas uzi la anglan aŭ la suahilan por lernado, uzado, ktp., ekzemple en Tanzanio, kaj Kenjio.
Ni kredas ke ne necesas plue emfazi ĉitiun punkton. Sufiĉas pensi pri la „lingvo-luktoj" en multaj mondopartoj kaj pri la solvo de la problemo de elekto de uzotaj lingvoj, pri kiu parolis kaj agis Lenin.
En tiu senco oni povas aserti ke se oni elektas uzi Esperanton (aŭ, cetere, iun ajn alian lingvon) oni plenumas politikan agon. La elekto de Esperanto certe estas tute neneŭtrala ago. Neŭtraleco, ĉikampe, postulas respektadon de la ekzistantaj lingvaj kutimoj je internacia nivelo.
Pro tio ke ĝi estas politika ago, elekto de Esperanto postulas politikan pravigon.
Alia rimarko rilatas precipe la strukturajn ecojn de planlingvoj. Ĉe ili ankaŭ la plan-maniero ne estas neŭtrala, sed sekvo de iu mondkoncepto de la plananto. Elekto de difinitaj vortoj, de ilia semantika kampo, de retorikaj figuroj, ktp. ja havas politikan signifon.
Pensu pri la relativa internacieco de Esperanto, kiu estas preskaŭ nur en-eŭropa, kaj malmulte atentas ne-eŭropajn kulturojn (ne temas nur pri vortaro, sed ankaŭ pri kulturaĵoj kunligitaj kun Esperanto).

5.4. Kiusence esperantistoj povas esti neŭtralaj?

Esperantistoj rajtas esti neŭtralaj nur rilate la valoron de malsamaj etnaj (naciaj) kulturoj. Ekde de unuaj tempoj de

la movado oni rediradis ke por esperantistoj malsamaj „gentoj" havas saman valoron.

Sed certe esperantistoj ne rajtas esti neŭtralaj antaŭ elekto de difinitaj lingvoj kiel internaciaj komunikiloj.

Ĉu, do, esperantistoj povas esti neŭtralaj antaŭ la disvastiĝo de la angla lingvo? Kaj ĉu ili povas esti neŭtralaj ĝenerale pri kultura imperiismo kaj pri imperiismo ĝenerale?

Same kiam temas pri internaciaj problemoj, kiuj rekte tuŝas la eblecojn de internacia komunikado, esperantistoj ne rajtas esti neŭtralaj. Ĉiuj verŝajne konsentas, ke esperantistoj ne rajtas esti neŭtralaj rilate al milito kaj paco.

5.5. Ĉu komunistoj rajtas esti neŭtralaj rilate lingvoelekton?

Sajnas al ni ke en internaciaj rilatoj komunisto estas iu, kiu volas atingi ankaŭ pli justajn rilatojn inter diversaj gentoj. Pro tio komunistoj ne favoras imperiismon aŭ superregon de unu lando je alia lando.

Konsekvence komunisto ne rajtas favori iun ajn superstrukturaĵon kunligitan kun imperiismo. La uzo de lingvo en internaciaj rilatoj estas superstrukturaĵo kunligita kun la speco de strukturaj rilatoj, kiuj establiĝas inter landoj.

Sekve komunisto devas favori Esperanton (aŭ similan planlingvon), ĉar ĝi estas rimedo por atingi pli justajn rilatojn (minimume je superstruktura nivelo) inter „fortaj" kaj „malfortaj" landoj.

6. Bibliografiaj notoj

1) D. Blanke (red.), *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1978, p. 200

2) A. Kostallari, *La langue litteraire albanaise contemporaine et les problèmes fondamentaux de son orthographe*, en Studia Albanica, 1/1973, p. 36–37

3) M. Isaev, *Pri la stato kaj pliefikigo de laboro de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigo de iliaj internaciaj ligoj*, en „der esperantist" 96 (4/1979) p. 8

4) T. Tyblewski, *Internacia Turismo de la Parolantoj de Esperanto*, en Esperanto-dokumentoj, 6, p. 5 (Rotterdam 1977)

5) Komparu ĉi-rilate la verkojn de Helmar Frank en Esperanto kaj en la germana, i. a. en „Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft" (Paderborn)

6) H. Tonkin, *Mi retiriĝos por resti*, en „Esperanto" 10/1979 (Rotterdam)

7) Laŭ raporto en „Budapeŝta Informilo", aprilo/majo 1979

8) E. Drezen, *Zamenhof*, Mospoligraf, Moskvo 1929, p. 21

9) vidu Drezen, Zamenhof, loko citika, p. 13

10) Historio de SAT, Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo 1953, p. 12–13

11) vidu Blanke, p. 185–186

12) *Statuto de UEA*, UEA, Roterdamo 1968, p. 3

13) Statuto de UEA

14 Cirkulero al komitatanoj de UEA, dissendita en oktobro 1978

15 *Statuto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*, TEJO, Belgujo 1978

16) S. Milojeviĉ, Esperanto mem estas homa rajto, en „Esperanto", 11/1978, Rotterdam

17) P. G. Forster, L'esperanto come movimento sociale e linguistico. En: Pensiero e Linguaggio in Operazioni, 7–8/julio-decembro/1971 (Milano)

18) Federazione Esperantista Italiana, Statuto, presejo Impronta, Torino, sen dato

19) Decido de la Tutsovetia Fonda Konferenco de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. „der esperantist", 96 (4/1979), p. 9

20) Statuto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), en La Pacakivulo, 113/1978

21) Statuto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, En Jarlibro 1977–68, IKUE, Nederlando 1968, p. 56

22) Komparu: Jarlibro 1979, UEA, Roterdamo 1979, ekde p. 39

7. Redaktoraj notoj

Sur la bazo de tiu-ĉi studo la aŭtoroj faris prelegon en la kadro de la internacia seminario „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", kiu okazis 1979 je invito de GDREA en Bad Saarow/GDR. La tutan tekston presis „La Verda Kolombo" en la n-roj 64 (aprilo-marto 1980), 65 (junio ĝis julio 1980) kaj 66 (aŭgusto-oktobro 1980). Krome la studo aperis en „Hungara Vivo" n-ro 5/1982.

Por faciligi la komprenon de kelkaj punktoj de la studo la redaktoro aldonis kelkajn notojn:

a) La aŭtoroj skribis „lingvika" anstataŭ „lingvoscienca".

b) La aŭtoroj preferis en la originalo la fonetikan transskribon Sepir Ŭorf.

c) La turisma kalendaro por 1982 jam entenis 245 aranĝojn, de kiuj tamen multaj estas de duba karaktero.

d) Komutilisto-programisto el Hungario, aŭtoro de la programada lingvo „Progreso".

e) Prof. d-ro Ivo Lapenna ĝis 1974 estis prezidanto de UEA.

f) Okcidenteŭropaj esperantistoj, kiuj proponas Esperanton kiel lingvon de la okcidenteŭropa komunumo.

g) KER: Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO.

h) Intertempe la nova statuto de UEA estas akceptita dum la UK 1979 en Lucerno/Svisio.

i) CED: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

j) *Ĉi-tie oni ne povas konsenti kun la aŭtoroj. MEM laŭ sia statuto kaj programo tute ne estas komunisma organizaĵo sed tre bonvenigas la kunlaboron de plej diversideologiaj pacamikoj.*

Interlingvistikaj libroj el Soveta Unio

1982 por la soveta esperantistaro estis tre fekunda jaro rilate al eldonado de interlingvistikaj kaj esperantaj materialoj. Reaperis la Esperanta-rusa vortaro de E. A. Bokarev, kiu atingis eldonkvanton de 100 000 ekzempleroj.

En malgranda libreto „Rasskazy o jazykw (rakontoj pri la lingvo) de V. M. Nikiteviĉ, kiu aperis en Minsk (38 000 ekz.) enestas ĉapitro pri Esperanto. La 80-paĝa libreto estas destinita por pli aĝaj lernejanoj.

La libro „Puteŝestvije v slovo" (Vojaĝo en la vorto) de E. A. Vartanjan, kiu ankaŭ enhavas ĉapitron pri Esperanto, reaperis en kvanto de 483 000 ekz. same 1982. Ankaŭ tiu libro estas destinita por lernantoj, sed por tiuj de pli altaj klasoj.

De aparta graveco por la lingvistiko kun influo je intelektaj rondoj, studentaro k.t.p. estas tri libroj pri interlingvistiko. Temas pri la antologio „Aktualn'ye problemy sovremennoj interlingvistiki" (Aktualaj problemoj de la nuntempa interlingvistiko) Interlinguistica Tartuensis 1, kiun redaktis Aleksandr Duliĉenko (200 p.), Tartu 1982. Oni planas eldoni pluajn volumojn. El la plumo de S. N. Kuznecov venas „Osnovye ponjatija i terminy interlingvistiki, Moskva, 80 p. (Bazaj konceptoj kaj terminoj de interlingvistiko) kaj „Osnovy interlingvistiki" (Fundamentoj de interlingvistiko), Moskva, 106 p.

Ambaŭ verkojn eldonis la universitato je la nomo Patrice Lumumba. De aparta gravaco estas la libreto de M. I. Isaev: Jazyk Esperanto. Eldonejo Nauka, Moskva 1981, 86 p., kiu aperis en la prestiĝa kaj tradicia serio „Lingvoj de la popoloj de Azio kaj Afriko". La broŝuro donas superrigardon pri la lingva strukturo de Esperanto kaj pri la Esperanto-movado.

D. B.

Leo Tolstoj, Esperanto kaj rusia ĝendarmaro

Kiel estas vaste konate, en la jaroj 1889–1895 en Nurnbergo aperadis la unua en la mondo E-gazeto „La esperantisto". En junio 1895 d-ro Zamenhof aperigis en la gazeto la artikolon de Leo Tolstoj „Kredo kaj prudento", malpermesitan en Rusio de la cara cenzuro. Pro tio la cara registaro malpermesis la alvenon de la gazeto en Rusion. Sed apartaj numeroj de „La Esperantisto" kun la artikolo de Tolstoj daŭre estis kaŝe legataj kaj transdonataj de unu al alia.

Unu el tiuj ĉi ekzempleroj atingis Voroneĵon. Pri tio eksciis la cara ĝendarmaro (sekreta polico) en Petersburgo (tiama ĉefurbo de Rusio) kaj la 9. 9. 1895 sendis tute sekretan ordonon al la Voroneĵa administracio de ĝendarmaro kaŝe esplori, kiu legadas la gazeton, senditan pere de disĉiploj de Leo Tolstoj al la lernanto de eklezia altlernejo Markov, tamen ne sciigante pri tio la lernejan estraron. Finfine la ĝendarmoj evidentigis ĉiujn disĉiplojn de L. Tolstoj kaj malliberigis ilin.

El la konservitaj dokumentoj estas videble, ke la plej proksima amiko de L. Tolstoj – la voroneĵa bienulo V. G. Ĉertkov – estis aktiva esperantisto. Dum lia foresto, kiam li vojaĝis al L. Tolstoj neatendite aperis ĝendarmoj kaj kunprenis el la domo ĉion: librojn, gazetojn, ĵurnalojn, leterojn eĉ la stokon de pura papero. En la listo de registrita literaturo troviĝas multaj esperantaĵoj. La ĝendarmoj forportis ankaŭ la paperojn de J. M. Tregubov – proksima amiko de L. Tolstoj kaj V. Ĉedkov, kiu tiatempe gastis ĉe Ĉedkov. J. M. Tregubov estis tiu homo, al kiu L. N. Tolstoj diktis la 27 de aprilo 1894j. la mondkonatan leteron „Al voroneĵaj esperantistoj".

Estas ankaŭ jam konate, ke post malper-

15 Сентября 1895 г. 68

Совершенно секретно.

МИНИСТЕРСТВО ВНУТРЕННИХЪ ДѢЛЪ.

ДЕПАРТАМЕНТЪ ПОЛИЦІИ.

По 3 Дѣлопроизводству.

9 Сентября 1895 г.

№ 7293

Господину Начальнику Воронежскаго Губернскаго Жандармскаго Управленія.

Въ Департаментѣ Полиціи получены указанія, что послѣдователи лжеученія Графа Льва Толстого поручили воспитаннику Воронежской Духовной Семинаріи Маркову распространять среди его товарищей журналъ „Esperantisto" на международномъ языкѣ „Esperanto", служащій органомъ вышеозначеннаго лжеученія.

Сообщая объ изложенномъ, Департаментъ проситъ Ваше Высокоблагородіе, отнюдь не доводя о семъ до свѣдѣнія Семинарскаго начальства, провѣрить негласнымъ путемъ выше-

El la ĝendarma dosiero pri Markov kaj el la libro de la voroneĵa ĵurnalisto V. Kuznecov „Svetja drugim" (lumante al aliaj) oni nun vidas ke jam 1895 Esperanto estis vaste disvastigita en Voroneĵ, ĉar la malpermesitan „Esperantiston" tie legis intelektuloj, studentoj, laboristoj kaj eĉ kamparanoj.

Foto: Kulakov

meso de „La Esperantisto" en Rusio ĝia legantaro tiel malpligrandiĝis, ke la gazeto bankrotis kaj ĉesis aperi.

En la ĝendarmara arkivo mi trovis adreson de la korespondanto de V. G. Ĉertkov: Gl. b. Hodgeon, Barry Street, Northcafe, Melburne, Vie Australia. La adresato interesiĝis pri verkado de Leo Tolstoj. Eble iu povas sciigi ion pri li aŭ pri liaj posteuloj.

Ivan Kulakov, prezidanto de la Klubo de internacia amikeco „Esperanto", Voroneĵ, Sovetunio

---

Maks kaj Moric

Aĥ, mi ofte aŭd- kaj legas
pri infanoj, kiuj pekas
kontraŭ ĉiu bonkonduto.
Maks kaj Moric, tiuj du do,
kiuj pri instruoj saĝaj
mokis nur per vortoj aĉaj,
tiuj du ne pliboniĝis
sed al la malbon' dediĉis.
Jes, por ĉia mistifiko
pretas Maks kaj la amiko:
Homincito, bestturmento,
ŝtel' de fruktoj en konsento,
ĉio ĉi plezuron faras
– tio certe al vi klaras –
pli ol sidi en lernejo
aŭ en kirko kun obeo . . .

Jen la unuaj versoj de la fama bildrakonto de Wilhelm Busch pri la bubaĵoj de Maks kaj Moric. La tuta historio, tradukita de Wilfried Hofmann, aperis kiel broŝuro kaj estas mendebla ĉe GDRÉA kaj UEA.

J. W. von Goethe

Dornrozeto

Vidis knab': Jen juna flor'!
Rozujet' kampara!
Bela kiel la aŭror'!
Li alkuris ĝoje por
Vidi kiel kara!
        Rozo, rozo, ruĝa roz',
        Rozujet' kampara.

Diris knab': Mi volas vin,
Rozujet' kampara!
Diris roz': Mi boras vin,
Ĉiam vi memoras min,
Pro l'dolor' amara.
        Rozo, rozo, ruĝa roz',
        Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do
De l'rozuj' kampara,
Ĝi defende pikis tro!
Sed ne helpis ve kaj ho
Kontraŭ vol' barbara.
        Rozo, rozo, ruĝa roz',
        Rozujet' kampara.

Trad. K. Kalocsay

Mihai Eminescu (1850–1889)

Al stelo...

Al stel' ekleviĝanta nun
Longega vojo kuŝas,
Ke post jarmiloj ĝia lum'
Rigardon teran tuŝas.

De longe – eble – tra la blu'
Ĝi mortis en lontano,
Kaj nur radi' apenaŭ plu
Sin montras al terano.

La bild' de l'eksa stelo tra
Ĉielo glite palas:
Ĝi – nevidite – estis ja,
Kaj nun – vidate – malas.

Samtiel, nia amsopir'
En nokton pereinte,
Radio de la eksdezir'
La koron sekvas – pinte.

Tradukis:
Constantin Dominte

Canko Murgin

L. L. Zamenhof pri la internacilingva ideo

La ideo pri starigo de planlingvo en la sfero de la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj estas tre malnova. El scienc-filozofia vidpunkto ĝin unue formulis la elstara franca filozofo-matematikisto Reneo Dekart (Kartezio), kiu antaŭ 355 jaroj (en nov. 1629) surpaperigis, dum siaj memvolaj ekzilo kaj izolo en Nederlando, ke oni povus eltrovi sciencon, starigontan la principojn de tiu lingvo. Krom tio, Dekart prognozis, ke la internacia planlingvo estos tre facila kaj rapide lernebla. Ĝi estos tiom klara kaj esprimpova, ke eĉ la kamparanoj, sen granda peno, povos juĝi pri malfacilaj kaj komplikaj problemoj pli bone ol tion faris tiutempe la eruditaj filozofoj[1]).

Por realigi tiun ĉi ideon sin dediĉis kelkcentoj da fakuloj kaj amatoroj. Kaj post 250-jara klopodo aperis sur la horizonto Volapuko, la lingvo de J. M. Schleyer (en 1879–1881), kiu pruvis, ke la internacilingva ideo estas realigebla.

Kelkajn jarojn poste aperis la Lingvo Internacia (1887) kaj la E-movado, ambaŭ iniciatitaj de Zamenhof. Pro kvalita supereco de Esperanto kiel planlingvo, tiu venkis ne nur Volapukon, sed ankaŭ kelkdekojn da aliaj novaj projektoj pri internacia lingvo: la iamaj tro pretendemaj planlingvoj Ido, de Couturat (1907) kaj Occidental (Interlingue), de E. de Wahl jam ĉesis spiri. Nun apenaŭ vegetas fakte nur unu miniatura konkuranto kontraŭ Esperanto en la batalo por unu internacia planlingvo sur la monda tereno. Ĝi estas la Interlingua, de Aleksandro Gode. En sia 32-jara ekzisto (ekde 1951) Interlingua varbis en sia kulmino en 1975 nur 202 adeptojn tra la tuta mondo kaj en 1977 tiu nombro sinkis al 163 t.e. redukto per 20 elcentoj[2]). Mi emas komenti nek la staton de Interlingua, nek ties atributojn. Tamen mi ŝatus memorigi, ke nur en Bulgario Esperanto varbis pli ol 500 fervorajn subtenantojn en daŭro sole de 16 jaroj (1888–1903).

En la komencaj jaroj de Esperanto (1887–1895) Zamenhof dediĉis scipovon kaj bonhavon por realigo de sia plej dorlotita primara revo: la internacilingva ideo. En lia tiutempa aktivado dominis la poresperanta agado, per kiu li majstre konstruadis la planlingvan ponton inter nacioj kaj ŝtatoj. Tiam Zamenhof verkis kaj tradukadis, redaktis kaj eldonadis, varbis kaj vastigadis... Menciindaj estas liaj antaŭparoloj de lernolibroj kaj de vortaroj, organizaj gazetartikoloj, poemoj (Al la Fratoj, Mia Penso, Ho mia Kor', La Vojo).

En tiu rilato la aŭtoro de Esperanto akcentis kun danko ĉies kontribuon por la komunehoma strebado. Zamenhof kaj la unuaj pioniroj de la E-movado laboris kun tia persisto de la volo kaj kun tia ardeco en la koro, ke eĉ la financa baraktado ne sukcesis ilin haltigi. En junio – aŭgusto 1890 Christian Schmidt, prezidanto de la Nurenberga „Mondlingva Klubo" sen averto ĉesigis la eldonadon de la internacia presorgano „La Esperantisto", eĉ antaŭ la fino de la komencita jarkolekto unua. Tiutempe Zamenhof baraktis en propra financa krizo, sed li preferis morti pro malsato ol vidi la pereon de Esperanto. Li klarigis ĉion tre detale al Schmidt. Tiu entuziasmiĝis kaj kun nova streĉo eldonis la n-ron 9 de la gazeto, de septembro 1890, en kiu aperis redakcia anonco, ke la presorgano plue estos ne nur redaktata, sed ankaŭ eldonata de Zamenhof. Kun granda monperdo kaj enorma peno Zamenhof daŭrigis ĝin eldoni ĝis la fino de la jarkolekto dua, eldonante entute 15 numerojn (de okt. 1890 ĝis la fino de 1891) kaj siaflanke deklaris ĉesigon de la gazeto.

Aperis nova volontulo por eldonanto – la germana esperantisto W. H. Trompeter, kiu deklaris pretecon ne nur plu eldoni la presorganon esperantistan, sed ankaŭ garantii modestan salajron de 100 markoj monate al la redaktoro (Zamenhof). Post tri jaroj (1892–1894) li retiris sian garantion pri aperigo de la „Esperantisto". Oni supozas, ke Trompeter forlasis la eldonistan postenon pro fiasko de la provo enkonduki reformojn en Esperanton dum la krizo somere de 1894. Malgraŭ tiu mispaŝo li estas rekonita de la esperantistaro kiel esperantista mecenato, ĉar en certa momento li savis Esperanton kaj ties movadon el evidenta pereo. En la momento, kiam Trompeter retiriĝis la esperantista presorgano jam havis 650 abonantojn, kies jaraj abonkotizoj sufiĉis por ekzisto de „Esperantisto".

Komence de 1895 Zamenhof duan fojon reprenis sur sin la pezan ŝarĝon de eldonisto. Li estis ne nur iniciatoro de la planlingvo Esperanto, sed ankaŭ redaktoro kaj unu el ĉiuj tri eldonistoj de la tiama unusola E-gazeto en la mondo. Zamenhof ne atendis komplikiĝon en la eldonado. Kontraŭe li supozis, ke tiu funkcios multe pli facile ol en 1890 ĝis 1891. La januara numero de VI-a jarkolekto (1895) estis normale ricevita de la abonantaro. Aperis ankaŭ la numeroj por la monatoj februaro-junio, sed ili ne

estis ricevitaj de la 500 abonantoj, loĝantaj en Rusio. La gazeto estis presata eksterlande kaj la carisma cenzuro ne permesis, ke la lastaj numeroj estu enlasitaj en Rusion.
Tio okazis, ĉar en la februara numero (1895) de „Esperantisto aperis tri danĝeraj materialoj por la carismo: (1) „Kredo kaj Prudento", verko de L. N. Tolstojo; (2) artikolo pri starigo de kunlaboro inter la esperantistoj kaj la tolstojanoj – en la personeco de la eldonfirmao „Peranto" („Posrednik") kaj (3) novaĵeto el Nederlando pri la sperto de malriĉuloj kontraŭ pagado de ŝtatimpostoj[3]).
Tamen en Rusio loĝis pli ol 75 elcentoj de la „Esperantisto"-abonantoj. Sen ili la gazeto ne plu povis ekzisti. Tiu mortiga frapego kontraŭ la esperantistan presorganon fakte estis pli ol sangoverŝa pogromo kontraŭ la internacilingvajn ideon kaj movadon en Rusio.
Zamenhof estis subpremita politike kaj frakasita el financa vidpunkto, sed li ne restis senfara. Post ĉesigo de la E-gazeto li provis kaj sukcese aplikis aliajn manierojn por varbi adeptojn al la internacilingva ideo. En la fino de 1895 Zamenhof verkis la faman broŝureton „Mallongaj Informoj pri la Internacia Lingvo ‚Esperanto'", kiu poste estis eldonita (1896–1899) ankaŭ en deko da aliaj lingvoj. En Bulgario, ekzemple, ĝi aperis eĉ en du broŝurformaj eldonoj en la jaro (1899). Ĝi fariĝis tiutempe plej efika kaj plej malmultekosta varbilo en monda skalo. Ne hazarde oni ĝin kromnomis „mejloŝtono el broŝureto"[4]). Sed la apogeon en la batalo por popularigo de unu planlingvo en la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj Zamenhof atingis per la traktaĵo „Esenco kaj Estonteco de la Internacia Lingvo"[5]) (1900).
Dum tiuj obstakloplenaj jaroj Zamenhof laboregis sindone, kvankam finance li preskaŭ bankrotis, sed en la komenco de la kuranta jarcento li ne sen ĝojo povis konstati, ke la Lingvo Internacia kaj la internacia E-movado profunde enradikiĝis (1903) en la socion kaj daŭre progresas ne plu dependante eĉ de liaj propraj subteno kaj partopreno. Tiam Zamenhof konsideris netuŝebla la instrukcion en la Unua Libro (1887), ke Esperanto de devas entrudiĝi en la „doman vivon de la popoloj"[6]), kion li emfazis ankaŭ en „Esenco kaj Estonteco . . ." (1900) nome, ke Esperanto „neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj"[7]). Tio signifas, laŭ Zamenhof, ke enkonduko de planlingvo en la internacian kaj interŝtatan sferon neniom modifos la internan strukturon de la apartaj nacioj, sed nur celas krei favorajn cirkonstancojn por plifaciligi ties eksterajn rilatojn.
La agado de Zamenhof por realigo de la internacilingva ideo per disponigo de unu planlingvo por uzado en la internacia vivo estas la ĉeffadeno en la historio de E-movado. Pro tiu ideo Zamenhof entuziasmiĝis, salutante la kongresanojn (1905), kiuj „kunvenis . . . por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiuj nin ligas"[8]). En letero al Majoro Lemaire (1907.09.13) Zamenhof admonas: „La mondo ne akceptas nian aferon ne pro tiaj aŭ aliaj detaloj (kiujn ĝi tute ne konas), sed ĉar ĝenerale ĝi estas indiferenta aŭ malamika kontraŭ nia ideo."[9])
Dum la jubilea E-Kongreso en Krakovo (1912) antaŭ ol forlasi la respondecan postenon de gvidanto en la E-movado li trafe atentigis la esperantistojn: „Ne forgesu, ke Esperanto ne estas sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi."[10])
Kvankam en 1912 Zamenhof konstatas, ke la Lingvo Internacia venis al nova pli alta stadio de disvolvo, li energie asertas, ke kontinue estas necesaj ne malpli da klopodoj: „Esperanto jam ne plu dependas de iu sola homo, nek de iu sola aro da homoj por sia sukceso. Homoj povas veni, homoj povas iri, sed Esperanto daŭrigos ĝis la idealo pri la lingvo internacia . . . estos atinginta sian venkan realiĝon por la bono de la tuta homaro."[11]) (1913)
Edmond Privat asertas, ke dum sia lasta vizito en la hejmo de Zamenhof (Varsovio, komence de 1917) la aŭtoro de Esperanto „tre insistis pri tio, ke *la lingvo estas por li nur rimedo,* sed ke la celo de lia tuta vivo estas forigi malkomprenojn inter gentoj kaj helpi homojn . . . trovi la komunan moralan fundamenton, kiu povas unuigi ilin super ĉiaj diferencoj, kredoj aŭ formoj"[12]) (elstarigo mia: C. M.). La internacilingva ideo de Zamenhof estas konstruita sur la „instrumenta" rolo de Esperanto por rekta interŝanĝo de pensoj inter diverslingvanoj.
Ankaŭ post la morto de Zamenhof la batalo por la internacilingva ideo daŭre restas grava. Tion montras Th. Cart en sia raporto dum la XXII-a UK de Esperanto (1930): „La mondo, precipe la lingvistoj, dubas pri la eblеco de la internacia lingvo; ni devas montri al ili, ke ĝi jam ekzistas. Do, ni propagandu kaj uzu Esperanton!"[13]) Tiu tasko ankaŭ nun estas ankoraŭ aktuala kaj ĝi restos tia ĝis la enkonduko de iu planlingvo en la sferon de internaciaj kaj interŝtataj rilatoj fare de la plej altaj ŝtatinstancoj kaj de la organizoj agantaj sur la internacia tereno.
La internacilingva ideo estas tre ĝenerala, komunehoma, superklasa. Ĝi estas efektiva ligilo inter ĉiuspecaj kaj diverstendencaj esperantistoj. Tamen kiel tuthomara bono tiun ideon tre fervore kaj entuziasme subtenas plejparte la progresemaj esperantistoj, kiuj certe interesiĝas ne nur pri solvo de la internacilingva problemo, sed ankaŭ pri rekonstruo de la soci-ekonomika strukturo por krei eblecon pri vivo digna, sen ekspluatado de homo kontraŭ la homo kaj por starigi novtipajn rilatojn inter la homoj, nacioj kaj ŝtatoj.

Notoj

[1]) a) E. Drezen: Historio de la Mondlingvo, III-a eldono, Oosaka, 1967, p. 26, p. 28;
b) Canko Murgin: Reneo Dekart, p. 15 ĝis 16, Bulgara Esperantisto, XLVIII, 12, dec. 1979, Sofio.
[2]) a) Adressario de Interlingua. Union Mundial pro Interlingua, edition 1975.
b) Adressario de Interlingua, edition 1977.
[3]) a) Adolf Holzhaus: Doktoro kaj lingvo Esperanto, Helsinko, 1969, p. 288;
b) Canko Murgin: La nesufiĉe konata Zamenhof, p. 13–15, Bulgara Esperantisto, jk. 49, n-ro 4, aprilo 1980, p. 13.
[4]) Paco, oficiala organo de MEM, XXVI, 4, sept.–okt. 1979, p. 12–13, Sofio.
[5]) Joh. Dietterle (red.): Originala Verkaro de L. L. Zamenhof, Leipzig, 1929, p. 281.
[6]) Noto 5, p. 18.
[7]) Same, p. 281.
[8]) Same, p. 360.
[9]) G. Waringhien (red.): Leteroj de L. L. Zamenhof, vol. II, Paris, 1948, p. 36.
[10]) Noto 5, p. 410.
[11]) Same, p. 412.
[12]) International Language, VII, januaro 1930, Londono, p. 14.
[13]) Heroldo de Esperanto, n-ro 34 (582), de aŭg. 1930.

Estona Panoramo

En Estonio aperis en Esperanto „Estona Panoramo". Ĝi enhavas 24 artikolojn pri vivo en Estonio, pri arto, historio, kulturo, E-movado, ekonomio k.t.p.
En 1982 Tartua Universitato celebris la 350an datrevenon de sia fondiĝo (en Tartu estis ankaŭ gastoj el GDR). En la libro estas artikolo pri universitato „Unu el la plej malnovaj en Eŭropo". Estas ankaŭ 2 noveloj de verkisto Jaak Joerüüt „Sorto" kaj „Urbo de la patrujo".
Sur la unua kovrilpaĝo estas ĉefa konstruaĵo de la Tartua Universitato kaj gestudentoj.
La libro estas riĉe ilustrita per kolor- kaj nigra-blanka bildoj. Tirazo-3 000. (Havebla ĉe GDREA: 4 markoj).

Elmar Ratassepp

Canko Murgin

Pri generalo Mangado

Studante la ideologian disvolvon de d-ro L. L. Zamenhof mi konstatis, ke ne estas facila afero trovi tiun novan tendencon en lia mondkoncepto kun kiu fieras nun la aktivaj esperantistaj pacdefendantoj. En la periodo 1905–1907 aperas, kelkaj pripensindaj faktoj[1]), sed ili estas izolaj, sporadaj. Historiistoj ilin subtaksis pro du konsideroj (a) ideologia miopeco kaj (b) prefero al kvanta balasto ol la malfacile rimarkebla kvalita ĝermo de la nova trajto.

Post dujara paŭzo alvenas nova ondo de alta tajdo de faktoj (1910–1917) pri senduba kresko de Zamenhof en ideologia sfero[2]), sed en la fino de Zamenhof-vivo oni daŭre parolas pleje pro inercio heredita el pasintaj etapoj de disvolvo, ignorante la novan tendencon. Bedaŭrinde la subita morto de Zamenhof pro apopleksio ĉesigis lian disvolvon (en aprilo 1917).

Por akiri pluajn argumentojn pri kvalifiko de la nova tendenco ĉe Zamenhof mi decidis esplori tiun proceson ĉe liaj deko da fidelaj kamaradoj kaj kunlaborantoj. Ĉi tie mi prezentas la rezultojn pri du el ili: Alfred Thonney, poŝtisto el Lozano, Svislando kaj Julio Mangada Rosenörn, el Madrido, Hispanio.

Alfred Thonney naskiĝis en 1887[3]). Li partoprenis la I-an UK de Esperanto en 1905 kaj de tiam li konas d-ron Zamenhof persone. Thonney gvidis en Lozano la „Instituton por Internacia Interŝanĝo de Progresaj Spertoj"[4]). Tiu Instituto estis samtempe Centra Oficejo por distribuado de la Internacia Esperanto-Revueto „Homaro", en kies paĝoj (junie 1913) aperis la sepa (lasta) versio de la homaranisma platformo. Samloke funkciis ankaŭ la provizora Sidejo de la ankoraŭ ne fondita homaranisma organizo, sed jam kolektanta plenigitajn „Respondaro"jn por individuaj aliĝoj al homaranisma platformo.

Post la unua mondmilito Thonney aliĝis al SAT[5]). Kiam en 1953 estis fondita MEM li aliĝis al tiu pacdefenda movado kaj kontribuis kontraŭmilitajn tezojn el Svislando en la paĝoj de gazeto „Paco", oficiala organo de MEM[6]).

La dua eksterlanda kamarado kaj kunlaboranto de Zamenhof estas Julio Mangada Rosenörn, naskita en Kubo (en Sanktispiritis, 1877)[7]). Verŝajne post la liberiĝo de Kubo (en 1898) li revenis en Hispanio. Mangada fariĝis esperantisto en 1906. Li partoprenis multajn UK de Esperanto, verkis eldonis dekon da libroj en Esperanto, jen originaloj de Esperanto prozo kaj poezio, jen tradukoj el hispana literaturo en Esperanto. Mangada eldonis je propra kosto la homaranisman gazeton „Homaro". Li eldonis ankaŭ la broŝurforman tekston de homaranismo[8]) en Madrido, 1913. D-ro Zamenhof trovis en la personecoj de Mangada, de Thonney kaj de d-ro Uhlmann la plej sincerajn kamaradojn en sia klopodo starigi homaranisman organizon en 1914.

Post la unua mondmilito Mangada same kiel Thonney fariĝis membro de SAT[9]). Samtempe li estis kaj daŭrigis plue esti unu el la elstaraj gvidantoj de la neŭtrala Esperanto-movado, kvankam SAT malpermesis tion al siaj membroj. Ekde la fondiĝo de la Hispana Esperanto-Instituto (1925) li fariĝis ties sekretario. Dekon da jaroj li eldonis la hispanan Esperantistan presorganon. Ekde 1932 li estas prezidanto de Hispana Esperantista Asocio.

Kiam en la somero de 1936 la Hispana Respubliko estis en danĝero Mangada batalis ĉe la flanko de la respublikana armeo (kiel oficiro) kontraŭ la faŝista armeo de generalo Franko. Poste Mangada daŭrigis batali kontraŭ la faŝistaj armeoj, sed jam kiel oficiro en la „Internacia Brigado", konsistanta el eksterlandaj kontraŭfaŝistoj, venintaj en Hispanio el diversaj landoj por helpi al la Hispanaj Respubliko kaj popolo.

Gladys Keable, IPE-ano el Anglio, raportante pri la III-a Kongreso de IPE en Parizo, de 7-a ĝis 12-a de aŭgusto 1937 skribas: „Alia elstara punkto de la kongreso estis la ĉeesto el la Hispana Fronto de rumana soldato el la Internacia Brigado. Li ricevis specialan forpermeson el la Fronto, por ke li ĉeestu la kongreson. Li kunportis salutleterojn al la kongreso de sia propra Brigad-bataliono kaj de generalo Mangada kaj Ludwig Renn, bone konataj esperantistoj."[10]) Oni povus diri, ke tiu Esperanto-agado en la Internacia Brigado kaj en la III-a Kongreso de IPE estis rezulto el la duopa klopodo de Mangada kaj Renn.

Post la malvenko de la Respublikana Armeo en Hispanio Mangada rifuĝis en Alĝerion[11]) kaj de tie li migris al Latina Ameriko (Argentino). Li mortis en 1948 en Meksiko. Pri lia morto sciigis nur la gazeto „Heroldo de Esperanto" en la somero de 1949[12]).

Tiuj skizetoj el la biografioj de A. Thonney kaj J. Mangada evidentigas, ke Zamenhof efektive ekiris laŭ samdirekta vojo en periodo 1905–1907 kaj des pli insiste li daŭrigis en 1910–1917.

Notoj

[1]) a) Canko Murgin: L. Zamenhof dum la revolucio en Rusio (1905–1907), p. 34 ĝis 35, Paco, organo de MEM-Sekcio en GDR, Berlino, 1980; b) Canko Murgin: La Nesufiĉe Konata Zamenhof, p. 13–15, Bulgara Esperantisto, XLIX, 4, apr. 1980, p. 13, Sofio.

[2]) a) Canko Murgin: L.-L. Zamenhof dum la revoluci-prepara periodo (1910–1914), p. 34–35, Paco, organo de MEM-Sekcio en GDR, Berlino, 1981; b) Noto 1 b), p. 14–15.

[3]) Jarlibro de SAT, Paris – Leipzig – Moskvo, 1928, p. 193.

[4]) L. L. Zamenhof: Deklaro pri Homaranismo, Madrido, 1913, p. IV de kovrilpaĝo.

[5]) A. Thonney havis membronumeron 150 kaj aliĝis ekde 1921. Jarlibroj de SAT, 1925, p. 84; 1927, p. 157; 1928, p. 193; 1929–1930, p. 128.

[6]) A. Thonney: 80 000 subskriboj – nerespektitaj, p. 5, Paco, oficiala organo de MEM, n-roj 29–30, de aprilo-majo 1957, Ĉeĥoslovaka eldono.

[7]) Enciklopedio de Esperanto, represita, Budapeŝto, 1979, p. 358.

[8]) Noto 4.

[9]) Jarlibroj de SAT, 1927, p. 313; 1928, p. 221; 1929–1930, p. 142.

[10]) The British Esperantist, XXXI, 390, de okt. 1937, p. 167.

[11]) The British Esperantist, XXXII, 420–421, de april-majo 1940, p. 196–197.

[12]) Heroldo de Esperanto, XXV, 11 (1108), de 1-a de julio 1949.

Okaze de la 85-a naskiĝtago de Bert Brecht

Historioj pri sinjoro Keuner

Sinjoro K. kaj la naturo

Demandite pri sia rilato al la naturo, sinjoro K. diris: „Kelkfoje, venante el la domo, mi tre ŝatus vidi kelkajn arbojn. Precipe ĉar per la ŝanĝiĝo de sia aspekto laŭ la taghoro aŭ la sezono ili atingas specialan gradon de realeco. Krome, en la paso de la tempo nin en la urboj konfuzas, ke ni ĉiam nur vidas bezonaĵojn, domojn kaj tramojn, kiuj estus malplenaj se neloĝataj, sensencaj se neuzitaj. Nia stranga sociordo ja igas nin kalkuli eĉ la homojn al tiaj bezonaĵoj. Kaj tial por mi, kiu ne estas lignaĵisto, la arboj enhavas ion trankvilige memstaran, min ekskluzivantan. Kaj mi eĉ esperas, ke ankaŭ por la lignaĵisto ili enhavas ion, kio ne povas esti utiligata." (Sinjoro K. krome diris: „Estas por ni necese uzi la naturon ŝpare. Restante en la naturo sen laboro, oni facile ekhavas malsanan staton, io simila al febro trafas nin.")

Organizo

Foje sinjoro K. diris: „La pensanto ne uzas tro multe da lumo, da pano, da ideoj."

Formo kaj substanco

Sinjoro K. rigardis pentraĵon, kiu donis al kelkaj objektoj tre kaprican formon. Li diris: „Rigardante la mondon, kelkaj artistoj spertas la samon kiel multaj filozofoj. Dum la klopodo pri la formo la substanco perdiĝas. Iam mi laboris ĉe ĝardenisto. Li enmanigis al mi grandan ĝardenan tondilon kaj ordonis al mi tajli laŭroarbon. La arbo staris en poto kaj estis pruntedonota por festoj. Tiucele ĝi devis havi la formon de globo. Ni tuj komencis fortranĉi la sovaĝajn ŝosojn, sed kiel ajn mi klopodis por atingi globformon, mi longtempe ne sukcesis. Foje je la unu, foje je la alia flanko mi fortondis tro multe. Post kiam finfine estiĝis globo, ĝi estis tre malgranda. La ĝardenisto diris seniluziiĝinte: „Bone, jen la globo, sed kie estas la laŭro?"

Amika servo

Kiel ekzemplon por la ĝusta maniero fari servon al amikoj, sinjoro K. prezentis jenan rakonton: „Al maljuna arabo venis tri junuloj kaj diris: ‚Nia patro mortis. Li postlasis al ni dek sep kamelojn kaj dispoziciis en la testamento, ke la plej aĝa el ni havu la duonon, la dua unu trionon kaj la plej juna unu naŭonon de la kameloj. Nun ni ne povas interkonsenti pri la divido; transprenu la decidon!' La arabo meditis kaj diris: ‚Kiel mi vidas, al vi mankas unu kamelo por povi bone dividi. Mi mem havas nur ununuran kamelon, sed ĝi estas al via dispono. Prenu ĝin kaj post dividu kaj redonu al mi nur, kio restas.' Ili dankis pri ĉi tiu amika servo, kunprenis la kamelon kaj nun dividis la kamelojn tiamaniere, ke la plej aĝa ricevis la duonon, tio estas naŭ, la dua unu trionon, tio estas ses, kaj la plej juna unu naŭonon, tio estas du kameloj. Post kiam ili flankenkondukis siajn kamelojn, je ilia miro restis unu kamelo. Tiun ili, denove dankante, rekondukis al sia maljuna amiko." Sinjoro K. nomis ĉi-tiun amikan servon ĝusta, ĉar ĝi ne postulis specialajn oferojn.

Fidindeco

Sinjoro K., ŝatante la ordon en la homaj interrilatoj, restis implikita en bataloj dum sia tuta vivo. Iun tagon li refoje trafis en malagrablan aferon, kiu necesigis, ke li nokte vizitu kelkajn renkontejojn tre malproksimajn unu de la alia. Estante malsana, li petis amikon pri mantelo. Tiu promesis ĝin al li, kvankam per tio li mem devis repreni sian promeson de malgranda renkontiĝo. Ĉirkaŭ la vespero la situacio de sinjoro K. tiel malpliboniĝis, ke la renkontiĝoj ne plu utilis kaj io tute alia fariĝis necesa. Tamen kaj malgraŭ la manko de tempo sinjoro K., fervora ankaŭ siavice plenumi la renkontiĝon, akurate venis por preni la mantelon fariĝintan senutila.



Foto Zentralbild

La senhelpa knabo

Sinjoro K. parolis pri la malbona kutimo, silente engluti suferitan maljuston, kaj rakontis jenan historion: „Knabon plorantan antaŭ sin iu pasanto demandis pri la kaŭzo de lia aflikto. ‚Mi havis ĉe mi du groŝojn por la kinejo', diris la knabo, ‚jen knabo venis kaj ŝiris unu el mia mano', kaj li montris al knabo videbla en kelka distanco. ‚Ĉu vi ne kriis pro helpo?' demandis la viro. ‚Jes', diris la knabo plorsingultante iomete pli forte. ‚Ĉu neniu aŭdis vin?' la viro demandis lin plu, ame karesante lin. ‚Ne', plorsingultis la knabo. ‚Ĉu vi ne povas krii pli laŭte?' demandis la viro. ‚Tiam fordonu ankaŭ tiun.' Prenis la lastan groŝon el lia mano kaj senzorge pluiris."

La demando, ĉu ekzistas dio

Iu demandis sinjoron K., ĉu ekzistas dio. Sinjoro K. diris: „Mi konsilas al vi pripensi, ĉu via konduto ŝanĝiĝus laŭ la respondo al ĉi tiu demando. Se ĝi ne ŝanĝiĝus, tiam mi povas helpi vin almenaŭ tiagrade, ke mi diras al vi: ‚Vi jam decidiĝis: Vi bezonas dion?'"

Trad. d-ro Karl Schulze (†)

El la „Trigroŝa Opero" de B. Brecht

La marrabista Jenny

I.
Sinjoroj, vi vidas min lavi nun glasojn
Kaj ordigi la liton al ĉiu.
Kaj rapide mi dankas pro penco-donoj,
hotelaĉon vi vidas kaj min en ĉifonoj,
kaj pri mi scias veron neniu.
Sed iun vesperon estos kri' ĉe l'haveno,
kaj demandos oni: Kia estas la krio?
Kaj min oni vidos rideti ĉe l'glasoj
kaj miros, ke mi ridetas ĉe tio.
Kaj jen ŝip' kun ok veloj
kaj kun kvindek kanonoj
vidiĝos ĉe l'kaj'.

II.
Oni diras: 'Do iru kaj lavu la glasojn'
kaj donas al mi la penco-moneron.
Kaj la pencon mi prenas, la liton ordigas
(kaj neniun ĉi-nokto ĝi plu dormigas.),
kaj neniu jam scias pri mi la veron.
Sed iun vesperon estos bru' ĉe l'haveno,
kaj demandos oni: Kia estas la bruo?
Kaj oni min vidos post la fenestro
kaj miros pri mia malica ĝuo.
Kaj la ŝip' kun ok veloj
kaj kun kvindek kanonoj
pafos kontraŭ la urb'.

III.
Sinjoroj, nun certe ridad' via ĉesos,
ĉar la murojn disbatos pafado arda,
kaj estos ĝistere la urb' detruata,
kaj nur hotelaĉ' estos indulgata.
Estos mir', kiu loĝas en ĝi aparta?
Kaj ĉi-nokte estos pro l'hotelo kriado:
Ĝin kial indulgi? demandos iu.
Kaj matene oni vidos, ke mi elvenas,
kaj diros oni: Ĉu en ĝi loĝis tiu?
Kaj la ŝip' kun ok veloj
kaj kun kvindek kanonoj
hisos flagon ĉe l'mast'.

IV.
Kaj matene cent viroj la ŝipon forlasos,
sin embuske en ombro starigos
kaj ĉiun el ĉiu pordo prenos,
al mi kondukante ilin forte katenos
kaj tuj min demandos: Ni kiun mortigos?
Kaj estos tagmeze silent' ĉe l'haveno,
kiam oni demandos, kiu devas morti!
Kaj tiam ili aŭdos min diri: Ĉiuj!
Kaj ĉe l'kapofalo diradas mi: Hop!
Kaj la ŝip' kun ok veloj
kaj kun kvindek kanonoj
malaperos kun mi.

Trad. d-ro Karl Schulze (†)

La kanonkanto

I.
Kaj Jonny kaj Jim la entreprenon
kun Georgie, serĝent', partoprenis.
Sed l'armeo demandas nenies devenon
kaj ili kun ĝi norden venis.
Soldata trono
estas la kanono
de l'Kab' ĝis Couch Behar.
Se pluvas foje
kaj al ili survoje
nova raso falas,
kiu brunas aŭ palas,
ili traktas ĝin tuj kvazaŭ kanibalar'.

II.
De John ofte venis pri l'viski' la plend'.
Kaj kovrajoj al Jim mankis ĉiam.
Sed ambaŭ je l'brak' prenis Georgie, serĝent',
ĉar l'arme' povas morti neniam.
Soldata trono
estas la kanono
de l'Kab' ĝis Couch Behar.
Se pluvas foje
kaj al ili survoje
nova raso falas,
kiu brunas aŭ palas,
ili traktas ĝin tuj kvazaŭ kanibalar'.

III.
John mortis, same estis milita buĉad!
por Georgie kaj Jim la pereo.
Sed ruĝa ja estas la sango-rulad'
kaj oni revarbas jam por la armeo.
Soldata trono
estas la kanono
de l'Kab' ĝis Couch Behar.
Se pluvas foje
kaj al ili survoje
nova raso falas,
kiu brunas aŭ palas,
ili traktas ĝin tuj kvazaŭ kanibalar'.

Trad. d-ro Karl Schulze (†)

Historioj pri sinjoro Keuner

Interparoloj

„Ni ne plu povas interparoli", diris sinjoro K. al viro. „Kial?" tiu demandis terurite. „En via ĉeesto mi ne eligas ion prudentan", plendis sinjoro K. „Sed tio ja ne estas grava por mi", la alia lin konsolis. „Tion mi kredas", sinjoro K. diris kolere, „sed por mi estas grave."

Gastamo

Se sinjoro K. akceptis gastamon, li lasis sian ĉambron, kiel li trovis ĝin, ĉar li ne opiniis ĝuste, ke personoj altrudas sian stampon al sia ĉirkaŭaĵo. Male li klopodis ŝanĝi sian konduton tiel, ke ĝi konvenas al la loĝejo; sed tio, kion li estis faronta, ne devis suferi pro tio.
Se sinjoro K. donis gastamon, li formetis minimume unu seĝon aŭ tablon, de ĝia ĝisnuna loko, tiamaniere atendante la apartecon de sia gasto. „Kaj estas pli bone, ke mi decidas, kio estas konvena por li!" li diris.

Sinjoro K. en fremda loĝejo

Enirinte fremdan loĝejon, sinjoro K. rigardis pri nenio alia ol pri la elirejoj, antaŭ ol enlitiĝi. Al demando li respondis embarase: „Tio estas malnova malagrabla kutimo. Mi estas por la justeco; pro tio estas bone, se mia loĝejo havas pli ol unu elirejon."

Saĝa ĉe la angulo estas la sinteno

Al sinjoro K. venis profesoro pri filozofio kaj rakontis al li pri sia saĝeco. Post iom da tempo, sinjoro K. diris al li: „Vi sidas malkomforte, vi parolas malkomforte, vi pensas malkomforte." La profesoro pri filozofio koleriĝis kaj diris: „Ne pri mi mi volis scii ion, sed pri la enhavo de tio, kion mi diris." „Ne estis enhavo", diris sinjoro K. „Mi vidas vin iri mallerte, kaj ne estas celo, kion vi atingas, dum mi vidas vin iri. Vi parolas obskure, kaj ne estas helo, kiun vi estigas parolante. Vidante vian sintenon, mi ne sentas interesiĝon pri via celo."

Trad. d-ro Karl Schulze (†)

Ĉi-tiu numero estas bulteno de la MEM-sekcio de Germana Demokratia Respubliko, DDR - 1080 Berlin, Charlottenstr. 60, telefono 2 20 29 91

Redakta komitado de la reve „Paco" (serio oficiala)

Violin Oljanov – ĉefredaktoro (Bulgario)
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
Oldřich Knichál (Hungario)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Canko Murgin (Bulgario)
Nguyen Hai Trung (Vjetnamio)
Bolesłav Stastczak (Pollando)

Atentigo

La Redakcio atendas kontribuajojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en gravaj kazoj – ĝis 90. Ili estu tajpitaj kun sufiĉa interlinia spaco kaj marĝeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La Redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpajo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La Redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

Kien skribi:

Honora Prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1 vhod 2, 1113 Sofia, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Imre Pethes, H - 1940, Budapest VI, Nepköztarsasag utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, Moskva K–9, USSR.

Glady Claude, 36 Marne str. B - 1030 Brüssel, Belgio.

Ĝenerala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix Montoire, 37100 Tours, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3–13–26, Zyôto-ku, Osaka, Japanio

Dimitro Ĥaĝiev, kompleks Lenin, bl. 4, 1504 Sofia, Bulgario

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, bulv. Emil Markov, p. k. 66, 1404 Sofia, Bulgario

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM Komitato, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofia, Bulgario

Centra kasisto: (por la okcidentaj landoj) Piere Joŭvin, 14 rue Thiers, 76120 Grand Queilly, Francio

Respondeculo pri landaj numeroj de PACO: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DDR - 83 Pirna, GDR

Perantoj

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. Buderim, Qld. 4556

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A - 1200 Wien AŭŜ 100

Belgio: Glady Claude, 36 Marne Str. 1030 Brüssel

Berlino Okcidenta: Roland Schnell, Wilhelmshavelerstr. 25, 1000 Berlin 21, konto Stgt 137769–701 15 DM

Brazilo: F-ino Elma Nascimento, str. D. Claudina No. 100, apt. 402, Meier Rio de Janeiro, RJ. CEP 20, 721 3491,77 kruzejroj

Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, Covenham Louth, Lines LN 11, OPF £ 4

Bulgario: Bulgara MEM-Komitato, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofia 3 levoj

Ĉeĥoslovakio: PNS Vinohradskà 46, 12 043 Praha 2 42 kronoj

Por la kromaj (naciaj) numeroj: ĈES, Jilska 10, 11000 Praha 1 16 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK - 2700 Kobenhavn BRN 50 d. kr.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D - 6731 Elmstein 15 DM

Finlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2–1–68, 01610 Vantaa 61 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle B. P. 23, F - 54510 Tomblaine 771 77 R. Nancy poŝtĉekkonto 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, 1080 Berlin 30,– M

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, Sabadell (Barcelona)

Hungario: Hungara MEM-Komitato, H - 1368 Budapest, 5, pf. 193 36 ft

Italio: Riccardo Pinori, V. le Chisleri 9/15, 1-00176 Roma (p. ĝ. k. 64882004)

Japanio: Kurita Kimiaki, 411, Misima Yata Sakuragaoka 1209 98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio)

Kubo: Rufino López, Havana Esp-Rondo, poŝtkesto 314, Habana 1

Norvegio: Olaf Reiersøl, Buerstad, N - 3155 Torod

Pollando: Ruch – Warzawa

Portugalio: Portugala E'Asocio, Rua Dr. Joao Couto RC A-Lisboa 460 escudo

Rumanio: Cosma Dorin, Mizicescu 26, sc., C. ap. 11, R 1900 Timişoara

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107, Quan Thanh, Hanoj

Sovetunio: Asocio de Sovetaj Esperantistoj, prosp. Kalinina 14, Moskva K–9 1,80 rubloj

Svedio: Tomas Jansson, Väktargatan 26 D, S 754 22 Uppsala


Usono: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60304 dol. 8.

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Piere Jouvin (centra kasisto – vd. maldekstre)

Grave:

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 Sofia bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco"). El nesocialismaj landoj – al la adreso de la Centra kasisto – 40 fr. fr.

Tiun kajeron redaktis:
D-ro Detlev Blanke



(Ni nur publikigos tajpitajn korespondpetojn)

Alĝerio

Dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Abdelkader Bettahar, No 8 Ave Colonel Amirouche, Eckmuhl, **Oran**

Britio

60-jara britino dez. kor. kun esp. el GDR. Maggie Hurst, 1 Laceby Road, **Scuntharpe**, South Humberside, DN 17 2 L B

ĈSSR

Oficistino, 28j., dez. kor. pri ĉ. tem., kol. ludilojn, enigmojn, E-librojn, Monika Zeisová, Máchova 1215, CS - **27401 Slaný**
Dez. kor. kun filatelistoj el Jugoslavio, Mongolio, Bulgario, GDR. Ján Kurimský, Komenskeho 8, **CS - 07101 Michalovce**

GDR

Dez. kor. Else Häberlein, **DDR - 9430 Schwarzenberg**, Heilig Ackerweg 24
16j. knabino dez. kor. pri hundoj, sporto, muziko. Annerose Kruwinnus, **DDR - 2910 Perleberg**, Ravenslandstr. 25, PSF 194
Familio Manfred (29j.) kaj Helga Öl (24j.) dez. kor. pri moderna muziko, turismo, fotografio, kol. suvenirojn, gramofondiskojn, poŝtmarkojn. **DDR - 4440 Wolfen**, Lessingstr. 9
Veterinaro dez. kor. kun samprofesianoj pri fakterminologiaj aferoj. d-ro Giso Brosche, **DDR - 7981 Rückersdorf**
18j. lernanto int. pri fremdaj lingvoj, serĉ. amikinon el GDR. Uwe Werner, **4900 Zeitz**, Steinsgrabenstr. 29
18j. faklernantino dez. kor. pri fotoj, gramofondisk., turismo. Michaela Piel, **DDR - 2850 Parchim**, Waagestr. 2
Ĝardenistino, 58j. dez. kor. kun ĉ. l. pri vojaĝoj, modo, kuirreceptoj, floroj. Inge Pusch, **DDR - 1601 Bindow**, Mariannenstr. 50
Lernanto 15j. dez. kor. kun knaboj el la tuta mondo pri astronomio. Torsten Neumann, **DDR - 2830 Boizenburg**, E.-Th.-Körnerstr. 7
Oficistino, 44j. dez. kor. kun samaĝulo pri ĉ. t. **DDR - 2800 Ludwigslust**, Bahnhofstr. 12
Oficistino, 35j. dez. kor. kun esp. el soc. landoj pri muziko, lit., pentrajoj, vojaĝoj, Sigrid Plüch, **DDR - 2793 Schwerin**, Gagarinstr. 11

Francio

Sinjoro Marc Blondeel, 22 Rue Claude Debusy, **F - 59130 Lambersart**, ekde nun pensiulo, dez. denove koresp. kaj interŝ. p. m.

Japanio

Maljuna laborista esperantisto, marksisto, dez. kor. en E-o aŭ germana lingvo kun esp. el GDR. H. Noda, 4–34 Shimizucho, **Nishinomiya**, 662

Kubo

Juna profesoro de angla lingvo dez. kor., interŝ. modrevuojn, gramofondiskojn de junulara muziko, diapozitivojn kaj artistfotojn. Koresp. angle, france, itale, Esp., parolas iom ĉeĥe. Carlos Alvarez Molina, Avenida 85 No. 10005, **Guinos**, Prov. Habana
Verkisto 28j., ankaŭ skulptisto kaj pentristo, dez. kor. pri poezio, teatro, pentroarto, junulara muziko, literaturo,. Parolas Esp., angle, hispane, france kaj iomete japane. Jose L. Naranjo, Ave 47 No 7428 e/74 y 80, **San José de las Lajas, La Habana**
Elektro-inĝ., 35j. dez. kor. tutmonde pri E-mov. kaj div. tem, ne-kolektanto. Jorge Turinó Hernández, Joaquin de Agüero 540, **Camagüey**
mo, lingvoj, tekniko, bildkartoj. Trinh Ván Dúng,

Vjetnamio

Studento 18j. dez. kor. tutmonde pri pentroarto, turisturo, Parolas Esp., angle, hispane, france kaj iomete D/C Nguyên Dô Khánh (VPEA), **Ho Chi Minh-urbo**, 173 A Vô Vân Tân Q. 3 kol. esperantajojn por ekspozicio. Helpos eksterl. esp. por renkontiĝoj, prelegoj, ekskursoj en Vjetnamio

Mongolio

Ulan Bator, Gobi Indastry of Wollen garments, shop sewing 8, knitted Worker Batzaya, dez. koresp.

Rumanio

Proponas rumanajn pm., novajojn kaj laŭ mankolisto, kolektas maksimumkartojn kaj UTK, neuzitajn pm. kaj blokojn pri pentroarto, floroj, faŭno, sporto, transporto, 33j., koresp. ankaŭ angle, hungare, france, germane, ruse. Vajda Ioan, B-dul Gârii nr. 30A, Bloc 225A, Sc. B, Ap. 18, **200 Brasov 9.** Vojaĝonte al la urbo Brasov skribu al mi 6 semajnojn antaŭe. Mi plezure renkontus vin kaj helpus.
Lernantino 35j., kun du infanoj, dez. kores., Szŝz Lenke, **4174 Praid**, nr. 130, jud. Harglita
16j. jernantino, dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, kol. bk, diapoz., p. ĉ. t. Beldianu Erika, str. Nordului BL. 12, Ap. 7, **or. Codlea**, cod 2252 jud. Brasov
Projektantino, 33j. dez. kor. tutmonde, interŝ. pm., bk pri folklorajoj, arkitekturaj monumentoj. Yarilena Teodoru, **Bukarest 74632**, L. Rebreanusstr. 18, Bloc A 5, sc. II, et. II, ap. 20. sektor 000, of PTTR 57

Hungario

Oficistino, 43j., Nagy Vilmosne, Judith, **H - 5553 Kondoros**, Béke str. 10
Oficistino, 24j., Abonyi Judit, **H - 5553 Kondoros**, Arpád str. 4
Vendistino, 23j., Opauszki Györgné, **H - 5553 Kondoros**, Bacsó str. 46
Oficisto 44j., Závogyán János, **H - 5553 Kondoros**, Bem str. 12
Asistantino 32j., Harsányi Dezsöné, **H - 5553 Kondoros**, Orsika, Dózsa 35
Seruristo 24j., Dandai György, **H - 5553 Kondoros**, Táncsics 8
Oficistino 31j., Opauszki Erzsébét, **H - 5553 Kondoros**, Bajcsy 14
Oficistino 28j., Laurinyecz, Agnes, **H - 5614 Kótzoprony**, Dózsa 35
Instruisto por matematiko, 25j. dez. koresp. kun esp. el GDR, Eva Urban, **Jászapáti**, Kiuizsi u 23, H - 5130
Dez. koresp. kun germana knabino, Peter Makai, **H - 5000 Szolnok**, Bokány, D út 22
Studento 20j., dez. kor. kol. pm, Harmat Tibor, **Kaposvár**, Marx Károly köz. 10, H - 7400
Lernantino, 14j., dez. kor. Juhász Judit, **Pécs**, Ybl Miklós u 5/b. 7633
Hungaro 38 dez. kor. Ede Agotai, **Mejszász**, Kossuth u 1 H - 5052
Oficistino, 31j. dez kor. pri arto, vojaĝoj, kpl bk. Marianna Horváth, **Sátoralsaúhely**, Dózsa Györg u 4 em 12, H - 3980
Lernanto 17j., dez. kor. esperante, ruse, germane, Gábor Medveczki, **Debrecen**, Hobya u 9, H - 4027
Knabo 20j., dez. kor. kun geknaboj el GDR, ŝatas fiŝhoki. Gulyás Tibor, **Csongrád**, Viola u. 5, H - 6640
Lernantino 15j., kol. bk, magnetofonkasedojn, ŝat. muzikon, sporton kaj la anglan lingvon. Erika Kovács, **Budapest 1131**, str. Thälmann 22/c 118
Studento 19j. dez. kor. Ferdinand Vincze, **Lenti**, Pf 36/x, H - 8960
Gimnaziano dez. kor. Illés András, **Budapest IV**, Madach utca 15, 1046
Novaj (16–18 jaraj) gekursanoj de trafika mezlernejo „BERCSÉNYI" en la urbo **Győr** deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Korespondpetojn bonvolu sendi al la kursogvidanto: ERZSÉBET Terebessy, KUNSZIGET, Felszabadulás u. 30. **H - 9184 KUNSZIGET**, HUNGARIO
Novaj (15–18 jaraj) gekursanoj de tekstajindustria fakmezlernejo „REJTŐ SÁNDOR" en la urbo **Győr** deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Korespondpetojn bonvolu sendi al kursogvidanto: ISTVÁN EŐRY, GYŐR, Munkásőr u. 36. fsz. 3. **H - 9023 GYŐR**, HUNGARIO
Novaj kursanoj, studentoj de Trafika kaj Telekomunikada Ĉeflernejo en la urbo **Győr** volas korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Korespondpetojn bonvolu sendi al la kursogvidanto: István Eőry, Győr, Munkasőr u. 36. fsz. 3. **H - 9023 GYŐR**, HUNGARIO

Pollando

Flegistino 21j., kol. bk, Jadwiga Rozenbajgier, **36-213 Haczów** (sicina 116) Woj. Krosno
Teknikisto 29j., dez. kor. pri literatur, filmoj, moderna muziko, fotografio, sport, turismo, reciproka gastigado, dez. interŝ. pm, bk, ins., kalendaretojn. Stemoień Ryszard, str. C. Sklodowskiej 9, **59-840 Zawidów**
Junulino 19j., dez. kor. Jolanta Krsysiak, 14-421 Zielonka Paslecka, **Marzewo**, PL - 14-421
Teknikisto, 35j. dez. kor. kun GDR-anoj. Feliks Zygawski, ul. Lésna 14, **33-104 Tarnów**
Konstruteknikisto 26j., dez. kor. pri turismo, Jerzy Wierzbicki, ul. Reja 7/3, **65-076 Zielona Gora**
Teknikisto 23j. dez. kor. pri turismo, sporto, libroj, filmo, kol. bk, pm, Jozef Przeslaliewskicz, ul. Utrata 14, **05-170 Lalenoczym**, woj. st. warsz.
Studentino de ekonomio, 22j. dez. kor. Grazyna Abramczuk, ul. Andrzejewskiego 11/17. DS „Atol", **PL - 60-119 Poznan**
Studento 19j., dez. kor. pri turismo, literaturo, sporto, k. a. Andrzej D. M. Zywien, **65-536 Zielona Gora**, ul. Gwardii Ludowej 10/34
Dez. koresp. pri muziko, 20j., Marian Czachor, Dobrynin 55, **39-322 Rzemień**
Dez. kor., kol. bk, glimarkojn, pm, esp.-revuojn. Ernest Tews, os. Wiokniary 5/18, **58-260 Bielawce**

Bulgario

Klubo de Esperantisto ĉe uzina kulturdomo deziras kontaktiĝi kun kluboj kaj grupoj, agantaj en la kadro de entreprenenejaj kaj teritoriaj kulturdomoj por kolektiva korespontado, interŝanĝo de spertoj, materialoj kaj eventuale por kontaktigo de la respektivaj kulturdomoj. Adreso: Stopanski Kombinat za Obrabotka na Aluminij „Stamen Stamenov", Dom na kulturata, Klub na Esperantista, **9700 Ŝumen**, Bulgario
F-ino Todorka Georgieva, str. „Vihren" 6, et. 2, ap. 22, **9704 Ŝumen**, Bulgario
Tanja Angelova, Hristova, ul. „Trakija" Nr 1, ap. 6, **9704 Ŝumen**, Bulgario
Enver Tahirov Ŝakirov, ul. „Gen. Dragomirov" 52, bl. 16, vh. 1, et. 7, ap. 27, **9700 Ŝumen**, Bulgario
F-ino Antoaneta Slaveva Vlasakieva, str. „Červenoarmejska" 16, vh. A, ap. 21, **9701 Ŝumen**, Bulgario
Ivan Krâstev Kostadinov, ul. „Trakija" Nr 1, ap.11, **9704 Ŝumen**, Bulgario
S-ino Kalinka Georgieva Kirova, ul. „Gen. Dragomorov" 32, bl. 5, vh. 5, et. 4, ap. 116, **9700 Ŝumen**, Bulgario
S-ro Ilija Andreev, str. „Vit" 3, ap. 4, **9700 Ŝumen**, Bulgario.
Ĉiuj deziras korespondi pri diversaj temoj el ĉiuj landoj.

Soveta Unio

Knabo, 15j., dez. kor. pri kino, arto, sporto, muziko, kol. bk, pm: Oleg Savenkov, 665 726 Bratsk-26, str. Mira 54–88
32j. aviadisto, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm, insignojn, revuojn: Jurij Petrosevic, Gagarina Pr. 2, 1/2, **703 003 Samarkand**
Gennadij Chromenko, 644 104 Omsk-104, ul. Korbyschewa 3b–74, dez. kor. kun junulo el GDR
Geknaboj, (13–16j.) dez. kor. tutmonde, p. ĉ. t.: Dvorec Pionerov Esperanto, 454 000 Ĉelabinsk
Instruisto, 26j., dez. kor. tutmonde, p. ĉ. t.: Nikolaj Jakimĉuk, 264 920 Novovolynsk, 1, Volynskaja obl., ul. Gagarina 6/47
Gennadij Katunin, 630 064 Novosibirsk, str. Vatutina 47 ap. 4, (37j.) dez. kor.
Perma studenta E-klubo „Stelo" serĉas kontaktojn kun eksterlandaj E-kluboj kaj geesp. Skribu al Jelnina Marina, str. Bolŝevistskaja 98–23, 614 001 Perm
Studento, 18j., dez. kor. kun germanaj geesp. pri radio, elektroniko, fotografado: Viktor Radĉenko, 340 078 Doneck 78, ul. Veresaeva 89
35j. komencanto, teknika tradukisto, dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk, diskojn: V. M. Beljaev, 113 535 Moskva M - 535, ul. Rossoŝanskaja, 13-2-7

Eldoninto de tiu ĉi numero:
GDR-MEM-sekcio, Kulturligo de GDR / asocia sekretariejo (Esperanto-Asocio). Redakcio: 1080 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 2 20 29 91. Respondeca redaktoro: D-ro Detlev Blanke. Redakcia komisiono: Ludwig Schödl, Rudolf Hahlbohm, Werner Pfennig. Redakcia fino: 31-a de marto 1983. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.
3406 - 36



Unua kovrilpaĝo: Karl Marx. Desegnaĵo de Vladimir Dvoran laŭ foto el la jaro 1867. Lasta kovrilpaĝo: Turingia pejzaĝo.

Fotoj: Zentralbild